

EL POPOLA
CINIO 4
1965





Ĉinaj sportistinoj Lin Hujing (dekstre) kaj Ĝeng Mingi gajnis W.J. Pope-pokalon por la ĉampioneco de la virina duopa konkurso en la 28-a Monda Ĉampionea Turniro de Tabloteniso

Dumonata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 4 (93) 1965

Ĉefa Enhavo

Sur la kovrilo — Ju Gjun (dekstre), lernantino de la Duonlabora-duonlerna Lernejo de la Pekina Dua Lanŝpin-teksejo lernas de Jang Ĵoping, laboristino la teknikon de subtila kardado.
Foto de Peng Gjun

En Tiu Ĉi Numero

Deklaro de Maŭ Zedong por Subteni la Dominikan Popolon kontraŭ la Usona Armita Agreso Vjetnama Problemo

Granda Venko de la Bandung-spirito

La Popola Armeo de Ĉinio

Novaj Atingoj de la Tablotenisa Teamo de Ĉinio

Eduksistemo de Nova Tipo

“Indignaj Flamoj en Kokosarbaro”
(*Kantodanco, bildpaĝoj*)

“Ruĝa Virina Taĉmento” (*Baledo, bildpaĝoj*)

“Ruĝa Virina Taĉmento” — Nova Disvolviĝo de la Baledo en Ĉinio

Unu Duonlabora-duonlerna Lernejo Bari Maron kaj Trabori Monton por Riĉa Rikolto

Granda Faro de Malgranda Fabriko Dank’ al Lernado de Verkoj de Prezidanto Maŭ

El Legejo en Praktikon

Post Mia Reveno de Francio

Unu Vilaĝa Biblioteketo kaj Ĝia Bibliotekisto

Kiel Usono Disŝiris la Ĝenevajn Interkonsentojn

La Unua Azi-afrika Konferenco Homo antaŭ 500,000 Jaroj

La Homfosilioj Malkovritaj en Ĉinio Tri Fajfoj

Sur la dorskovrilo — Lotusfloroj
Foto de Ŝen Ming

ALDONO:

La Mondo Diras: La sukcesa eksplodigo de la dua atombombo de Ĉinio estas alia granda kontribuo al defendo de la mondpacon



EN TIU ĈI NUMERO

La paĝonombro de nia gazeto ĉifoje denove superis la regulan, ĉar lasttempe okazis serio da gravaj aferoj kiujn ni devas raporti ĝustatempe.

NUN, la vjetnama problemo jam fariĝis fokuso de la internacia batalo kaj forte altiras al si la atenton de la tutmonda popolo. La situacio en Vjetnamio streĉiĝis pro tio, ke la usona imperiismo detruis la Ĝenevajn Interkonsentojn, senbride agresas sudan Vjetnamion, bombadas la Nordon de Vjetnamio kaj senĉese disvastigas la agresan militon. La heroo batalo de la tridek milionoj da vjetnamaj popolanoj kontraŭ la usona agreso, defendas ne nur sian patrolandon, sed ankaŭ la mondpacon. Estas necese por nia gazeto ĝuste konigi niajn legantojn pri la vero kaj disvolviĝo de la afero.

HODIAŬ, kiam la tutmonda popolo atente observas la streĉan situacion en Vjetnamio, ankaŭ Dominiko en la okcidenta duonsfero renkontas armitan intervenon de la usonaj imperiistoj. Tio ĉi estas granda malkaŝo de la agresista vizaĝo de la usona imperiismo. Kiu ajn popolo kuraĝas leviĝi por defendi siajn sendependecon kaj suverenecon, kiu ajn popolo kuraĝas ekbatali por sia liberiĝo, kiu ajn popolo kuraĝas ekbatali kontraŭ la naciperfida marioneta reĝimo de Usono, tiun la usona imperiismo tuj subpremas per siaj alsenditaj soldatoj — jen estas la t. n. Johnson-ismo!

LA legantoj certe interesiĝas ankaŭ pri la novaj atingoj de la ĉinaj tablotenisistoj en la 28-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Turniro ĉijara. Per kvin ĉampionecoj kaj kvar duaj ĉampionecoj ili kreis rekordon en la ĉina tablotenisa historio.

Iliaj brilaj atingoj estas gajnitaj dank’ al ilia diligenta lernado kaj bona aplikado de la pensoj de Maŭ Zedong, ke ili ludas tablotenison kun revolucia spirito, ili kuraĝas venki la plej grandan malfacilon, ili posedas la dialektikan penson malestimi la malfacilojn strategie kaj sufiĉe pritaksi la malfacilojn taktike, ili severe ekzercas sin laŭ malfacilaj kondiĉoj, kaj dum konkurso ili persistas en kolektivismo forĵetante ĉiujn personajn konsiderojn. Tial ili estas bravaj en la lukto kontraŭ danĝeraj rivaloj kaj ilin venkis.

La ĉina popolo ŝate aprezas kaj lernas la sperton el iliaj atingoj kaj ĉerpas el tio novan forton por plenumi siajn socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon. Ĝi alte ŝatas aparte tion, ke ili ne nur akiris gloron, sed ankaŭ internacian amikecon dum la turniro per interŝanĝo de tablotenisa tekniko kun alilandaj sportistoj por levi la ludarton kune kun ili.

* * *

KAJ krome, artikoloj pri la duonlabora-duonlerna kaj duonterkultura-duonlerna edukistemo, pri la fondo kaj disvolviĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, pri nova disvolviĝo de baledo en Ĉinio ktp. espereble donos al niaj legantoj interesajn informojn.

La Red.

DEKLARO DE

POR SUBTENI LA DOMINIKAN POPOLO

La 12-an

Lastatempe, en la Dominika Respubliko okazis ŝtatrenverso por faligi la naci-perfidan diktaturan reĝimon de Cabral. La Johnson-registaro de Usono ekspedis tien pli ol 30,000 trupanojn por fari sangan subpremon. Tio estas grava provoko de la usona imperiismo al la dominika popolo, al la popoloj de Latinameriko kaj al la popoloj de la tuta mondo.

La patriota dominika popolo nun faras heroan batalon kontraŭ la usonaj agresantoj kaj iliaj lakeoj.

La ĉina popolo firme subtenas la dominikan popolon en ĝia patriota armita batalo kontraŭ la usona imperiismo. Mi estas forte konvinkita, ke la Dominika Respubliko, subtenate de la popoloj de la mondo, certe gajnos la finan venkon, se ĝi nur apogas sin sur la vastaj popolamasoj, unuigas ĉiujn patriotajn fortojn kaj persistas ĉe longdaŭra batalo.

La usona imperiismo neniam ĉesis subigi la latinamerikajn landojn sub sian kontrolon, interveni al ili kaj ilin renversi kaj agresi. Ĉifoje, la usona registaro flanken ĵetis ĉiujn siajn trompajn frazojn kiaj “najbaramikiga politiko” kaj “principo de neinterveno”, kaj kondukis nudajn intervenon kaj agreson al la Dominika Respubliko. Tio des pli malkaŝis la verajn trajtojn de la usonaj imperiistaj banditoj.

Usono faras sian armitan intervenon en Dominiko sub la standardo de “defendo de libero”. Kia do estas tiu “libero”? Ĝi estas libero buĉadi popolanojn de aliaj landoj per aeroplanoj, militŝipoj kaj kanonoj, libero laŭvole invadi kaj okupi teritorion de aliaj landoj, libero laŭvole atenci ilian suverenecon. Ĝi estas libero de piratoj rabi kaj mortigi, libero treti subpiede ĉiujn landojn kaj popolojn de la mondo. Tiel agas la usonaj imperiistoj en la Dominika Respubliko, en Vjetnamio, en Kongo (Leopoldvilo) kaj en multaj aliaj lokoj.

Usono faras sian armitan intervenon en Dominiko ankaŭ sub la standardo de “batalo kontraŭ komunismo”. La “batalo kontraŭ komunismo” de la usona imperiismo signifas batalon kontraŭ ĉiuj kiuj ne volas esti sklavoj de Usono, batalon kontraŭ ĉiuj

Mitingo de la pekina popolo por subteni la dominikan popolon oponi la armitan agreson de la usona imperiismo



MAŬ ZEDONG

KONTRAŬ LA USONA ARMITA AGRESO

najo, 1965

kiuj defendas la sendependecon, suverenecon kaj nacian dignon de siaj landoj, batalon kontraŭ ĉiuj kiuj rifuzas submetiĝi al la agreso, superkontrolo, interveno kaj supertiranado de la usona imperiismo. Tion faris Hitler, Mussolini kaj Toĝo en la pasinteco. Tion faras la usona imperiismo hodiaŭ en eĉ pli granda skalo.

En la okuloj de la usona imperiismo, la Unuiĝintaj Nacioj, la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj kaj similaj estas nur iloj en ĝiaj manoj. Ĝi utiligas ilin, kiam ilin ĝi bezonas, kaj ilin forpuŝas per la piedo, kiam ĝi ne plu bezonas ilin. Kaj ilin forpuŝinte per la piedo, ĝi povas ankoraŭ ilin relevi por plua utiligo. Ĉu ilin uzi aŭ forpuŝi perpiede dependas de ilia utilo al ĝia agresa celo.

La usona agreso kontraŭ la Dominika Respubliko konigis al ĝia popolo kaj ĉiuj aliaj popoloj de Latinameriko pluapaŝe, ke por gardi nacian sendependecon kaj ŝtatan suverenecon, estas nepre necese fari pint-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la agresema usona imperiismo.

La armita interveno fare de Usono en Dominiko vekis novan tajdon de la popoloj de Latinameriko kaj la tuta mondo kontraŭ la usona imperiismo. Vi, la heroa dominika popolo, ja ne estas izola en via batalo. Vin subtenas ĉiuj popoloj de Latinameriko, ĉiuj popoloj de Azio, ĉiuj popoloj de Afriko, ĉiuj popoloj de la socialisma tendaro, kaj efektive ĉiuj popoloj de la tuta mondo.

Unuiĝu la popoloj de la socialisma tendaro, unuiĝu la popoloj de la landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, unuiĝu la popoloj de ĉiuj kontinentoj, unuiĝu ĉiuj pacamaj landoj kaj ĉiuj landoj subigitaj al la agreso, superkontrolo, interveno kaj supertiranado de Usono, kaj formu la plej vastan unuecan fronton por oponi la agresan kaj militan politikojn de la usona imperiismo kaj defendi la mondpacon.

Certe venkos la batalo de la popoloj de la mondo kontraŭ la usona imperiismo!

Certe malvenkos la usona imperiismo, la komuna malamiko de la popoloj de la tuta mondo!

Ankaŭ fremdlandaj gestudentoj el Pekino partoprenas la mitingon kaj demonstracias.



LA VJETNAMA

Ekde la 7-a de feb., ĉijare, la usona Johnson-registaro faras ĉiam pli intensan agreson kontraŭ suda Vjetnamio kaj samtempe etendas la militon en la Nordon de Vjetnamio senĉese ĝin bombante kun frenezeco, kio pli kaj pli gravigas la situacion en Vjetnamio, kaj faris ĝin fokuson de atento de la popoloj de la tuta mondo.

DEVENO DE LA PROBLEMO

En jul., 1954, post kiam la Ĝeneva Konferenco atingis interkonsentojn pri armistico en Hindoĉinio kaj solvo de la politika problemo, jam tiam solviĝis la problemo de Vjetnamio. La Ĝenevaj Interkonsentoj difinis: "Ĉiu partopreninta lando garantias respekti la sendependecon, suverenecon, unuecon kaj integrecon de teritorio de Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo; la franca armeo devas retiriĝi el Hindoĉinio; por facile malaperigi la situacion de milita tempo, ĉefe por doni oportunecon al la franca armeo regroupiĝi kaj retiri sin, Vjetnamio provizore estu dividita en du regionojn; Vjetnamio faru balotadon kaj efektivigu unuiĝon en jul., 1956.

Sed, post kiam la franca armeo retiriĝis el Vjetnamio laŭ la Interkonsentoj, la usona imperiismo senĉese detruis la Interkonsentojn, kaj profitante la okazon invadis kaj okupis la Sudon de Vjetnamio. Ĝi knedis la Sudorientazian Traktatan Organizon, prenis ankaŭ sudan Vjetnamion kiel regionon sub ĝia povo, samtempe sendis tien grandan kvanton da militaj provizaĵoj, konstruis militajn bazojn, subtenis la pupan reĝimon, malhelpis la unuiĝon de Vjetnamio kaj instigis la pupan klikon freneze subpremi la antaŭajn rezistantojn kaj patriotojn. Ekde majo, 1961, la usona registaro denove komencis kon-

duki la malhoman "specialan militon" en suda Vjetnamio. Nun, ĝi eĉ mem sin ĵetis en tiun militon per senĉesa ekspedo de trupoj en sudan Vjetnamion kaj senbride bombadas la Nordon de Vjetnamio, komplete detruis la Ĝenevajn Interkonsentojn, kaj sola kreis la ĉiam pli gravan situacion en Vjetnamio.

La diversaj faktoj kiel la usona imperiismo rompis la Ĝenevajn Interkonsentojn estas okulfrapaj al ĉiuj popoloj de la mondo. Ankaŭ la usona popolo klare ĉion vidas. Miloj kaj kaj dekmiloj da usonaj popolanoj manifestaciis surstrate por oponi la agresadon fare de sia registaro kontraŭ suda Vjetnamio kaj ĝian bombadon al la Nordo de Vjetnamio. Antaŭ la Blanka Domo, antaŭ la pordo de Johnsona paŝtejo, en altaj institutoj kaj universitatoj, sur la Federa Domego en San Francisko, ĉie

Usonaj agresantoj amase arestas pacamajn loĝantojn ĉie en suda Vjetnamio.



PROBLEMO

Nia korespondanto

aŭdiĝis laŭtaj sloganoj de la usona popolo: “Usona armeo retiriĝu el suda Vjetnamio!” “Neinterveno al suda Vjetnamio!” “Kontraŭ plua bombado al norda Vjetnamio!” Iuj usonanoj esprimis sian proteston eĉ per fastado kaj sinbruligo.

La 13-an de majo, ĉijare, en la ĵurnalo *New York Times* publikiĝis nefermita letero subskribita de pli ol 700 profesoroj kaj laborantoj en dekoj da altaj lernejoj de Usono, inkluzive de la Boston Universitato, Harvard Universitato kaj Yale Universitato por riproĉi la usonan Johnson-registaron pro ĝia agresado kontraŭ Vjetnamio. La letero citis la jenajn “evidentajn faktojn”:

La Ĝeneva Interkonsento ne difinis dividi Vjetnamion en du landojn. Tute male, la Interkonsento parolis pri la du partoj de

Vjetnamio kiel “regrupiĝaj zonoj” kaj diris ke “la milita limlinio estas provizora, kaj ne devas esti eksplikita kiel politika aŭ teritoria limo”. Ĝi difinis ke “...ĝenerala balotado devas esti okazigita en jul., 1956 ...” Tia balotado por unuiĝo ne okazis. Aprobate de Usono, la sajgon-a reĝimo rifuzis. De tiam Usono insistas ke Vjetnamio restu dupartigita.

La 7-an de apr., 1965, la Prezidanto faris alian priskribon pri la celoj de la registaro ... li diris plue: “Nia celo estas la sendependeco de suda Vjetnamio kaj ĝia liberiĝo de atako. Ni volas nenion por ni mem, sed nur ke la popolo de suda Vjetnamio povu konduki sian landon laŭ sia propra maniero.” La “evidenta fakto” estas ke la skalo de la usona interveno estas ne-

Granda nombro da popolanoj de suda Vjetnamio estas buĉita de la usonaj agresantoj. Laŭ statistiko 170,000 vjetnamoj estas mortigitaj tie dum la pasintaj 11 jaroj.

La inferaj uson-pupaj trupoj kruele bruligas, mortigas, rabas... en suda Vjetnamio. Jen indignanta maljunulo kontraŭstaras sentime la areston de uson-pupaj soldatoj.





La maŝinpafistaro gvidata de la laboristo Hoang-van-Tang en norda Vjetnamio faligis 5 invadintajn usonajn aviadilojn en unu sola tago, la 15-a de marto, ĉijare.

konforma al la celo de memdecido.... La batalmaniero montras ke..... en sudan Vjetnamion ni seninterrompe aeroportis trupojn kaj provizaĵojn. Ni ĵetis napalm-bombojn sur civilajn popolanojn mikse loĝantaj kun gerilanoj. Ni forbruligas kaj senfoliigas agropiantojn kaj arbojn. Ni uzis senkapabligan venengason. Tiom grand-skala interveno ja ne donas al la popolo la eblon elekti, sed ĝi senigas ĝin je la rajto elekti.

La letero montris krome: "La monda opinio ne subtenas la militagojn de Usono en Vjetnamio." Usonaj civitanoj ne povas ne esprimi siajn opiniojn, ili ne estos timigitaj per minaca akuzo pri trompiĝemo aŭ mallojaleco.

CERTE MALVENKOS LA AGRESANTOJ

La agresiva milito kondukata de la usona registaro kontraŭ suda Vjetnamio "eskaladas", laŭgrade disetendiĝas. Escepte de atomarmiloj, uziĝis en ĝi ĉiaj modernaj armiloj inkluzive de venengaso kiun eĉ Hitler ne kuraĝis uzi!

Sed tio ne timigis la vjetnaman popolon, kontraŭe, vekis pli grandan malamon ĉe la popolo de suda Vjetnamio tiel ke ĝi pli heroe batalas kontraŭ sia malamiko.


Koncerne al la armiloj kaj aliaj ekipaĵoj, la popolo de suda Vjetnamio havas krom la usonajn armilojn akiritajn el trupoj de Usono kaj la pupa reĝimo, nur fusilojn, grenadojn, eĉ primitivajn pafarkojn kaj sagojn, glavojn kaj lancojn. Konsiderante la diversajn modernajn armilojn de la usona armeo, oni devas

diri ke la popolo de suda Vjetnamio estas en tre malegala pozicio en la milito.


Sed la milito disvolviĝis tute kontraŭ la deziro kaj espero de la usona imperiismo. En la “speciala milito” de ĝi praktikata, pereis ne la armita forto de la popolo de suda Vjetnamio, sed la usonaj “Staley-Taylor Plano”, “McNamara-Nguyen Khanh Plano”, nombro da aeroplanoj sur Bien Hoa Flugkampo, la usona ambasadorejo en Sajgono... Fronte al la heroaj bataloj de la popolo de suda Vjetnamio, la t. n. “speciala milito” bankrotis! Nun, pli kaj pli grandiĝis la popola armita forto de suda Vjetnamio. Ĝi jam liberigis kvar kvinonojn de la tero kaj pli ol dek milionojn da popolanoj de suda Vjetnamio. Jam formiĝis la favorega situacio kun la vilaĝoj ĉirkaŭatakantaj la urbojn. La pupa reĝimo kaj ĝiaj trupoj jam proksimiĝas al ruiniĝo.

Por savi sin de malvenko en suda Vjetnamio, la Johnson-registaro praktikis la duoblan taktikon de milita minaco kaj “paca” trompo — disetendante la fumkurtenon de paco seninterrompe ĝi sendas helpajn trupojn al

la Sudo de Vjetnamio kaj vaste bombadas ĝian Nordon. Sed ĝia trompa politiko de “paco” mem sin malkaŝis. Ĝi mem deprenis sian trompan vualon. Forĵetinte sian maskon de “konsilisto”, ĝi rekte sendas siajn trupojn en la militon, sed tio neniel povas ŝanĝi ĝian jam difinitan malvenkon sur la batalkampo en suda Vjetnamio. La agresantoj certe malvenkos kaj la revolucia popolo defendanta siajn landon kaj nacian sendependecon certe venkos. Por ne paroli ke la usona armeo kutimiĝinta al komforto estas multe pli sentaŭga ol la faŝista armeo de Hitler. Kontraŭ la heroa kaj lerta popolarmeo de suda Vjetnamio ĝi prezentiĝas ankoraŭ pli malforta kaj sentaŭga. Rezulte de la bombado fare de Usono al la Nordo de Vjetnamio grandaj nombroj da usonaj aviadiloj estis faligitaj de la vjetnama popolo. Laŭ statistiko, en la sola periodo de la 7-a de feb., ĝis la 10-a de jun., la nombro de la usonaj aviadiloj faligitaj de la popolo de la Nordo de Vjetnamio, ne inkluzive de tiuj kiuj faldetruigis en suda Vjetnamio pro difektiĝo, jam superis 300. La “aera supereco” pri kiu tiel fanfaronis la usona



Restajo de usona jeto por bombado kaj batalo “Tondroĉefo” F 105-D, la plej nova laŭ fanfaronono, estas faligita de la vjetnamaj armeo kaj popolo (supre). La malsupra bildo montras tiutipan aviadilon.



imperiismo, jam bankrotis, sub la pezaj batoj de la vjetnama popolo.

Faktoj pruvis ke la agresema usona imperiismo estas nur papertigro aspekte forta sed fakte febla, nur militkolportisto kiu tiranas la molan kaj timas la malmolan. Estas sendube ke ĝi povas esti venkita.

SUBTENI LA UNUAN FRONTON EN BATALO KONTRAŬ IMPERIISMO

La justa patriota batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona agreso defendas

ne nur la sendependecon, suverenecon kaj nacian dignon de Vjetnamio, sed ankaŭ la internacian justecon, la rajtojn de ĉiuj landoj kaj popoloj, kiuj ne volentas submetiĝi al agreso, superkontrolo, interveno kaj super-tirano de la usona imperiismo, kaj la interesojn de la pacamaj popoloj de la tuta mondo. Ĉar la agresado de la usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio estas grava provoko ne nur al la vjetnama popolo, sed ankaŭ al la popolo kaj la paco de la mondo. Se oni lasus ĝin laŭplaĉe bruligi loĝejojn kaj mortigi homojn en Vjet-

Supre maldekstra: Usona piloto (meze) pafovundita de armita trupo de la sudvjetnamia popolo, estas forsavata de siaj kunuloj en hasteco.

Sube maldekstra: Usona piloto Hayden Lockhart estas kaptita de la vjetnama popolo dum bombado al norda Vjetnamio.

Supre dekstra: La usona "ambasadoro" al suda Vjetnamio Maxwell Tajlor venas malĝoja sur la aerodromon en Bien Hoa bombarditan de la popola trupo de suda Vjetnamio, kaj ne scias kion fari vizaĝe al tiom da ruinigitaj aviadiloj.

Sube dekstra: Deprimitaj usonaj agresaj soldatoj antaŭ detruita aviadilo.



namio kaj ne donus al ĝi rebaton, ĉu oni ankoraŭ povus paroli pri justeco kaj praveco en la mondo? Ĉu la popolo de la mondo ankoraŭ povus ĝui vivon en paco kaj trankvilo?

La vjetnama popolo nun batalas sur la unua fronto por la pacama popolo de la tuta mondo. Unuflanke, ĝi donis pezajn batojn al la agresa kaj milita politikoj de la usona imperiismo kaj detenis ĝiajn fortojn fiaskigante al ĝi la tergloban strategion por monda hegemonio; aliflanke, per sia heroa ekzemplo la vjetnama popolo kuraĝigis la subpremitan popolon en Azio, Afriko kaj Latinameriko al batalo, kaj montris al la subpremataj nacioj kaj popolo de la tuta mondo la ĝustajn direkton kaj vojon de kontraŭimperiisma batalo.

Ĉinio estas lando partopreninta la Ĝenevan Konferencon, kaj unu el la landoj kiuj subskribis la Ĝenevajn Interkonsentojn, tial ĝi havas la devon zorgi ke la Interkonsentoj plene efektiviĝu. Cetere, Ĉinio estas najbarlando de Vjetnamio, kaj frate interligiĝas kun ĝi kiel la lipoj kaj la dentoj. Tute klara estas la pozicio de la ĉina popolo subteni la vjetnanan popolon en ĝia justa patriota batalo kontraŭ la usona agreso. Fakte, la ĉina popolo jam ricevis efikan helpon de la vjetnama popolo kiu batalas sur la unua fronto kontraŭ usonaj agresantoj, ilin retenante, malfortigante kaj forte punante. La Ĉina Registaro jam plurfoje solene deklaris firmdecide respondi al la deklaro kaj alvoko de la Nacilibergia Fronto de Suda Vjetnamio, doni al ĝia popolo ĉiujn necesajn materiajn helpojn, inkluzive de armiloj kaj ĉiaj militaj provizaĵoj. Ni ankaŭ estas pretaj por sendi niajn personojn batali kune kun la popolo de suda Vjetnamio kiam la lasta tion bezonos. La ĉina popolo firmdecide subtenadas la vjetnanan popolon en la granda batalo kontraŭ la usona agreso por liberigi la Sudon de Vjetnamio, defendi la Nordon kaj reunigi ĝian patrolandon, ĝis la fina venko. En kia ajn tempo kaj kia ajn cirkonstancaro kaj kiel ajn Johnson k. s. faras sian plejblon kalumnii kaj ataki Ĉinion, la ĉina popolo neniam ŝanceliĝos kaj forlasos tiun ĉi starpunkton.


LA VOJO POR RESTARIGI PACON EN VJETNAMIO

La nura vojo por restarigi pacon en Vjetnamio estas ke la usona imperiismo ĉesigu sian

Ankaŭ la forte gardata "ambasadorejo" de Usono en suda Vjetnamio ne evitis la bomban punon de ĝia popolo.



Kun manoj plenmakulitaj per sango de la sudvjetnania popolo ankaŭ A. Johnson, usona "vicambasadoro" en suda Vjetnamio ricevis sangomakulojn survizaĝe, punate de la popolo per bombo.



Post surprizatako de popola armita trupo en suda Vjetnamio, ruiniĝis la loĝdomo de la usona armeo en Qui Nhon pereigante la plejparton de la 57 enloĝantaj usonaj oficiroj kaj soldatoj, el kiuj nur dek kelkaj forrestis kaj evitis la katastrofon.





Pekinaj popolanoj kunvenas sur la Tian-anmen-placo por subteni la vjetnaman popolon en ĝia justa batalo kontraŭ la armita agreso de la usona imperiismo.


agreson kaj retiru ĉiujn siajn armitajn fortojn el suda Vjetnamio, alia vojo ne ekzistas.

Hodiaŭ, Usono jam falis en la senelirejan marĉon en suda Vjetnamio, la Johnson-registaro ne nur ricevadis unuvoĉajn riproĉojn kaj protestojn de la popolo de la tuta mondo, sed ankaŭ inter ĝiaj aliancaj landoj troviĝas iuj, ekzemple Francio k. c. kiuj malkaŝe oponas kontraŭ ĝia agresado. Eĉ interne de Usono pli kaj pli multiĝas la oponentoj. Se ĝi obstine daŭrigos sian agresadon, ĝin certe atendas fiasko pli mizera kaj pli kompleta.

Nun, Johnson, Rusk k. s. ŝajne “ne larmos ĝis vido de la ĉerko”. Alsendante aldonajn trupojn ili svingadas olivbranĉon dirante ke “la kanalo por politika solvo estas malfermita”, kaj ke la usona imperiismo estas “ne postiganta por rimedoj de paca solvo”. Tio estas la duobla agresa politiko de la usona imperiismo, la t. n. politiko de “bastono plus karoto”. Krom tiuj kiuj volas esti lakeoj de la usona imperiismo kaj intencas vendi la interesojn de la vjetnama popolo tion flateme laŭdaĉas kaj ĉie ofertas, estas ankaŭ ne malmulte

da homoj, naivaj kaj bonkoraj, kiuj estas jam de ĝi trompitaj. Sed la 7-an de apr., kiam Johnson elmetis la tiel nomatan “senkondiĉan diskutadon” li klare deklaris ke la usonaj agresantoj kroĉiĝos al suda Vjetnamio kaj “neniam sin retiros”, kaj li volas ke “suda Vjetnamio ne estu atakata”. Por diri malkaŝe, tio signifas nur devigi la popolon de suda Vjetnamio ĉesigi kontraŭstaron kaj ke oni agnosku la ekzistantan fakton pri la agreso kaj supertiranado al suda Vjetnamio fare de la usona imperiismo. Oferti “pacan traktadon” sub la agresaj bomboj kaj bajonetoj de la usonaj agresantoj signifas fakte subigi al ili la vjetnaman popolon. Kompreneble, tion ne povas konsenti la vjetnama popolo, nek la landoj kaj popoloj, kiuj vere defendas la Ĝenevajn Interkonsentojn, defendas la pacon de Hindaĉinio kaj la mondo.

La usona imperiismo nepre devas esti for el suda Vjetnamio! Se ĝi mem tion ne volas, la popolo de Vjetnamio nepre ĝin elpelos subtenate de ĉiuj pacamaj landoj kaj popoloj tra la mondo al plena malvenko!



*Partoprenantoj en la mitingo krias kun indigno: “For la usonajn agre-
santojn!” “Firman subtenon al la vjetnama popolo en ĝia justa batalo por
la patrio kontraŭ Usono!”*

La ŝanhaja popolo manifestacias kontraŭ la usona agreso al V.D.R.



GRANDA VENKO DE LA BANDUNG

Prezidanto Sukarno alvokas la azi-afrikan popolon pluapase unuiĝi en opono kontraŭ imperiismo kaj la nova kaj malnova koloniismoj en la kunveno por celebros de la 10-a datreveno de la Bandung-a Konferenco.



SPIRITO



Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilo de la Ĉina Popola Respubliko invitive partoprenas en celebraj aktivadoj okaze de la 10-a Datreveno de la Aziafrika Konferenco. Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj (dekstre) estas varme akceptata de Prezidanto Sukarno (maldekstre) sur la aerodromo.




EN aprilo ĉijare ĉefoj kaj gvidantoj de 40 aziaj kaj afrikaj landoj kunvenis en Jakarta, la ĉefurbo de Indonezio, laŭ la invito de la indonezia registaro por celebri la 10-an datrevenon de la Unua Konferenco de Aziaj kaj Afrikaj Landoj. Tiu kunveno plie disvolvis la spiriton de la nomita konferenco: unuiĝi por oponi imperiismon.

En la senprecedenca konferenco okazinta en 1955 kun granda historia signifo, gvidantoj de 29 landoj de la du kontinentoj interkonsiliĝis kaj decidis pri gravaj aferoj ligitaj kun iliaj sortoj. La konferenco estis senprecedenca, ĉar tiuj aziaj kaj afrikaj landoj unuafoje forpuŝis ĉiajn partoprenojn kaj intervenojn de imperiismo kaj eksteraj fortoj en siaj aferoj kaj naskiĝis la Bandung-spirito — unuiĝi por oponi imperiismon.

SERIO DA VENKOJ

En la dek jaroj post la konferenco sub la alte levita flago de unuiĝo por oponi imperiismon kaj kunlaboro de la Bandung-konferenco kaj kuraĝigate de la Bandung-spirito serio da venkoj estis atingita de aziaj kaj afrikaj popoloj:



Gvidantoj de azi-afrikaj landoj vidataj sur la prezidejo de la amaskunveno.

1. En 1955 estis nur 29 sendependaj landoj en Azio kaj Afriko. Dum la pasintaj dek jaroj pliaj 35 landoj kun preskaŭ 210 milionoj da loĝantoj kaj teritorio de pli ol 20 milionoj da kv. km. forskuis la jugon de imperiismo kaj deklaris sin sendependaj.

2. En la batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo la forto de la popolo fariĝas ĉiam pli granda. La popolaj armitaj luktoj de suda Vjetnamio, Laoso, norda Kalimantanano kaj suda Jemeno en Azio, kaj Kongo (Leopoldvilo), Portugala Gvineo, Angolo kaj Mozambiko en Afriko brulas ĉiam pli arde kaj disvolviĝas ĉiam pli proksimen al venko.

3. Gravajn venkojn gajnis aziaj kaj afrikaj landoj ankaŭ en siaj luktoj por firmigi sian sendependecon, defendi sian suverenecon, disvolvi naciajn ekonomion kaj kulturon, kontraŭbatali agreson, kontrolon, renverson kaj subfosadon. La reakiro kaj ŝtatigo de Suez-kanalo kaj batalo de la Unuiĝinta Araba Respubliko kontraŭ la britaj, francaj kaj izraelaj invadantoj, la lukto de la araba popolo kontraŭ Izraelo, agresa instrumento de la usona imperiismo, kaj la batalo de la palestina popolo por reakiri sian laŭleĝan rajton reveni al sia hejmlando Palestino kaj la batalo de Indonezio kontraŭ la novkoloniisma produktaĵo Malajzio aŭ finiĝis per venko aŭ akiris gravajn atingojn. Aparte menciinda estas la patriota justa batalo kontraŭ la usona agreso de la popolo de suda Vjetnamio, kiu gajnas ĉiam pli grandajn venkojn, terure vundas la 1-an imperiismon Usono, forte kuraĝigas la batalvolon de la aziaj kaj afrikaj popoloj kaj defendas la mondpacon.

Tiu ĉi deko da jaroj estas jardeko dum kiu la naciliberiga movado en Azio kaj Afriko vive disvolviĝis kaj la unuiĝo de Azio kaj Afriko por oponi imperiismon ricevis grandan progreson.

La Bandung-konferenco akcelis firman unuiĝon de la aziaj kaj afrikaj landoj kaj formigon de nova forto kun mondsignifo, kaj ĉiam pli grandan rolon ĝi ludas por la aziaj kaj afrikaj popoloj en ilia batalo por defendi mondpacon, akiri nacian sendependecon, defendi ŝtatan suverenecon, disvolvi naciajn ekonomion kaj konstrui sian landon.

ANTAŬENMARŜO EN VENKO

En la dek jaroj post la konferenco la aziaj kaj afrikaj popoloj pli klare vidis el sia propra sperto la fakton: kie sendependeco estas de-

truata kaj suvereneco estas atencata, tie leviĝas batalo kontraŭ la usona imperiismo, la ĉefa malbonfaranto de la nuna tempo. Ĝiaj krimoj de agreso, superkontrolo, subfosado kaj renverso kaj ĝia naturo estas pli klare traviditaj de la popolo.

“Agreso kaj superkontrolo estigas luktojn kontraŭ la agreso kaj superkontrolo, kaj la venko apartenas al la subpremataj popoloj.” Azio kaj Afriko, kiuj estis sklavigataj kaj prirabataj de imperiismo kaj koloniismo kaj estis turmentataj de suferoj kaj postrestinteco, nun leviĝas kiel vekiĝintaj, batalantaj kaj antaŭenirantaj kontinentoj.

La dekjara historio instruis la popolon de la du kontinentoj, ke estas necese persiste daŭrigi la kontraŭimperiisman lukton, alie povas esti ree perdita ĉio jam akirita. Plej instrua ekzemplo estis la kazo de Kongo (L.), kies ĉefministro Lumumba estis murdita de Usono sub la flago de U.N. kaj la lando mem estas enĵetita en sangon.

Nun la karakterizaĵoj de la situacio en Azio kaj Afriko estas, ke tie la popolo daŭre antaŭenmarŝas profitante la akiritajn venkojn, plue disvolvante la kontraŭimperiisman batalon, kaj la agresaj fortoj, estrataj de la usona imperiismo, ne volas akcepti la malvenkon kaj provas reataki kaj barakti freneze. La usona imperiismo intensigas sian agreson al suda Vjetnamio kaj etendas la militon en la Nordon de Vjetnamio. Tiu lukto konsistigas gravan parton de la nuntempa kontraŭusona batalo de la popolo de

Azio kaj Afriko kaj de la mondo, kaj formas la fokuson de la lukto inter la pacaj fortoj kaj la militaj fortoj de la tuta mondo. La vjetnama popolo kun arda decidema revolucia patriotita spirito rebatas la usonan imperiismon kaj pelis Johnson en senlirejan marĉon. La tuta mondo hurlas unuvoĉe: “For usonajn murdistojn el suda Vjetnamio!”

Dum imperiistoj kaj koloniistoj ankoraŭ agresas kaj rabas diverslandajn popolojn, per sangaj rimedoj subpremante ilin en ilia batalo por sendependeco, demokratio kaj paco, paca kunekzistado estas detruata antaŭ ĉio de neniu alia ol imperiismo. Sendependeco, demokratio kaj paco estos sekuraj nur post kiam imperiismo kaj nova kaj malnova koloniismoj estos venkita kaj ĝisfunde eliminitaj.

BRILA ESTONTECO

La atingoj de la popolo de Azio kaj Afriko en la dek jaroj post la Bandung-konferenco estas grandiozaj. Kvankam imperiismo ankoraŭ baraktas, ĝi tamen jam fariĝis multe pli malforta ol antaŭ dek jaroj. Nun aperas senprecedence favora situacio al la popolo de Azio kaj Afriko por unuiĝi kaj batali kontraŭ imperiismo. La 29-an de junio ĉijare la 2-a Konferenco de Aziaj kaj Afrikaj Landoj okazos en Alĝer de Alĝerio. Ni kredas, ke en plifortigo de la unueco por persista batalado, en la lukto por komuna celo kaj kuna progreso la du kontinentoj havas antaŭ si perspektivojn pli brilajn ol iam ajn antaŭe.

Indoneziaj gejunuloj partoprenantaj la kunvenon varme aklamas al la registaraj ĉefoj kaj aliaj gvidantoj de azi-afrikaj landoj sur la prezidejo.





Prezidanto Maŭ Zedong legas landkarton en kaverna domo ĉe Ĝuguanĝaj, Ŝenhi-provinco.

LA

tadon. Tial, por sin liberigi la ĉina popolo povis nur kontraŭbatali la armitan kontraŭ-revolucion per armita revolucio.

LA Ĉina Popola Liberiga Armeo fondiĝis el la popolo, tutkore ĝin priservas kaj sin apogas sur ĝi.

Tiu ĉi popola armeo naskiĝis en 1927. Ekde tiam, sub la forta gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj k-do Maŭ Zedong, ĝi kreskis de malgrandeco al grandeco kaj de malforteco al forteco, kaj trapasinte 22 jarojn da eksterordinare malfacilega luktado, dum kiuj ĝi sieĝis la urbojn per la vilaĝoj, finfine ĝi venkis la koaliciajn fortojn de imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo kaj gajnis la venkon de la nacia demokratia revolucio. En 1949 fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko kaj malfermiĝis por Ĉinio la vojo al socialismo.

En la printempo de 1927 la ĉefo de la kuomintanga reakciularo Ĉiang Kajŝek, en koluzio kun imperiismo, lanĉis grandskalan buĉadon kontraŭ la komunistoj, revoluciaj laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj. Tiam estis ĝuste la tempo, kiam venke disvolviĝis la Norden-ekspedicio kune gvidata de la Kompartio kaj Kuomintango kaj malvenkis batalon post batalo la nordĉiniaj militaristoj — la lakeoj de imperiismo tiutempe regantaj Ĉinion. La floranta Granda Revolucio de Ĉinio estis mezvoje perfidita de la reakciularo kaj dronis en sango. Blanka teroro regis sur la tero de Ĉinio. Tiu ĉi dolora leciono instruis, ke la malamikoj de la ĉina popolo — imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo — estas fortaj kaj kruelaj. Dependante de la armitaj fortoj, ili regis la ĉinan popolon kaj subpremis la revolucion luk-

Je la 1-a de aŭgusto tiujare parto de la armeanoj en la Norden-ekspedicio sub la influo de la Komunista Partio de Ĉinio ribelis kontraŭ la teroro de Ĉiang Kajŝek en Nanĉang, orienta Ĉinio. Ĝi estis gvidata de k-doĵ Ĝoŭ Enlaj, He Long, Je Ting, Ĝu De, Liu Boĉeng k.a. La 1-a de aŭgusto estis poste fiksita kiel la memortago por la fondiĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

Proksimume unu monaton poste, en septembro, k-do Maŭ Zedong gvidis kamparanojn, laboristojn kaj soldatojn en la limregiono de Hunan- kaj Gianghi-provincoj por okazigi la Aŭtunan Ribelon. Li direktis la ribelintajn trupojn al la strategia Ginggang-monto en la apudeco kaj starigis tie la unuan revolucionan bazlokon. Kelkajn monatojn poste parto de la trupoj de la Nanĉang-ribelo gvidata de k-doĵ Ĝu De, Lin Biaŭ kaj Ĉen Ji kuniĝis sur Ginggang-monto kun la ribelintaj trupoj gvidataj de k-do Maŭ Zedong kaj fondiĝis la Kvara Armeo de la Ĉina Laborist-Kamparana Ruĝa Armeo.

La Ruĝa Armeo estis tre malbone ekipita. La milicaj trupoj organizitaj el la kamparanoj — helpantoj de la Ruĝa Armeo — plejparte havis kiel batalilojn nur lancojn, glavojn kaj ĉaspafileojn. Ili sin armis per la pafiloj kiujn ili kaptis de la malamikoj. K-do Maŭ Zedong hardis ĝin en armeon ĉiam venkantan. Li starigis la principojn por la konstruado de popola armeo kaj akomodigemajn strategion kaj taktikon.

POPOLA ARMEO DE ĈINIO

ĈENG PENG

En la rotoj de la Ruĝa Armeo stariĝis partiĉeloj, kiuj fariĝis la kernoj de solidareco kaj batalado. Komenciĝis ankaŭ politika laboro por konduki politikan edukadon al la armeanoj ke ili batalu por la laboristoj kaj kamparanoj. Interne de la armeo estis fiksita demokratia sistemo, kaj praktikiĝis la principoj ke la oficiroj kaj soldatoj estu unuanimaj kaj egale traktataj, la oficiroj ne devas bati aŭ insulti la soldatojn ktp.

Koncerne la rilatojn inter la armeanoj kaj popoloj, praktikiĝis la principo ke la armeanoj kaj popoloj estu unuanimaj. K-do

Maŭ Zedong difinis la “Tri Ĉefajn Regulojn kaj Ok Observojn”.

La “Tri Ĉefaj Reguloj” estas:

1. Agu ĉiam laŭ ordono;
2. Ne prenu de la popoloj eĉ kudrilon aŭ fadenon;
3. Donu al la kolektivo ĉion militakiritan.

La “Ok Observoj” estas:

1. Parolu afable;
2. Aĉetu laŭ justaj prezoj;
3. Redonu ĉion prunteprenitan;
4. Kompensu ĉion difektitan;
5. Neniun batu aŭ insultu;


Post la brila venko de Pinghing-pasejo, la kavalerio de la Okavoja Armeo ĉasas la japanan invadantan trupon.



6. Ne difektu agropiantojn;
7. Ne ŝercu maldece kun virinoj;
8. Ne turmentu militkaptitojn.

Koncerne la militarton, li difinis fundamentajn principojn de strategio kaj taktiko konforme al la situacio ke la malamikoj estas grandaj kaj fortaj dum ni estas malgrandaj kaj malfortaj. Interalie li skribis: “Rekonu ke gerila milito kaj gerileca movada milito estas la ĉefaj militformoj dum la periodo de la agrara revolucia milito; rekonu ke nur per la popola milito, en kiu la ĉeffortaj trupoj estas kombinitaj kun la lokaj trupoj, la regulaj armeoj estas kombinitaj kun la gerilaj kaj milicaj trupoj kaj la armitaj popolamasoj estas kombinitaj kun la nearmitaj popolamasoj, ni povos venki la malamikojn multoble pli fortajn ol ni mem.” “Oponu strategion de rapiddecida milito kaj longdaŭrajn kampanjojn; firme tenu strategion de longdaŭra milito kaj rapiddecidajn kampanjojn.” “Nia strategio estas ‘kontraŭbatali dek per unu’ dum nia taktiko estas ‘kontraŭbatali unu per dek’.” “La armeanoj estu disigitaj por mobilizi la popolamasojn kaj koncentrigitaj por trakti la malamikojn.” “Re-

Japanaj invadantoj kapitulacas al la Okavoja Armeo.



tiriĝu kiam la malamikoj antaŭeniĝas, ĝenu ilin kiam ili haltas, ataku ilin kiam ili lacas kaj postkuru ilin kiam ili retiriĝas.” “Rilate al la laboroj al la malamika armeo ni devas havi ĝustajn politikojn dispecigi ĝin kaj akiri la fidon de la militkaptitoj.”

En decembro 1929, en konferenco de la Partio okazigita en Gutian, Fugian-provinco, la sperto en la konstruado de la armeo estis resumita kaj rezolucio projektita de k-do Maŭ Zedong aprobita, ke la Ruĝa Armeo estu konstruita tute sur la bazo de marksism-leninismo. La rezolucio difinis, ke la Ruĝa Armeo devas esti armita kolektivo, kiu plenumas la politikajn taskojn de la Partio kaj samtempe la triunan taskon de batalado, popolamasa laboro kaj produktado.

La Ruĝa Armeo seninterrompe gajnis venkojn en malfacilegaj cirkonstancoj. Ĝi kreskis ĝis 300,000 homoj kaj starigis revoluciajn bazlokojn en pli ol dek provincoj.

En la periodo de 1930 ĝis 1934 Ĉiang Kajŝek lanĉis kvin “ĉirkaŭekstermojn” kontraŭ la Centra Revolucia Bazloko de la Ruĝa Armeo ĉe la limregiono de Hunan-, Gianghi- kaj Fugian-provincoj. La plej granda militforto, kiun li iam uzis, atingis milionon da homoj. Krome, li ricevis helpon de germanaj, italaj kaj japanaj militaj konsilistoj. Sekvante la ĝustan militan linion, la Ruĝa Armeo sukcese frakasis la unuajn kvar furiozajn ĉirkaŭatakojn kaj nur ĉe la kvina “ĉirkaŭekstermo” ĝi trafis seriozan malsukceson, ĉar la “maldekstraj” oportunismaj gvidantoj de la Komunista Partio adoptis eraran linion kaj forpuŝis k-don Maŭ Zedong kaj la ĝustan linion de li difinitan. La “maldekstraj” oportunistoj malgrandigis la tri taskojn de la Ruĝa Armeo en la nuran taskon de batalado. Ili postulis “ofensivon ĉe la tuta fronto”, neante gerilan militon kaj gerilecan movadan militon. Por trarompi la “ĉirkaŭekstermon” de la malamikoj kaj transiri al la nordo por kontraŭbatali la japanan armeon kiu tiutempe invadis Ĉinion, la Centra Ruĝa Armeo retiriĝis el la Centra

Bazloko en orienta Ĉinio en oktobro 1934 kaj komencis la 25,000-li-an Longan Marŝon senprecedencan en la historio.


Survoje de la Longa Marŝo la Partio okazigis la Konferencon de Zunji, kiu korektis la eraran gvidon, starigis la gvidantan pozicion de k-do Maŭ Zedong en la tuta Partio, kio garantiis la venkon de la Longa Marŝo kaj la postan rapidan disvolviĝon de la revolucia afero. La Ruĝa Armeo fine atingis la limregionon de Ŝenhi-, Gansu-kaj Ninghia-provincoj por rezisti la invadantajn japanajn agresantojn. Dum la Longa Marŝo la Ruĝa Armeo manifestis eksterordinaran heroismon kaj sagacon, frakasis la postkuron kaj ĉirkaŭbaron de centmiloj da malamikoj, venkis sennombrajn malfacilojn, transpasis la Neĝan Monton kaj trairis apenaŭ trapaseblan marĉozan stepon.

En julio 1937 eksplodis landskale la Kontraŭjapana Rezistmilito, kiu daŭris ok jarojn. Pro la postulado de la tuta popolo, Ĉiang Kajŝek, kiu retiriĝis batalon post batalo antaŭ la japanaj agresantoj, estis devigata denove kunlabori kun la Komunista Partio por kune rezisti la eksterlandajn malamikojn. Sed li alprenis la “pasive kontraŭjapanan kaj aktive kontraŭkomunistan” politikon.

La Komunista Partio gvidis la tutan popolon konduki ĝeneralan rezistmiliton. Ĝi sendis al la fronto trupojn de la popola armeo, kiuj iris profunden en la postfronton de la japana agresa armeo, senrezerve agitis la popolamasojn kaj disvolvis sendependan gerilan militon. Du monatojn post la eksplodo de la ĝenerala milito la popola armeo gajnis la unuan venkon kaj ekstermis la elitajn japanajn Itagaki-divizion kun tri mil malamikaj soldatoj mortigitaj, vunditaj aŭ kaptitaj. La batalo multe kuraĝigis la tutlandan popolon kaj firmigis ĝian fidon pri la fina venko de la rezistmilito. Dum la milito



En 1949, la Ĉina Popola Liberiga Armeo marŝas en Pekinon varme bonvenigate de la popolanoj.



En 1949, nia armeo okupis la sidejon de la “prezidanto” de Kuomintango en Nankino.

la popola armeo nomŝanĝiĝis en la Okavojan Armeon kaj la Novan Kvaran Armeon. En norda Ĉinio, orienta Ĉinio, centra Ĉinio kaj suda Ĉinio ili fondis ĉ. 20 kontraŭjapanajn bazlokojn, aŭ liberigitajn regionojn, en la malamika postfronto.

En ĉiuj tiuj liberigitaj regionoj stariĝis pole elektitaj lokaj koaliciaj registaroj, en kiuj

kunlaboris la komunistoj kaj la reprezentantaj personoj el la aliaj kontraŭjapanaj partioj. La fortoj de la tuta popolo estis mobilizitaj kaj ankaŭ produktado estis disvolvita. Ĉio ĉi ebligis al la liberigitaj regionoj, kiuj estis blokaj kaj atakataj havante nenian eksteran helpon, stari neskueble solidaj, subteni la longdaŭran militon, konstante malgrandigi la regionojn okupatajn de la malamikoj kaj grandigi siajn proprajn regionojn, kaj fariĝi modelo de la demokratia Ĉinio.

Komandantoj kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo gardantaj Ŝanhajon revenas de laborado en agrikultura popolkomunumo.



Kontraŭe, Ĉiang Kajŝek lanĉis tri kontraŭ-komunistajn kampanjojn kaj sendis siajn trupojn por grandskale ataki kaj sieĝi la liberigitajn regionojn dum la periodo de 1939 ĝis 1943. La Komunista Partio de Ĉinio elmetis la sloganojn: “Firmteni la rezistmiliton kaj kontraŭi kapitulacion; firmteni solidarecon kaj kontraŭi splitiĝon; firmteni progreson kaj kontraŭi regreson” kaj gvidis la tutlandan popolon por lukti kontraŭ la reakcio de Ĉiang Kajŝek. Dum la jaroj 1941 kaj 1942 la liberigitaj regionoj

spertis sian plej malfacilan tempon. La japanaj imperiistoj koncentrigis pli ol 60% de siaj agresaj trupoj en Ĉinio por ataki la liberigitajn regionojn en sia postfronto. Ili praktikis la politikon de “finbruligo, finmasakro kaj finrabo”. Kaj Ĉiang Kajŝek ordonis parton de siaj trupoj kapitulaci al la japanaj agresantoj kaj ataki la liberigitajn regionojn. Sub tiaj cirkonstancoj malpliigis la areo, loĝantoj kaj armeanoj de la liberigitaj regionoj kaj estiĝis en ili tre granda malfacilo. La Komunista Partio mobilizis la armeanojn kaj popolanojn en la liberigitaj regionoj por samtempe rebati la atakojn de la malamikoj kaj disvolvi grandskalan produktan kampanjon. Post unu aŭ du jaroj kreskis la produktokvanto de la grenoj. Ankaŭ la popolaj armeanoj kaj ŝtataj funkciuloj efektivigis sinprovizadon je parto de siaj bezonataj nutraĵoj kaj ĉiutagaj necesajoj.

Dum la okjara rezistmilito la popola armeo subtenate de la popolamasoj kondukis pli ol 125,100 batalojn kontraŭ la malamikoj kaj mortigis, vundis kaj kaptis pli ol 1,700,000 homojn de la japana kaj pupa armeoj. En 1945 kiam finiĝis la milito, ĝi kreskis de ĉ. 40,000 ĝis 1,300,000 homoj. Plivastiĝis ankaŭ la liberigitaj regionoj, kiuj havis entute 160,000,000 da loĝantoj.

Post la fino de la Kontraŭjapana Rezistmilito la usona imperiismo transprenis anstataŭe la pozicion de Japanio kaj intencis ŝanĝi Ĉinion

en usonan kolonion. Provi-
zante monon kaj pafilojn,
ĝi ordonis sian lakeon Ĉiang
Kajŝek ekstermi la armitajn
fortojn de la popolo.

En julio, 1946 Ĉiang
Kajŝek lanĉis landskalan
enlandan militon. Li havis
armeen de pli ol 4,000,000
da homoj kaj okupis la plej-
parton de Ĉinio kun ĉiuj
ĝiaj grandaj urboj, la plej-
parto de la fervojoj kaj pli
lo 500,000,000 da loĝantoj.
Li transprenis la ekipaĵojn
de 1,000,000 da japanaj
agresantoj. Dum la milito
de kvar jaroj Usono donis
al li armilojn por ekipi 45
diviziojn kaj monon kaj
provizaĵojn kiuj atingis la
sumon de 6,000,000,000 da
usonaj dolaroj. Krome,
90,000 usonaj martrupanoj
surbordiĝis ĉe gravaj urboj
en la apudmaraj regionoj
de Ĉinio kaj rekte helpis
Ĉiang Kajŝek.

En sia artikolo *La Nuna
Situacio kaj Niaj Taskoj* skri-
bita je la 25-a de decembro
1947, k-do Maŭ Zedong montris,
ke kaj la supereco de Ĉiang
Kajŝek en militaj fortoj kaj
la helpo de la usona imperiismo
estas faktoroj kiuj ludas rolon
nur provizoran dum la kontraŭ-
popola karaktero de la milito
kaj la simpatio aŭ antipatio de
la popolo estas faktoroj kiuj
ludas rolon konstantan. Patriota,
justa kaj revolucia, la milito
kondukata de la Popola Liberiga
Armeo certe akiros la subtenon
de la tuta popolo.

La Ĉina Popola Liberiga Armeo
praktikis la ĝustajn strategien kaj
taktikon kaj dek militajn principojn
difinitajn de k-do Maŭ Zedong,
inter kiuj estas la politiko de
operacioj ke en la komenca periodo
de milito la ĉefa celo estu ekstermi
la efikan forton de la malamikoj,
sed ne konservi aŭ preni urbojn
kaj lokojn, kaj koncentrigu superan
forton por ekstermi la malamikojn
parton post parto.



*Soldatoj de la Ĉina Popola Liberiga
Armeo lernas verkon de Maŭ Zedong.*

Dum unu jaro da batalado la Popola
Liberiga Armeo ekstermis 1,120,000
homojn de la malamika armeo kaj
tute disrompis la strategian
ofensivon de Ĉiang Kajŝek.

Por batalakiri ĝisfundan venkon
de la liberiga milito, la Komunista
Partio de Ĉinio alprenis la jenajn
rimedojn: agrara reformo estis
efektivigita en la liberigitaj
regionoj, por ke la kamparanoj
estu emancipitaj el sub la feŭda
subpremado kaj ekspluatado kaj
ili estu plene mobilizitaj, tiel ke
la postfronto de la armeo fortiĝis
kaj forta subteno de la kamparanoj
al la liberiga milito estis akirita;
kampanjo de ideologia edukado
estis lanĉita en la Komunista
Partio kaj la rilatoj inter la
Partio kaj la popolamasoj estis
fortigitaj; ideologia edukado
estis entreprenita ankaŭ en la
popola armeo, tiel ke la klasa
konscio de la armeanoj estis
altigita kaj la rilatoj inter la
oficiroj kaj

soldatoj kaj tiuj inter la armeanoj kaj la polanoj estis pluapaŝe intimigitaj.

De julio, 1947 la Popola Liberiga Armeo jam povis transiri de strategia defensivo al strategia ofensivo kaj gajnis batalon post batalo multajn venkojn.

En la periodo de novembro, 1948 ĝis januaro, 1949 okazis tri grandaj decidigaj kampanjoj, t. e., la Liaŭhi-Ŝenjang-a Kampanjo en la Nordoriento, la Huaj-Haj-a Kampanjo en orienta Ĉinio kaj la Bejping-Tiangin-a Kampanjo en norda Ĉinio, dum kiuj entute ekstermiĝis ĉirkaŭ 1,500,000 homoj de la armeo de Ĉiang Kajŝek kaj rompis la spinon de liaj militaj fortoj. Poste la Popola Liberiga Armeo transiris Jangzi-riveron, venkoprenis Nankinon kaj finfine liberigis la tutan ĉinan teritorion escepte de Tajvan kaj kelkaj aliaj insuloj.

Dum la kvarjara milito la Popola Liberiga Armeo ekstermis entute pli ol 8,000,000 da homoj de la armeo de Ĉiang Kajŝek.

Depost la 1-a de oktobro, 1949 kiam fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko, la Popola Liberiga Armeo rapidigis sian konstruadon de moderna, revolucia, popola armeo. En la pasinteco ĝi havis nur terarmeon. Nun ĝi havas krome aerarmeon kaj mararmeon. Kun milita tekniko seninterrompe plialtiĝanta kaj ekipaĵo seninterrompe pliboniĝanta, ĝi estas sinteza armeo kun diversaj armeaj kaj trupaj specoj.

Dum la lastaj kelkaj jaroj la Popola Liberiga Armeo resumis la abundan sperton akiritan ekde la fondiĝo de la armeo kaj la politiko-ideologia laboro ricevis pluapaŝan plifortigon. Ĝi alte tenas la ruĝan flagon de la pensoj de Maŭ Zedong, pluapaŝe armas la komandantojn kaj batalantojn per la pensoj de Maŭ Zedong kaj firmtenas ke la pensoj de Maŭ Zedong komandu en ĉiaj laboroj; ĝi postulas ke ĉiuj legu la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultu liajn vortojn, laboru laŭ lia direkto kaj fariĝu liaj bonaj batalantoj. Ĝi firmtenas la kvar "Unua"-jn: en traktado de la rilatoj inter armilo kaj homo la faktoro de la homo okupu la unuan lokon; en traktado de la rilatoj inter politikaj laboroj kaj aliaj laboroj la politikaj laboroj okupu la unuan lokon; en la

politikaj laboroj la ideologiaj laboroj okupu la unuan lokon; en la ideologiaj laboroj traktado de la vivaj pensoj okupu la unuan lokon. Ĝi firmtenas la "Tri-ok"-laborstilon: "tri" signifas la tri devizojn firmteni la ĝustan politikan direkton, havi peneman kaj simplan laborstilon kaj esti akomodigema en strategio kaj taktiko; "ok" signifas la ok ideografiaĵojn kiuj signifas solidarecon, streĉecon, seriozecon kaj vigecon. Ĝi praktikas demokration en politiko, ekonomio kaj militaj aferoj. Ĝi disvolvas la movadon de "roto kun kvar bonoj": bona en politikaj pensoj, bona en la "Tri-ok"-laborstilo, bona en milita trejnado kaj bona en zorgo pri la ĉiutaga vivo. Ĉio ĉi ege akcelas la proletigon kaj batalpretigon de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

La Popola Liberiga Armeo ĉiam estas batala trupo. Dum la unuaj du jaroj post la fondiĝo de la respubliko ĝi bone plenumis la taskon likvidi la postrestantojn de la bandita armeo de Ĉiang Kajŝek sur la ĉina ĉeftero. Poste ĝi ekstermis de tempo al tempo la trupanojn kaj anojn de speciala servo de Uson-Ĉiang-kliko, kiuj entrudiĝis en Ĉinion por malordigo kaj subfosado. Ĝi diligente sin hardas ne malstreĉiĝante eĉ unu momenton kaj seninterrompe plialtigas sian militan teknikon. La Popola Liberiga Armeo ĉiam estas ankaŭ laboranta trupo. Ĝi praktikas propagandan laboron inter la popolanoj kaj seninterrompe plifortigas la rilatojn inter la armeanoj kaj popolanoj. Ĝi aktive partoprenas en la industria kaj agrikultura konstruado de la patrio. Per ĝia laboro multe da virga tero estas ekkulturita kaj multe da farmoj starigitaj. Granda nombro da trupoj jam povas sin provizi je ĉiom da legomoj kaj viandoj kaj parto de grenoj. Krome, la Popola Liberiga Armeo partoprenas ankaŭ en la konstruado de fervojoj kaj grandaj akvorezervejoj k. s.


Dank' al tiu ĉi popola armeo la ĉina popolo venkis la fortajn malamikojn enlandajn kaj eksterlandajn kaj akiris sian liberiĝon en la pasinteco. Nuntempe ĝi kredas, ke ĝi povas dependi de tiu ĉi popola armeo por gardi la fruktojn de la venko kaj la socialisman konstruadon kaj fari pozitivajn kontribuojn en defendo de la mondpaco.

NOVAJ ATINGOJ DE LA TABLOTENISA TEAMO DE ĈINIO

ĜANG ĜONGBI

La premiitoj en la virina kolektiva konkurso: a ĉina teamo — la ĉampioneco (meze), la japana teamo — la dua ĉampioneco (maldekstre), la angla teamo — la tria ĉampioneco (dekstre).





La premiitoj en la vira kolektiva konkurso: la ĉina teamo — la ĉampioneco (meze), la japana teamo — la dua ĉampioneco (maldekstre), la teamo de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio — la tria ĉampioneco (dekstre).

POST streĉa kaj intensa luktado la junaj gesportistoj de la ĉina tablotenisa teamo akiris kvin ĉampionecojn en la 28-a Monda Ĉampioneca Turniro de Tabloteniso ĉijare, nome: de la vira kolektiva konkurso (Swaythling-pokalo), virina kolektiva konkurso (Corbillon-pokalo), vira unuopa konkurso (St. Bride-pokalo), vira duopa konkurso (Iranapokalo), virina duopa konkurso (W. J. Popepokalo), kune kun kvar duaj kaj sep triaj ĉampionecoj. Ili skribis novan brilan paĝon en la historio de ĉina tablotenisa ludo. La ĉina popolo estas tute ĝojigita kaj entuziasmigita kaj sentas gloron kaj fieron pro ili.

Ankaŭ la obstina batalvolo, kuraĝeco kaj malcedemo en luktado, elasta kaj konscienca ludstilo, nobla kondutado kaj varmkoreco, amikeco kaj modesteco de la ĉinaj gesportistoj estas laŭditaj de la vasta amaso de rigardantoj.

La nomita monda ĉampioneca turniro okazis de la 15-a ĝis la 25-a de aprilo en Ljubljana, Jugoslavio. La turniro, okazigata en ĉiu dua jaro, kunvenigis al si ĉi-jare entute tablotenisajn teamojn el 46 landoj, inter kiuj 43 parto-

prenis la viran kolektivajn konkursojn kaj 31 la virinajn kolektivajn konkursojn.

Streĉa luktado komenciĝis tuj post la inaŭguro de la turniro en la sportejo de Ljubljana en la 15-a de aprilo. Multaj eventoj montris ke la vojo de la ĉinaj tablotenisistoj al la ĉampionecoj estas tre malglata. En la lastaj jaroj la tablotenisa ludarto flugrapide progresis internacie. Aperis multaj novaj tablotenisistoj kun alta ludarto kaj multaj debutintoj maturiĝis. Teamoj de multaj landoj plifortigis sian batalforton kaj vicaron. En tia situacio la ĉinaj getablotenisistoj trabatis por si vojon al la grandaj atingoj venkante diversajn fortajn rivalojn.

Oni ankoraŭ memoras ke en la tempo de la fondiĝo de la nova Ĉinio la bazo de ĝia tablotenisa sporto, same kiel tiu de aliaj sportoj, estis tre malforta kaj la teknika nivelo postrestis je granda distanco kompare kun aliaj progresintaj landoj. Tamen, dank' al la zorgado de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la registaro tiu sporto progresis kompare rapide en la sekvintaj jaroj. Precipe en 1958, la spirito

de la Granda Antaŭensaltego kaj la Ĝenerala Linio kuraĝigis la tutan popolon kaj ankaŭ la tablotenisistojn. De tiu tempo ili starigis la spiriton “kuraĝi venki kaj lerte batali” pene strebis al fortiĝo kaj diligente lernis kaj sin ekzercis, kio impete progresigis la teknikon de tabloteniso.


En la 25-a Monda Ĉampionea Turniro de Tabloteniso en 1959 Ĵong Guotuan de la ĉina teamo akiris la ĉampionecon de vira unuopa konkurso. Per tio unuafoje enskribiĝis la nomo de ĉino inter la nomaro de mondaj ĉampionoj. En la sama turniro la ĉina teamo akiris ankaŭ la triajn ĉampionecon por la vira kaj virina kolektivaj konkursoj.

Tiuj sukcesoj estis atingoj de la Granda Antaŭensaltego kaj treege kuraĝigis kaj antaŭenpuŝis la disvolviĝon de la tablotenisa sporto en Ĉinio.

Tiutempe, ili diskutis la demandon, pro kio kaj kun kia spirito oni ludu tablotenison en la flugrapida disvolvo de la socialisma konstruo kaj socialisma revolucio en nia lando. Tra la diskutado la tablotenisistoj klare vidis, ke oni devas ludi tablotenison kun revolucia spirito por glorigi la patrolandon. Tio servis al ili kiel solida bazo por levi ilian teknikan nivelon. Tiamaniere la ĉina tablotenisa teamo rapide maturiĝis. Mejlŝtono sur la vojo de maturiĝo estis la 26-a Monda Ĉampionea Turniro de Tabloteniso okazinta en Pekino, 1961. Tiutempe la teamo havis en si kaj veteranajn gesportistojn kaj debutantajn “tigretojn”, kiuj kuraĝis lukti kaj ĉionspiti. En tiu turniro ili akiris tri el la sep ĉefaj ĉampionecon kaj kelkajn duajn kaj triajn ĉampionecon.


La venkoj estis ĝojindaj kaj gratulindaj. La ĉina popolo havis grandan amon kaj esperon al sia tablotenisa teamo. Kaj la ĉinaj sportistaj rondoj prenis la tablotenisan teamon kiel sian modelon de lernado. Tiu pozicio estas glora kaj ankaŭ malfacila, ĉar kiel dirite “ne-facile estas akiri ĉampionecon, sed pli malfacile estas konservi ĝin”.

Kion fari? Antaŭ gloro kaj en tempo de venko la teamanoj firme tenis en la memoro la instruon de Prezidanto Maŭ: “Modesteco igas homojn progresi kaj fiereco igas homojn postresti.” Ili klare gravuris en sian menson la sloganon: “La gloro de la patrolando, en la unua loko.” Alte levante la flagon de seninterrompa revolucio, ili decidis konservi kaj strebi al pli granda honoro.



Supre: La ĉina sportisto Ĝuang Zedong (dekstre) venkis la japanan Hiroŝi Takahaŝi per 3:0 en la vira unuopa konkurso.

Sube: La ĉina sportistino Lin Hujking (maldekstre) kaj la japana Naoko Fukazu ludas en streĉa maĉo.



Krei sian propran stilon estas la klara celo de la ĉina tablotenisista teamo. Ĉiuj progresintaj spertoj kaj teknikoj estis lernataj, sed la lernado estas por kreado, ĝi ne devas esti senŝanĝa alprenado aŭ kopiado, des pli ne sintrenado post alies postaĵo. Por krei proprajn teknikojn, taktikan principaron kaj trejnometodon la ĉina tablotenisista teamo agis laŭ la principo "floru kune cent floroj", t. e., disvolvi kaj la vertikale-tenan ludstilon de "rapideco, ĝusteco, forteco kaj varieco" kaj la horizontale-tenan ludstilon kun sekura defendo, malalta tranĉfrapo, lerta varia turno kaj ambaŭflanka atako. Estas disvolvataj samtempe ĉiuj skoloj, ĉu vertikale-tenaj, ĉu horizontale-tenaj, por ke ili povu interakceli kaj konkuri. Ĝuste tiel ili pene lernis kaj trejnis sin akirante serion kaj serion da mirindaj teknikoj.

Pasis du jaroj. La diligenta penado de la ĉinaj getablotenisistoj fine rikoltis sian frukton. En la 27-a Monda Ĉampioneeca Turniro de Tablotenis la ĉina teamo refoje akiris la tri ĉampionecojn de la viraj konkursoj. Ankaŭ la teamaninoj akiris brilajn atingojn.

En la 28-a Monda Ĉampioneeca Turniro la ĉina teamo atingis pli grandajn sukcesojn. En tri sinsekvaj fojoj ĝi tenadas la ĉampionecon de vira kolektiva konkurso kaj Ĝuang Zedong la ĉampionecon de vira unuopa konkurso. La decidema kaj obstina batalvolo antaŭ fortaj














































rivaloj kaj vivplena ludstilo de "tigreto" de ĝiaj viraj membroj kaj ilia eminenta tekniko... vekis varmajn laŭdojn inter la spektantoj.

La virinaj membroj kun meznombra aĝo de 21 jaroj estas aparte atentindaj. Post intensa luktado en tiu ĉi turniro ili fine venkis la japanan virinan teamon, kiu konservis jam kontinue kvar fojojn la ĉampionecon de virina kolektiva konkurso. Per tio ili unuafoje gajnis por Ĉinio Marcel Corbillon-pokalon. Ili skribis novan paĝon ne nur en la tablotenisista historio de Ĉinio sed ankaŭ en tiu de la mondo. La rapida progreso de la ĉinaj tablotenisistinoj mirigis la publikon.

En la 27-a Monda Ĉampioneeca Turniro la junaj ĉinaj tablotenisistinoj malvenkis antaŭ la fortaj rivaloj. Sed ili ne malesperis pro la malvenko, male ili starigis por si kiel celon gajni la mondan ĉampionecon. Ili resumis siajn spertojn kaj instruojn kaj lernis de la viraj tablotenisistoj. Ili penegis malfacile por ellerni ludarton tute solidan, ŝparante neniun klopodon por akiri ĉiun plian progreson. Post du jaroj ili jam aperas kun tute nova fizionomio. Krom la ĉampioneco de kolektiva konkurso ili akiris ankaŭ la ĉampionecon de virina duopa konkurso.

El iliaj brilaj atingoj oni ĝoje vidas ke novuloj de ĉina virina tablotenisista sporto rapide maturiĝas.

Atingoj de Ĉinaj Sportistoj en Mondaj Ĉampioneecaj Turniroj de Tablotenis

La Koncerna Monda Ĉampioneeca Turniro de Tablotenis	La 20-a en 1953	La 23-a en 1956	La 24-a en 1957	La 25-a en 1959	La 26-a en 1961	La 27-a en 1963	La 28-a en 1965
Vira Kolektiva Konkurso	la X-a	la VI-a					
Virina Kolektiva Konkurso	la III-a de la 2-a klaso	la XI-a					
Vira Unuopa Konkurso					  	  	  
Virina Unuopa Konkurso					 		 
Vira Duopa Konkurso						  	  
Virina Duopa Konkurso					 		 
Gevira Duopa Konkurso					 		 

Signoj:

Ĉampioneco



Dua Ĉampioneco



Tria Ĉampioneco






Supre maldekstra: Eta spektanto pasie kisas trejniston Fu Kifang de la Ĉina Tablotenisa Teamo.

Sube maldekstra: Ĝuang Zedong (la dua de dekstre) kaj la sportistoj de la Demokratia Popola Respubliko de koreio.

Supre dekstra: Rigardantoj petas subskribojn de la ĉina sportistino Liang Liĝen por memoro.

Sube dekstra: La ĉina sportisto Ĝang Hielin (dekstre) kaj la indonezia A. L. Maradi interŝanĝas spertojn.



La Ministerio de Poŝto kaj Telekomuniko de la Ĉina Popola Respubliko emisiis je la 25-a de aprilo, 1965, serion da memorigaj poŝtmarkoj en koloroj pri la 28-a Monda Ĉampionea Turniro de Tablotenisio.




El la Vivo de Ĉinaj Tablotenisistoj

Maldekstre:

- 1. Hju Jinŝeng, ĉina tablotenisisto, studas verkon de Maŭ Zedong.*
- 2. Interbabilo kun amikoj el Gvineo.*
- 3. Novjaraj salutkartoj alsenditaj de diverslokaj popolamasoj.*

Ekskurso sur lago.



EDUKSISTEMO DE NOVA TIPO

EN la nova Ĉinio aperis kaj disvolviĝas en la urbo kaj kamparo novtipaj lernejoj, en kiuj estas kombinitaj la edukado kaj produktita laboro. Tiaj lernejoj funkciigataj en urboj estas nomataj duonlabora-duonlerna lernejo; tiuj en kamparoj estas nomataj duonterkultura-duonlerna lernejo. La lernantoj en tiuj lernejoj lernas en klasĉambro dum duono de sia tempo kaj la alian duonon, ili pasigas laborante en laborejoj aŭ sur kampoj.

La starigo de tiaj lernejoj kreis favoran kondiĉon por enlernejigi la vastan infanaron de la laboranta popolo kaj por ĝeneraligi la edukadon kaj levi la kulturen nivelon de la laboranta popolo. La plej granda avantaĝo de tiaj lernejoj en la eduka laboro estas la strikta kombino de teorio kaj praktikado: la lernantoj povas, unuflanke, akiri sisteman scion de kulturo, scienco kaj tekniko kaj, aliflanke, ankaŭ ellerni produktan arton en praktika produktita laboro, tiel ke ili fariĝos plene evoluintaj novtipaj homoj, kiuj kapablos plenumi korpan laboradon kaj havos ankaŭ kulturon kaj teknikon.

Kvankam tiaj lernejoj nun ankoraŭ troviĝas en sia eksperimenta stadio, sed ilia apero jam trovis altan priatenton ĉe la Partio kaj bonvenigon ĉe la vastaj amasoj de laboristoj kaj kamparanoj. Ilia nombro estas kreskanta kaj ilia supereco ĉiam pli bone manifestiĝanta.

I

La nova Ĉinio estas socialisma lando kun 650-miliona loĝantaro. Ĝia eduka laboro devas servi al la politiko de la proletaro kaj la laboranta popolo kiu konsistigas la plejparton de la tuta loĝantaro, kaj devas kontentigi la bezonon de la vastaj amasoj de malriĉ- kaj malsuperaj mez-kamparanoj* por ke iliaj infanoj havu ŝancon esti sufiĉe edukitaj. Dum la dek ses

jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, sub la gvido de la Partio kaj la popola registaro la eduka laboro estis plenforte disvolvata. Oni elspezis ĉiujare grandajn sumojn por funkciigi tuttagajn lernejojn, superajn, mezajn kaj elementajn kaj alispecajn. Tiel la nombro de lernantoj kreskis gigante. Tamen, tiuj lernejoj ne povis plene solvi la problemon de edukado de la lernejaĝaj infanoj kaj junuloj, kiuj nombras je pli ol cent milionoj. Tiu problemo povas esti solvita nur per apliko de diversaj edukformoj, kiaj duonterkultura-duonlernaj elementaj lernejoj, agrokulturaj mezlernejoj kaj mezgradaj agronomiaj lernejoj, kaj per plibonigo de la tuttagaj lernejoj, ktp. Kaj nur tiel la edukado en nia lando povas esti ne nur rapide ĝeneraligita, sed ankaŭ esti levita al pli alta nivelo sur la bazo de la ĝeneraligo.

La naskiĝo kaj disvolviĝo de la duonlabora-duonlerna kaj duonterkultura-duonlerna lernejoj ja ĝuste respondas al tiu postulo.

Tiuj lernejoj malfermis vojon al la solvo de tiu problemo. La lernantoj tie lernas kaj laboras, tiel ke ili estas edukataj kaj samtempe kreantaj riĉon por la lando per sia laboro. Tiu nova faktoro antaŭ ĉio ebligas al pli da infanoj de la laboranta popolo daŭrigi sian lernadon. Due, la lernantoj ricevas certan rekompencan pro sia laboro, kaj tio reduktas la ekonomian ŝarĝon de iliaj familioj kaj forigas gravan malhelpon de enlernejigo de la infanoj de la laboranta popolo. Sekve, la apliko de tiu edukosistemo povas samtempe eduki konstruantojn por la lando pli multe, rapide, bone kaj ekonomie, kaj havigi ŝancojn de lernado al la infanoj de la vasta laboranta popolo.

* *Malriĉ- kaj malsuperaj mez-kamparanoj prezentas klasecojn difinitajn dum la agrara reformo.*

II

La celo de la edukado en la nova Ĉinio estas plene disvolvi la edukatojn morale, intelektu kaj korpe, por ke ili fariĝu laboruloj kun socialisma konscio kaj kun kulturo. Tio estas esenca diferenco inter la edukadoj socialisma kaj kapitalisma. Sed, kiel oni povas atingi sian celon, ke la infanoj kaj junuloj fariĝu laboruloj kun socialisma konscio kaj kun kulturo? La praktiko montras ke la duonlabora-duonlerna kaj duonterkultura-duonlerne lernejoj havas grandan avantaĝon por tio. Laŭ la vidpunkto de longa periodo la apliko de tiu eduksistemo povas elkulturi plene disvolvitajn novtipajn homojn, kiuj povas plenumi korpan laboron kaj samtempe havas kulturon kaj teknikon, kaj kreas kondiĉon por elimini la diferencojn inter mensa laboro kaj korpa laboro. En la jam funkciantaj lernejoj laŭ la sistemo de duonlaboro-duonlerno kaj duonterkulturo-duonlerno, oni povas vidi ke, ĉar la instruistoj kaj lernantoj en tiuj lernejoj, estante samtempe homoj praktike partoprenantaj produktajn laborojn, havas pli da ŝancoj plenumi klasbatalojn, produktajn luktojn kaj sciencajn eksperimentojn, ili povas pli bone konkretigi la principojn de edukado en la servo al la proleta politiko kaj de kombino de edukado kun produktita laboro, kaj ili povas esti ĉiam kaj ĉie hardataj ideologie kaj fiziklabore.

Ĉar ili vivas, cetere, rekte inter laboristoj kaj kamparanoj, ili estas influataj en sia ĉiutaga vivo de la pensoj de la laboranta popolo, kaj povas pli facile starigi en si la penson kaj senton de laboranta popolo kaj la proletan vivkoncepton. Tial ili povas pli facile fariĝi daŭrigantoj de la revolucio, heredantaj la aferon de proleta revolucio kaj persistantaj en ĝi.

III

Iuj eble dubas, ĉu la lernado de la lernantoj en tiuj lernejoj ne estas malhelpata pro tio ke ili devas uzi duonon de sia tempo por korpaj laboroj. Laŭ la atingoj de la nun funkciantaj lernejoj de la nomita sistemo, la respondo estas nea.

Multaj faktoj montras ke, ĉar en tiuj lernejoj la teorio estas strikte kombinita kun la praktikado kaj ĉio lernita estas uzata, la ler-

nantoj povas praktike ekzameni siajn sciojn lernitajn en la klasĉambro kaj trovi pruvojn por ili dum sia laborado en laborejoj kaj sur kampoj. La lernitaĵoj tiel povas pli profunde eniĝi en la kapon de la lernantoj kaj estas utildonaj; krome tio ankaŭ senĉese instigas la instruistojn plibonigi la kvaliton de sia instruado. Prezidanto Maŭ iam diris: "Estas du specoj de nekompletaj scioj. Iuj estas tiuj skribitaj en la libroj, la aliaj estas tiuj, kiuj estas ĉefe perceptaj kaj limigitaj en partoj. Ambaŭ specoj havas sian unuflankecon. Bonaj, kompare kompletaj scioj povas naskiĝi nur en kombino de ambaŭ tiuj scioj." Tiuj vortoj inspiras multon al la laborantoj kaj lernantoj de tiuj lernejoj en ilia laborado kaj lernado respektive. Fakte la eduka laboro de tieaj instruistoj estas jam farate en kombino de teorio kun praktiko kaj ankaŭ la lernado de tieaj lernantoj estas kombinita kun praktiko. Tio evitas la malsanojn instrui kaj lerni seke, "engluti parkere librosociojn" kaj "manko de rilato inter lernado kaj praktiko". Tiel la efiko de instruado kaj lernado multe kreskas, kaj kiam la lernantoj surpaŝas laborpostenon, ili tuj jam povas labori memstare kaj ludas sian rolon. Tio multe kontribuas al disvolviĝo de produktado kaj progreso de la tuta socio.

IV

La socialisma konstruado en la nova Ĉinio eniros novan periodon de disvolviĝo. En la industria kaj agrikultura produktado aperas nova situacio de plenampleksa leviĝo. En tia cirkonstancaro la eduksistemo duonlabora-duonlerna kaj duonterkultura-duonlerna tute respondas al la bezonoj de nia lando, kiu estas vasta kaj multhoma kaj karakterizata per "malriĉeco kaj malpleneco", kōnformas al nia ĝenerala principo sin apogi sur la propraj fortoj, strebi pene al prosperiĝo, konstrui la landon diligente kaj ŝpareme, lukti kuraĝe kontraŭ ĉiuj malfaciloj por disvolvi nian nacian ekonomion, kaj povas kontentigi la bezonojn de la laboro por ĝeneraligi la edukadon, rapide elkulturi teknikajn laborantojn kaj novtipajn laborulojn kiuj kapablas labori mense kaj korpe kaj havas socialisman konscion kaj kulturon. Tial tiu eduksistemo havas antaŭ si brilajn kaj vastajn perspektivojn.

"INDIGNAJ FLAMOJ EN KOKOSARBARO" KANTODANCO



Strategia Vilaĝeto — La usonaj agresantoj faris sudan Vjetnamion surtera infero, sed kontraŭ ili flamas la indignego de la popolo de suda Vjetnamio.

Foto de Ŝang Gin

Tiu ĉi kvarscena kantodanco spegulas la batalon de la vjetnama popolo kontraŭ la usona agreso por savo de la patrio. Ĝi indigne malkaŝas la kruelan bestaĵon de la usona imperiismo, arde pri-kantas la grandan batalon de la 30.000.000 heroaj vjetnamaj popolanoj, unuigitaj en la firm-decida kaj venkocerta batalo por liberigi la Sudon, defendi la Nordon kaj unuecigi la patro-landon kaj montras ke la usona imperiismo, ŝajne forta sed fakte febla, certe falos en malvenkō.



Indignaj Flamoj en Kokosarbaro — Eksplodis indignego de la popolo de suda Vjetnamio. Profunde en kokosarbaro, brilas glavoj kaj lancoj. La heroaj popolanoj de suda Vjetnamio disetendis neeskapeblan retot kaj faris la belan kokosarbaron tombejo de la agresantoj.

Foto de Ŝang Gin



Defendi la Nordon — La usonaj agresantoj etendis la militfajron al la Nordo de Vjetnamio bombante ĝin furioze. Tio ne povas timigi la heroan popolon de Vjetnamio, sed kontraŭe, detruis la miton pri “supereco en aero” de la usona imperiismo. Unu post alia falis ĝiaj aviadiloj pro la forta pafado.

Foto de Peng Gjun



epre Venki la Agresantojn — La popolo de Vjetnamio, forte unuiĝu ĉirkaŭ la Vjetnama Laborista Partio kaj Prezdanto Ho Chi Minh, firmdecide kontraŭbatalu kaj forpelu la usonajn imperiistojn el Vjetnamio!

Foto de Peng Gjun

"RUĜA VIRINA TAĈMENTO"

BALEDO

Fotoj de Aŭ Enhong



Kionghua kaj la rotestrino



Vidinte la sloganon "For Nanbattian!" kaj ke la popolamaso indigne akuzas lin pri la inferaj krimagoj, Kionghua profunde kortuŝiĝis kaj tuj ekakuzis kun fajra indigno de malamo.

Kionghua pafas al Nanbatian.



La ruĝa armeo ekokupis la domon de Nanbatian kaj liberigis la vilaĝon Jelin.



“RUĜA VIRINA TAĈMENTO”

Nova Disvolviĝo de la Baledo en Ĉinio

“RUĜA Virina Taĉmento” estas nia unua mem verkita baledo, kiu respegulas nuntempan revolucionan batalon kaj kies herooj estas laboristoj, kamparanoj, kaj soldatoj. Ĝia apero sur scenejoj de Ĉinio signifas, ke tiu ĉi dancarto, deveninta el Eŭropo, jam komencas reformiĝi en konsistigan parton de la socialisma revolucia arto de Ĉinio.

La temo de ĉi tiu baledo estas adaptita el la samnoma kino-scenaro, kiu rakontas la bataladon de virina gerila taĉmento en Hajnan-insulo de Guangdong-provinco dum la dua interna revolucia milito (1927-1937). La baledo pentras energie la travivaĵojn kaj kreskadon de la batalantino Kionghua, spegulas la tiamajn kruelan klas-premon kaj malfacilan revolucionan batalon, kaj la revolucionan spiriton de la ĉinaj virinoj kuraĝe ribeli kaj batali. En la komenco de la baledo jam manifestiĝas la nefleksebla batalvolo de Kionghua: en la karcero de la tirana bienulo Nanbatian ŝi puŝfaligas la lakeon de la bienulo ŝin torturantan, kaj forkuras de tie. Sed malfeliĉe ŝi estas kaptita survoje. Kru-elege torturite de la tirana bienulo, ŝi svenas kaj estas forlasita en sovaĝa arbaro. Reakirinte la konscion, ŝi renkontiĝas kun Hong Ĉangking, la politika direktoro de virina gerila taĉmento la “Ruĝa Virina Roto”, kiu, alivestita, descendas la monton por

plenumi iun mision. Li do direktas ŝin partopreni la Ruĝan Armeon.

Kionghua fariĝis batalantino de la “Ruĝa Virina Roto”. Iom poste la roto faras planon ekstermi la reakcian bandon de Nanbatian. Laŭplane Hong Ĉangking, alivestinta sin ĉina elmigrinto revenanta por viziti parencojn, penetras en la neston de Nanbatian sub la preteksto partopreni la celebradon de lia naskiĝtago, por kunagado de interne dum batalo. Sed, kiam Kionghua alivestita venas en la domon de Nanbatian por interligiĝi kun Hong, hazarde ŝi renkontas Nanbatian. Ne povante subpremi sian venĝemon, ŝi tuj ekpafas kaj vundas lin. Ĉi tiu faro tro frue malkaŝas kaj detruas la originan planon, tiel ke Nanbatian eskapas tra tunelo.

Kionghua, eskapinta el la domo de Nanbatian, estas kuratingita kaj batata de la lasta survoje. Ŝi kolere luktas kontraŭ Nanbatian.





Kionghua luktas kontraŭ lakeo.

Sub la edukado de la Kompartio kaj siaj kamaradoj, Kionghua prenas la lecionon kaj profunde konscias la gravecon de sia eraro. Ŝi ekkonscias, ke la celo de la revolucio estas faligi radikale imperiismon, feŭdismon kaj burokratan kapitalismon, kiuj pezas sur la kapoj de la ĉina popolo, sed ne venĝi nur sin mem pro siaj individuaj suferoj. Pli poste, en alia batalo, la Nanbatian-banditoj, en kunagado kun la reakcia armeo de Ĉiang Kajŝek, grandskale atakas la bazlokon de la Ruĝa Armeo. Por frakasi la atakon de la malamikoj, la ĉefaj fortoj de la Ruĝa Armeo ĉirkaŭiras por surprizataki de flanke la neston de Nanbatian kaj la aliaj malmultaj gebatalantoj sub la gvido de Hong baras la malamikojn por ŝirmi la agadon de la ĉefaj fortoj. Dum batalado Hong estas kaptita de la malamikoj pro vundo. Tiam la Ruĝa Armeo jam paŝon post paŝo alproksimiĝas al la nesto de Nanbatian. La bandito Nanbatian vane minacas al Hong, ke tiu ĉi skribu leteron al la Ruĝa Armeo, ke ĝi retiriĝu. Hong tion rifuzas kategorie kaj heroe ofertas sian vivon. Post kiam la Ruĝa Armeo ekstermis la banditojn, eksciinte lian morton, ĉiuj batalantoj ekstreme malĝojiĝas kaj ekindignas. Ili ĵuras heredi la volon de la martiro kaj daŭrigi la revolucion ĝis la fino.

Kionghua prenas sur sin la taskon de politika direktoro de la virina roto. Pli da virinoj aliĝas al la Ruĝa Armeo. La Ruĝa Virina Taĉmento senĉese plifortiĝas kaj disvolviĝas.

La historio de ĉi tiu baledo montras la altan revolucionan spiriton de la laboristaro kaj kamparanaro de Ĉinio, kaj ilian maltimon al sinofero. Streĉa estas ĝia intrigo kaj vivece pentritaj estas la figuroj de ĝiaj herooj, inter kiuj la figuroj de la du proletaj herooj, la batalantino Kionghua kaj la gvidanto de la gerila taĉmento Hong Ĉangking, estas la plej plastikaj. La forta klas-malamo kaj la kreskado de Kionghua, la sindonemo kaj la ĝismorta fideleco al la afero de la proletara revolucio de Hong Ĉangking ja estas manifestitaj tre profunde.

La esprimformoj de la eŭropa baledarto maturiĝis per la mamnutrado de la pensfluo de la eŭropaj romantikaj literaturo kaj arto kaj tial havas romantikan karakteron; ili nature ne estas tute konformaj al la heroeca karaktero kaj nacieca temperamento de la socialismaj herooj sur la scenejoj de la hodiaŭa Ĉinio. Ne renovigite, ili do ne povas akomodiĝi al la bezono de la hodiaŭaj ĉinoj. Tial, rilate al ĉi tiu baledo, la ŝlosila demando estis kiel kreive apliki kaj disvolvi la tradician

formon de la baledo por prezenti la socialismajn revolucionajn batalojn kaj vivon.

Ĉi tiu baledo solvis tre sukcese la demandon. Ĝi kuraĝis fari kiel heredadon tiel ankaŭ rompon de formuloj kaj kreadon de novoj. El la aranĝado de la solodanco, danco de du, danco de trio kaj scenaj dancoj oni povas vidi la fruktojn de la heredado kaj aŭdaca renovigo. Ekzemple la piedpinta danco origine taŭgas nur por prezenti facilmovemajn, flirtantajn kaj gracilajn figurojn; ĝi nature estas tute ne konforma al la karaktero de la hodiaŭaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Alia ekzemplo: la danco de du de la baledo estas altgrade lirikeca dancformo kaj ĝia "subtenelevado" jam fariĝis esprimriĉa rimedo. Kaj dum la lastaj pli ol cent jaroj, ĉi tiuj esprimformoj jam fariĝis apartaj kaj plej karakterizaj formoj de la baledo. La renoviga spirito en arto de la baledo "Ruĝa Virina Taĉmento" montriĝas ĝuste en tio, ke ĝi kaj heredis ĉi tiujn esprimformojn kaj esprimrimedojn kaj ŝanĝis ties temperamentojn kaj disvolvis ties esprimivon. Prenu Kionghua kiel ekzemplon. Preskaŭ ĉiuj ŝiaj dancoj alprenas la formon de piedpinta dancado, tamen per tio ja estas trafe manifestita la karaktero de ekstreme nefleksebla heroino. Ŝia solodanco en la arbaro post ŝia eskapo el la karcero de Nanbatian, baziĝis sur la piedpinta dancado kaj asimilis iujn korpomovojn kaj irmanierojn de la ĉina opera danco; ĝi plene esprimas ŝiajn batal-spiriton kaj ekscitiĝon post

fûgo for de morto. Kaj en la sama sceno, la danco de duo de ŝi kaj la ŝin persekutanta lakeo de la bienulo prezentas la streĉan luktheadon inter ili. Ankaŭ la solodanco en la dua sceno, en kiu Kionghua, veninte al la bazloko de la Ruĝa Armeo, kun malama flamo akuzas antaŭ la publiko Nantatian-on pri liaj krimegoj, estas tre energia. Aparte menciinda estas la kolektiva danco de milita ekzercado de la virina roto. Ĝi estas kolektiva virina piedpinta danco, tamen pere de ĝi prezentiĝas sukcese la figuroj de aro da bravaj kaj fortikaj batalantinoj kun pafiloj. Ĉi tie la movoj de milita ekzercado, ekstraktitaj el la milit-vivo, ekz. la viciĝado, bajonetatako kaj pafado, estas lerte kombinitaj kun la tekniko de piedpinta danco de baledo. Tio havigas al la piedpinta danco, origine taŭga nur por prezenti facilmovemajn, flirtantajn kaj gracilajn figurojn, la karakteron de lerteco kaj fortikeco, kiu estas konforma al la karakterizaĵoj de militekzercado.

Konsiderinda disvolviĝo estas ankaŭ en la viraj dancoj de ĉi tiu baledo. La solodanco de Hong Ĉangking en la kvina sceno, antaŭ lia ekzekutiĝo, en konsiderinde granda grado, liberiĝis de la origine palaj kaj malfortaj rimedoj de baledo. Ĝi konservas la saltajn korpomovojn de la baledo kaj samtempe ankaŭ aldonas multajn fajrajn kaj senbridajn movojn de alten-saltado. Ĉi tiu danco plene montras la neŝanceblan fidon al revolucio kaj la heroan mortospitan neflekseblecon de Hong Ĉangking.

Cetere, ĉi tiu baledo ankaŭ asimilis multajn movojn de naciaj kaj popolaj dancoj. Ekz. la "li-nacia danco", "pluvĉapela danco" kaj aliaj dancoj de Hajnan-insulo ĉiuj provizas ĉi tiun baledon per naciecaj koloroj kaj pliriĉigas la esprimovon de baledo. Kaj kelkaj dancoj, kiaj "grenad-ĵetado", "pafado", "bajonetatako" estas laŭbezone eltiritaj kaj rafinitaj rekte el la milit-vivo.

Ĉio ĉi tio montras ke revolucia ŝanĝiĝo en la enhavo kaj formo de la baledarto, kiu devenis el

Eŭropo, ja okazas sur scenejoj de Ĉinio. La malfreŝa stilo de la baledo jam ŝanĝiĝas en fajran kaj energian stilon, plenan de la spirito de la epoko. Tio havigas al la baledarto novan vivforton.

La historio de la baledarto en Ĉinio estas tre mallonga. La Pekina Danclernejto starigis la baled-fakon nur en 1957 kaj Ĉinio fondis sian unuan "Eksperimentan Ensemblon de Baledo" nur en 1959. En ĉi tiu mallonga tempo de nur kelkaj jaroj la ensemblo jam prezentis sinsekve kelkajn grandajn okcidentajn baledojn, ekz. "Cigna Lago", "Giselle", "Ēsmeralda" k. a., kaj ankaŭ fragmentojn el aliaj okcidentaj baledoj. Sed sole la prezentado de okcidentaj baledoj ne povas igi ĉi tiun arton enradikiĝi en Ĉinio; kaj cetere estas malfacile imageble, ke la stereotipaj figuroj de la reĝidoj, nobeloj, feinoj, princinoj k. a., kiuj svarmas sur scenejoj de Eŭropo, povus akordiĝi kun la spirito de la hodiaŭa grandioza socialisma revolucio de Ĉinio. La baledarto devas esti revoluciigita, la figuroj de ĉinaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj devas aperi en la baledoj kaj la hodiaŭa reala batal-vivo devas respeguliĝi per dancoformoj kaj esprimrimedoj akcepteblaj de la popolamasoj; nur tiamaniere ĉi tiu arto povas enradikiĝi kaj flori en Ĉinio kaj fariĝi konsistiga parto de la revolucia arto. La baledo "Ruĝa Virina Taĉmento" ja estas la unua sukcesa paŝo sur ĉi tiu vojo.

Hong Ĉangking en lukto kontraŭ la malamiko antaŭ sia martiriĝo.



Unu Duonlabora- duonlerna Lernejo

PENG GJUN

Lernado pri teorio en klasĉambro.

LA Tiangina Filmo-fabriko estas entrepreno, kiu pli frue fondis duonlabora-duonlernan teknikan lernejon.

En la fabriko mi vidis, ke multaj gejunuloj energiplenaj absorbite laboras tiel en bruaj laborejoj kiel en puraj kaj kvietaj laboratorioj. Iu gvidanto de la fabriko diris al mi: "Tiuĉi ĉi junuloj plejparte estas diplomitoj de nia teknika lernejo duonlabora-duonlerna. Ili estas kvalifikitaj laboristoj kaj samtempe povas plenumi esplor-studajn laborojn."

Kiel la lernejo kombinas la lernigon kaj produktan laboron? Kiel ĝi kulturas novajn junulojn, kiuj estas bonaj en laborado kaj posedas teknikon kaj altan klaskonscion? Ĝuste tion mi volis scii dum mia vizito. La gvidanto ŝajne jam komprenis mian deziron, kaj kondukis min al la lernejo. Tie mi vidis kombinon de fabriko kaj lernejo, kaj ekkomprenis, por kio la edukado devas kombiniĝi kun la produkta laboro.

* * *

Antaŭ la Liberiĝo la filmo-fabriko estis metilaborejo kun simplaj kaj aĉaj ekipaĵoj. Tiutempe ĝi havis nur ok oficistojn kaj laboristojn, kaj produktis nur kolorapartigajn plakojn, kun produktokvanto kompatinde eta kaj kvalito tre malalta. Post la Liberiĝo en 1949, laŭ la bezono por disvolvi produktadon la ŝtato investis al ĝi kaj konstruis novan

fabrikon kun modernaj ekipaĵoj surbaze de la origina metilaborejo. En la jaro 1958, la oficistoj kaj laboristoj de la fabriko jam nombriĝis pli ol 200, tamen ĝi havis nur dek unu inĝenierojn kaj teknikistojn kaj 79 kvalifikitajn laboristojn super la kvara klaso*. La klereco de la laboristoj estis tre malalta. Tiuĉi atingis la edukitecon de elementa lernejo estis ne pli ol 65%. Evidente, tia stato ne povis respondi al la postuloj de la fabriko por plua disvolvo de produkto kaj sciencaj studoj. Ĝuste por solvi tiun ĉi problemon, estis fondita en 1958 la duonlabora-duonlerna teknika lernejo.

Ĝis la fino de la jaro 1964, la lernejo jam 5-foje akceptis novajn lernantojn kaj 472 lernantoj finis la studon kaj ricevis diplomojn. Krom malmultaj, kiuj estis postenigitaj en aliaj frataj fabrikoj, la plejparto de la diplomitoj nun laboras en la fabriko. Iuj el ili laboras kiel kvalifikitaj laboristoj, aliaj sin okupas pri sciencaj studoj en eksperimenta aŭ projekta fako, formante ĉefan forton de teknikaj laboroj en diversaj fakoj de la fabriko.

La produktado de la fabriko rapide disvolviĝas pro grandakvanta eniĝo de novtipaj laboristoj, kiuj posedas sciencajn teoriajn sciojn kaj sperton en praktikaj laboroj. Antaŭ 1958 la fabriko povis produkti fotoplakon, fotopaperon, entute du-tri specojn de malaltklasaj impresiĝemaj materialoj. Sed nun ĝi jam povas produkti kinofilmon, X-radian filmon, spektro-plakon ktp. entute pli ol 30

specojn de impresiĝemaj materialoj de alta klaso. Samtempe ŝanĝiĝis evidente la kultura fizionomio de ĝiaj oficistoj kaj laboristoj. La nombro de oficistoj kaj laboristoj kun gimnazia klereco plimultiĝis de 18 procentoj en 1957 al nunaj 61 procentoj.

* * *

En la teknika lernejo la lernantoj devas samlonge labori en laborejo kiom studi en klasĉambro.


Laŭ la bezono de la produktado de la fabriko, la lernejo fondis respondajn fakojn. La fabriko bezonas teknikajn fortojn por fabrikado de impresiĝemaj materialoj, impresiĝemaj kemiaĵoj kaj koncernaj maŝinaroj, tial la lernejo fondis kvar fakojn de impresiĝema materialo, speciala organika kemiaĵo, filmobazo kaj koncernaj ekipaĵoj.

En la lernejo oni unue instruas bazajn sciojn pri kulturo kaj tekniko kaj poste la fakajn tiel aranĝante la lernobjektojn ke la antaŭaj servu al la lastaj, kaj la lastaj servu al la produktado. Kompreneble, la laboroj de la lernantoj estas aranĝitaj konforme al la citita postulo. La teknikaj bazaj

lecionoj entenas pli vastan enhavon en la unuaj du jaroj, pro tio oni tiel aranĝas en tiu tempo ke la lernantoj laboru kune kun la laboristoj laŭvice en diversaj laborejoj, por ke ili povu pli vaste mastri la teknikajn bazajn sciojn; tio metas bazon por ilia posta profundigo en fakajn teoriajn sciojn, kaj samtempe ebligas al ili ellerni manipulaĵajn teknikojn kaj ekoni la tutan produktan procedaron de la fabriko. En la tria lernoĵaro oni sendas la lernantojn al esplorstudaj kaj projektaj sekcioj, por ke ili povu krom pristudi kaj mastri pli altajn fakajn teoriajn sciojn, ankaŭ kapabliĝi en studaj kaj projektaj laboroj. En la lasta jaro la lernantoj komencas labori sur fiksitaj postenoj konforme al ilia aparta lerteco montrita dum la pasintaj jaroj. Tiamaniere la lernantoj jam povas pluapaŝe specialiĝi en la praktikaj laboroj de difinita fako. Fininte la studon la lernantoj estas ĝenerale sendataj al la

postenoj kie ili laboris en la kvara jaro. Tiel ili povas tuj plene disvolvi sian talenton kaj kontribui sian forton al la socialisma konstruado, kiel novaj laboristoj. Posedante sciencan teorion kaj praktikan sperton, la 472 diplomitoj de la lernejo ĉiuj bone laboras, ĉu en laborejoj, ĉu en esploraj aŭ projektaj sekcioj, iuj el ili eĉ distingiĝis per siaj laboroj. Ekzemple, kiam iu diplomitino kiel kvalifikita laboristino preparis emulsion por filmo, sur eksperimenta specimeno ŝi elmezuris, ke la impresebleco de 21-DIN-a filmo estas malforta, ĝia kontrasto estas tro forta kaj ĝi ne atingas la postulatan kvaliton. Tra scienca analizo kaj esploro ŝi trovis ke ĝian malbonan kvaliton kaŭzis tro malgrandaj grajnoj de arĝenta klorido en la emulsio. Kombinante la lernitan teorion ŝi determinis ke tian fenomenon kaŭzis troa denseco de araba gumo de filmo-emulsio, kaj proponis reduktion de la kvanto de araba gumo en la emulsio. La fabriko akceptis ŝian proponon kaj la impresebleco kaj kontrasto de la faritaj filmoj atingis la postulatan kvaliton.

Surloka instruado.



Ĉen Baŭjuan kaj Ĝang Zepeng en la kontrola sekcio ellaboris surbaze de siaj praktikaj spertoj regularojn de procedoj por kontroli diversajn produktaĵojn, kaj per tio pluaparte sciencigis kaj sistemigis la kontrolan laboron kaj garantiis la kvaliton de la produktaĵoj de la fabriko.

* * *

Dum la vizito mi kontaktiĝis kun multaj diplomitoj de la lernejo, sur kiuj mi vidis la influon de noblaj kvalitoj de veteranaj laboristoj senlime fidelaj al la socialisma revolucia afero. Ĝang Guangŝen estas bona ekzemplo. Lia specialeco estas konstruo de ekipaĵoj. Dum lernado li foje estis sendita labori ĉe kaldronego. Komence li malŝate trovis la laboron malpura kaj peniga, kaj pensis ke tie nenio estas lerninda kaj ke estos plej granda malfeliĉo esti asignita por labori kiel hejtisto post ricevo de la diplomo. En la laboro kune kun veteranaj laboristoj, li vidis ke ili laboras konsciencie, konsiderante neniam siajn personajn profitojn. Ili krome ofte diris al li: “Ankaŭ hejti kaldronon estas fari revolucion. Se vi dividas la revoluciajn laborojn en altajn kaj malaltajn, respektindajn kaj

malrespektindajn, kaj pripensas nur elekti malpezan kaj komfortan laboron, do, kun la paso de la tempo via penso dekvalitiĝos.” Sub la helpo kaj edukado de veteranaj laboristoj, Ĝang Guangŝen konsciis sian eraron kaj ne plu malŝatis la laboron. Ĉe la fino de la lernado, li povis labori en la fako laŭ lia specialeco, sed tiam la fabriko ĝuste bezonis hejtiston de kaldronego. La gvidanto de la fabriko pridemandis lian opinion, li respondis: “Se la produkto bezonas, mi pretas labori tie dum mia tuta vivo.”

Kvankam mia vizito al la fabriko kaj ĝia lernejo estis mallonga, tamen tiel profundan impreson mi ricevis ankoraŭ de neniuj aliaj fabrikoj aŭ lernejoj. Sur tiuj junuloj, kiuj estas kaj lernantoj kaj laboristoj, mi vidis novajn kunigitajn figurojn de laboristoj kaj intelektuloj, iom-post-ioman malgrandiĝon de diferenco inter mensa kaj fizika laboroj, novan forton kun granda estonteco kaj grava signifo por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie.

**Ĉinaj laboristoj estas dividitaj en 8 klasojn laŭ kvalifikeco. La 8-a klaso estas la plej alta.*

Ĝang Hiuhua (meze) de la plako-farejo klarigas manipuladon en produktado al lernantaj laboristinoj.



Liu Jating (dekstre), diplomito el la duonlabora-duonlerna lernejo faras esploradon.



Bari Maron kaj Trabori Monton por Riĉa Rikolto

HUANG HAJ

EN suda Ĉinio, ĉe la marbordo de Ĝeĝiang-provinco sin trovas la Marborda Produkta Brigado de la Hajmen-a Popola Komunumo. Ĉi tie antaŭe ofte okazis kaj pluvinado kaj sekegeco. En la somero de 1964, en tiu regiono denove neniam falis sufiĉa pluvo dum tri sinsekvaj monatoj; kaj cetere en la tempo de la Aŭtunmeza Festo* la martajdo estis unu metron pli alta ol tiu en la sama tempo de la pasintaj jaroj. Tamen la komunumanoj, sin apogante sur siaj kolektivaj fortoj, venkis la maloftajn naturajn katastrofojn kaj finkonstruis marbarajon kaj tramontan akvokondukejon, kaj tiel batalakiris abundan rikolton. La pomua produktokvanto de greno de la tuta brigado estis 610 kilogramoj, tiu de kotono estis 60 kilogramoj: la greno produkto pliiĝis je 45% kaj la kotona je pli ol unu oblo, kompare kun tiuj respektive en 1963. Nur en la daŭro de unu jaro jam okazis tia radikala ŝanĝiĝo.

SINAPOGO SUR SIAJ PROPRAJ FORTOJ

La vilaĝo de la Marborda Produkta Brigado estas ĉirkaŭata triflanke de Tengjun-monto kaj unuflanke de maro. Antaŭ la Liberiĝo estis tre malriĉa loko, kie ofte okazis plagoj. Antaŭ kvardek jaroj foje superakvego forbalais ĉiujn kabanonj de la vilaĝo kaj dronigis multajn kamparanojn; la postvivantoj povis fari nenion alian ol formigri el sia hejmloko por serĉi vivtenan rimedon.

Post la Liberiĝo la kamparanoj sin organizis. Dank' al la kolektiva forto la malnova digo estis ĉiujare riparita kaj plialtigita kaj tiel neniam okazis tragedio de homdronigo, tamen la sala tajdo ankoraŭ senĉese atakis la kampojn, tiel ke la greno produkto reduktiĝis kaj iafoje oni rikoltis eĉ nenion.

Venki la tajdon kaj batalakiri abundan rikolton estis la komuna deziro de ĉiuj komunumanoj de la brigado kun 170 familioj.

En 1958 la brigado elmetis planon konstrui novan digon, interligantan ambaŭ ekstremojn de

Tengjun-monto, digon, kiu radikale senigos la tri kilometrojn longan krescentan terparton ĉirkaŭatan de Tengjun-monto je la minaco de sala tajdo. Ĉi tiu projekto ja ne estis facile realigebla. Ĝi postulis dekmilojn da labortagoj kaj elspezon de dekmiloj da juanoj.

Malriĉa estis la Marborda Brigado. Kiel do ĝi faru la konstruon? Pri tio la kompartia ĉelo de la brigado konsiliĝis kun la malriĉ-kamparanoj kaj malsupraj mezkamparanoj** de la tuta brigado. Ĉiuj opiniis same: La malfacilojn ni venku mem kaj ni ne devas apogi nin nur sur la subteno de la ŝtato. Nia brigado havas ja grandan nombron da fortaj laborpovaj personoj, tial, se nur ni ĉiuj unuiĝos kaj havos la monttranslokigan spiriton de Malsaĝa Avo***, ĉian ajn malfacilon ni povos venki. Se unu jaro ne estos sufiĉa por tion fari, ni batalos por kvin aŭ dek jaroj kaj certe venos la tago, kiam la digo estos finkonstruita.

Depost 1958 la kompartia ĉelo de la brigado plifortigis sian gvidadon samtempe en la agrikultura produkto kaj en la flankokupoj por akumuli fonduson. Dum la tri-kvar jaroj disvolviĝis la kolektivaj flankokupaj produktoj de fabkazeo, senŝeligo de rizo, brutobredado, ostroklapa pulvoro, brodaĵoj, plektitaj jutĉapeloj kaj aliaj. Ĝis la fino de 1962 la brigado jam akumulis por si 40,000 juanojn da mono.

JUNGADO DE MARTAJDO

Kiam la problemo de la fonduso estis solvita, la kompartia ĉelo de la brigado tuj diskutigis la digkonstruan planon al la komunumanoj. En la kunveno la sepdek-jara malsupra mezkamparano Avo Dadian diris: "Havante tiun ĉi grandan kolektivon de la popola komunumo, kiu posedas nombregon da homoj kaj gigantan forton, ni ja povas fari ĉian ajn aferon." Pro la iniciato de la malriĉ-kamparanoj kaj malsupraj mezkamparanoj pli ol 180 fortaj laborkapabluloj de la tuta brigado

iris al la konstruejo kaj tiamaniere ia grandioza konstruado komenciĝis.

En la vintro ĝisoste frosta, la malriĉ-kamparanoj kaj malsupraj mezkamparanoj de la brigado, ensaltis unu post alia en marĉon glitigan kaj profundan. Spite la frostan venton ili senĉese laboradis per ŝoveliloj. La vatitaj vestoj de iuj el ili estis malsekigitaj per ŝlimo, kaj blovfrostigite de la mara vento, fariĝis kvazaŭ kiraso sidantaj sur la korpoj. Tamen neniu ĝeniĝis pro tio.

Kiam la labortago jam finiĝis, la malriĉ-kamparano Vang Daŭfu malgraŭ laciĝo restis ankoraŭ sur la konstruejo kaj daŭre batfirmigis terbulojn por solidigi la digon. Kadroj diris persvade al li: "Penlaborinte la tutan tagon, vi ja estas tre laca. Iru hejmen por ripozo kaj daŭrigu vian laboron nur morgaŭ!" Li respondis: "Ne! Se hodiaŭ la terbuloj ne estus batfirmigitaj, morgaŭ firmigo jam ne eblus, kaj poste la digo povus fendiĝi kaj disfali pro penetrado de akvo. Influate de Vang Daŭfu la komunumanoj pli bone atentis la kvaliton de la konstruaĵo.

Post duonjaro ĉies okuloj ruĝiĝis pro marvento, ĉies manoj kaj ŝultroj kaliĝis pro frotado. La komunumanoj de la tuta brigado elspezis 25,000 labortagojn kaj transportis 20,000 kubmetrojn da ŝtonetoj kaj tero. Finkonstruiĝis unu digo, 2.5 metrojn alta, 6 metrojn larĝa kaj 750 metrojn longa. Per tio ili ne nur venkis la marondojn, sed ankaŭ plivastigis je 8 hektaroj sian areon de agro.

MONTBORADO POR ALKONDUKO DE AKVO

Post kiam la digo estis finkonstruita, tuj sekve okazis sekegeco daŭrinta 120 tagojn. En la riveretoj kaj kanaletoj ne plu fluis akvo, la rizplantoj flaviĝis de akvomanko, kaj ankaŭ la kotonarboj klinis siajn kapojn. Tamen transe de Tengjun-monto estis alia mondo. Tie la akvorezervejo tenis en si sufiĉan akvon, kaj ĉirkaŭe de ĝi la rizkampoj estis plenplenaj de akvo kaj tie la rizplantoj tre bone kreskis. La kampoj de la Marborda Brigado, kiujn Tengjun-monto apartigas disde la ekstera mondo, kvazaŭ povis nur sopiri kontraŭ la monto.

Ne, la komunumanoj de la brigado jam estis denove mobilizitaj por solvi la problemon de akvo. En la komenco ili vane trapasis ĉiujn zigzagajn vojetojn sur Tengjun-monto por serĉi fontojn, fine la brigado venis al la decido: trabori monton por alkonduki akvon kaj eterne garantiĝi abundan rikolton.

Proverbo diras: "Per unuanimeco de homrondo translokigeblas eĉ Taj-monto." La montborado komenciĝis tuj sekve. La malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj iam manifestis sian

bravecon sur la digo, denove antaŭiris la aliuojn. Ĉar tunelo ne povis enteni tro multe da homoj, la brigado do elektis parton de la junuloj kaj mezaĝuloj kaj formis el ili montboran sturman grupon.

Estis varmega aŭgusto. La tridek naŭ sturmantoj kun litaĵoj kaj iloj por montborado sin direktis al la valo de Tengjun-monto.

Veninte en la konstruejon, ili eklaboris per pioĉoj, marteloj kaj borstangoj anstataŭ per ŝpatoj kaj plugiloj, kiujn ili kutimis uzi kiel lertaj produktantoj. Mankis al ili sperto de montborado kaj ŝtonhakado, ili do invitis inĝenierajn soldatojn de la Liberiga Armeo instrui al ili teknikon. Dank' al sia diligenta lernado la sturmantoj Ĝang Bifa k. a. baldaŭ jam mastris la manipuladon de borstango.

En la tunelo estis densa mallumo. Fari la tunelon rekta estis ja afero malfacila en tia kondiĉo, ke mankis teknikistoj kaj mezur-instrumentoj. La vicĉefo de la sturma grupo, la malriĉ-kamparano Vang Daŭfu konsiliĝis kun la sturmantoj, kaj trovis taŭgan rimedon. Aplikante sian sperton de riztransplantado, ili metis tri ekbruligitajn kandelojn sur tri punktojn je unu rekta linio por mezurado de tempo al tempo. Ĝuste per ĉi tiu indiĝena metodo ili traboris la tunelon rekta.

La borstangoj malakriĝis kaj rompiĝis unu post alia. Ĉar mankis forĝistoj, kelkaj sturmantoj meminciate eklernis la teknikon de forĝado kaj tiel ŝparis multe da mono por sia brigado.

La sturmantoj tage kaj nokte laboradis laŭvice je tri deĵoroj. Ili boris antaŭen colon post colo. En la malluma tunelo forbruliĝis kandeloj unu post alia. Pasis la somero varmega kaj venis la vintro frosta.

En la Novjaro de 1964 finkonstruiĝis la akvokonduka tunelo, pli ol 140 metrojn longa. Realigis jam la deziro, kiun portis la prapatroj de la komunumanoj generacion post generacio.

Nur en la daŭro de unu jaro la Marborda Brigado plenumis jam la du grandajn konstruojn de la marbaraĵo kaj la tramonta akvokondukejo, kiuj garantias al la kampoj konstantan altan produkton eĉ tiam, kiam okazas trosekeco aŭ pluv-inundo. Dank' al tio la komunumanoj pli bone komprenas, ke la politiko de sinapogo sur siaj propraj fortoj estas larĝa vojo por konstrui novan socialisman kamparon.


* Unu el la ĉefaj tradiciaj festoj en Ĉinio, kiu okazas je la 15-a de la 8-a monato laŭ la ĉina lun-kalendaro.

** Malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj prezentas klasecojn difinitajn dum la agrara reformo.

*** En ĉina fablo, Malsaĝa Avo translokigis du vojbarantajn montojn per penlaborado.

GRANDA FARO DE MALGRANDA FABRIKO

ĜANG JONGĜENG



Senjuntaj ŝtaltuboj de la fabriko pretaj por livero al diversaj lokoj.

EN iu strateto de Ŝanhajo troviĝas nerimarkinda fabriketo. Ĝi havas nur simplajn ekipaĵojn, sed, en 1958 ĝi la unua en Ĉinio elfabrikis senjuntajn ŝtaltubojn kun malgrandaj kalibroj. Ĝi estas la Jonghin-a Fabriko de Senjuntaj Ŝtaltuboj, famkonata tra la tuta lando.

Dum la pasintaj sep jaroj tiu malgranda fabriko faris admirindajn laborojn kaj nun ĝi jam povas produkti pli ol okdek diversspecajn bonkvalitajn senjuntajn ŝtaltubojn de malsamaj tipoj kaj normoj.

Dum la pasintaj sep jaroj, tiu ĉi fabriko ĉiam persistis en la direkto sin apogi sur siaj propraj fortoj kaj ĝia produkto impetis flugrapide. En vitrinoj mi vidis sortimenton de la produktaĵoj de la fabriko, inter kiuj estas senjuntaj ŝtaltuboj triangula, kvinangula, sesangula, kvadrata, ortangula, T-forma, melonsem-forma kaj umefloro-forma. Tiuj ŝtaltuboj estas kun malsamaj kalibroj kaj murdikecoj, el ordinara ŝtalo, alojŝtalo, nerustiĝa ŝtalo k. a. respektive.

En iu ne tre alta laborejo mi rigardis la produktan proceson de senjuntaj ŝtaltuboj en neordinaraj formoj. Kvar paralelaj produktaj linioj eligas samtempe zumadon. Ĉe la unua maŝino, tri laboristoj surmetas rondajn ŝtaltubojn kun dikeco de taso al la malvarme-tirlongiga maŝino pli ol 20 metrojn longa. Unu ekstremo de la ŝtaltubo estas

tenajlata de potenca tubtirilo; kaj irinte tra la transformiga maŝino en la mezo la tubo jam fariĝis neordinarforma.

Vidante ke per tiel simplaj ekipaĵoj oni povas tamen produkti tiel bonkvalitajn senjuntajn ŝtaltubojn, mi estis efektive kortuŝita de la saĝo de la laboristoj kaj ilia brava strebado al prosperiĝo.

Kial tiu malgranda fabriko povas produkti senjuntajn ŝtaltubojn kun malgrandaj kalibroj kaj en neordinaraj formoj? Por respondi al tio, ni devas paroli pri Pan Ajaŭ, malnova laboristo de la fabriko.

Antaŭe Pan Ajaŭ estis laboristo en iu privata fabriko. Rimarkante ke senjunta ŝtaltubo estas forte bezonata en la konstruado de la patrio, li tre volis ĝin produkti. Iutage, per senutila ŝafto li provis sur la kuprotuba traborilo. Neatendite la ŝafto estis facile traborita. Li estis ege ĝoja kaj tuj proponis al la fabrikomastro provprodukti senjuntajn ŝtaltubojn. Tiam estis nur nelonge post la liberiĝo de Ŝanhajo kaj tiu fabriko ankoraŭ estis privata. La kapitalisto tute ignoris la raciigajn proponojn de laboristoj. Poste, Pan Ajaŭ sukcesis transformi iun malnovan maŝinon en traborilon. Sed la kapitalisto malpermesis al li provprodukti senjuntan ŝtaltubon.

En 1957 la fabriko fariĝis entreprenata komune de la ŝtato kaj privatuloj, ŝtata reprezentanto partoprenis la administradon de la fabriko kaj nur tiam efektiviĝis la revo de Pan Ajaŭ. Sed, komence, la prove produktitaj senjuntaj ŝtaltuboj estis kurbaj kaj nesimetriaj en murdikeco. Pli ĉagrena estis tio ke la aloja pinto de la tubtraborilo moliĝis je varmega temperaturo de 1300° C. Post traboro de nur unu ŝtaltubo la traborilo jam moliĝis, kaj iuj moliĝis nur traborinte ĝis la mezo de la ŝtaltubo. Jen teknika malfacilo ree baris al li la vojon por provprodukto.

Pan Ajaŭ kaj aliaj laboristoj ne retiriĝis antaŭ la malfacilo. Ili kredis ke la senjunta ŝtaltubo nepre estos sukcese elproduktita dank' al la gvido kaj subteno de la Kompartio kaj dank' al ilia nefleksebla persisteco. "Provado" estis ilia respondo al la malfaciloj.

Iutage dum li dronis en meditado en sia hejmo, subite lian atenton fortiris la ekboliĝo de akvo en kruĉo. Li trovis ke la alumina kruĉo, kvankam longe sidanta sur fajro, ne moliĝis. Tio inspiris lin. Li boris truon en la traborilon, kaj muntis

al ĝi tubeton ke cirkulu en la truo malvarma akvo. Provo montris ke tio vere solvis la problemon de moliĝo kaj deformiĝo de la traborilo. Kaj post kelkfojaj perfektigoj, glataj kaj rektaj senjuntaj ŝtaltuboj estis elproduktitaj kaj ankaŭ la produktokvanto multe pliiĝis.

Tiam la Jonghin-a Fabriko estis la dua fabriko de senjuntaj ŝtaltuboj en Ĉinio dum la alia produkteto estis la Anŝan-a Fabriko de Senjuntaj Ŝtaltuboj.

SUBSKRIBO DE KONTRAKTO

Iumatene, venis al la Jonghin-a Fabriko nekonnata gasto, kiu petis la fabrikon provprodukti nombron da senjuntaj ŝtaltuboj kun malgranda kalibro kaj maldika muro. Ĉar la fabriko neniam produktis tian ŝtaltubon, tial la fabrika vendisto ne akceptis la mendon de la gasto.

Tion hazarde eksciis Pan Ajaŭ. Li pensis: se la kliento bezonas tian ŝtaltubon, kiel povus tion rifuzi ni, kiuj produktas speciale senjuntajn ŝtaltubojn? Pan Ajaŭ raportis sian penson al la gvidantoj de la fabriko kaj ricevis subtenon de la

Kontrolado de ortangulaj senjuntaj ŝtaltuboj por baldaŭa elporto.



lastaj. La kontrakto subskribiĝis. La gvidantoj tuj organizis vastan diskuton pri tiu mendo inter la laboristoj.

La revolucia spirito de la laboristoj estis plie ekscitita. Multaj diris: "Ni faru se ni povas, kaj provu se ni ne povas! Ni nepre produktu senjuntajn ŝtaltubojn kun neordinaraj formoj per niaj manoj."

Tuj fondiĝis grupo por provprodukto de la nova produktaĵo, kaj ĝia estro ĝuste estis majstro Pan.

Sed la nova produktaĵo devas havi bonan kvaliton kaj por ĝia produkto necesas kompleksa tekniko. Iuj diris ke por ĝin produkti necesas modernaj ekipaĵoj kaj la kadukaj malnovaj maŝinoj ne plu taŭgas. Sed Pan Ajaŭ ne tiel opiniis. Li diris: "Ne forgesu kiel elproduktiĝis nia unua senjunta ŝtaltubo! Tiam ni ne petis monon de la ŝtato, tamen ĉu la novaj ŝtaltuboj ne elpro-

duktiĝis? Kamaradoj, ni marŝu ĝisfine sur la larĝa vojo funkciigi fabrikon kun diligenteco kaj ŝparemo!" La vortoj de majstro Pan kondukis la energion de la laboristoj ree sur la vojnon de disvolvado de produkto sin apogante sur siaj propraj fortoj.

La amasoj mobiliziĝis. La malnovaj materialoj kaj ekipaĵoj estis asignitaj por nova tasko. Mankis bluplanoj kaj instrukcio pri teknika proceso, la laboristoj do sin helpis per ripeta provado.

Kiu volas, tiu povas. Post du monatoj, tiuj neordinaraj ŝtaltuboj estis fine elproduktitaj kaj senditaj al la mendinto antaŭ la limdato. Sekve de tio la mendoj pri novaj produktaĵoj iom post iom pliĝis je kelkcent kilogramoj ĝis pluraj tunoj. Kiel standardo de la direkto sin apogi sur siaj propraj fortoj en industrio, la Jonghin-a Fabriko de Senjuntaj Ŝtaltuboj akiris ankaŭ tre altan takson de vizitantoj en- kaj ekster-landaj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ



LA UNUA UREO-PRODUKTA EKIPAĴO EN ĈINIO

La unua ureo-produkta ekipaĵo projektita, konstruita kaj instalita de Ĉinio mem sukcese provfunkciis lastatempe en Ŝanhajo kaj jam alportis la unuan produkton de alt-efika kemia sterkourejo.

Tiu ĉi ekipaĵo kun jara produkto de 40,000 tunoj da ureo konsistas el pli ol 200 ĉefaj kaj helpaj maŝinoj. La plej granda el la ĉefaj maŝinoj konsistas el pli ol 1,000 gravaj partoj kaj helpaj maŝinoj, kaj pezas pli ol 120 tunojn.

ALIA FOSFAT-STERKO

Krom la sukcesa provfabrikado de komponsterko, fosfato de amonio, nia lando sukcesis lastatempe provfabriki la rapidefikante alte koncentran fosfat-sterkon, — duobla superfosfato de kalko. Ĝi estas akvosolvebla fosfat-sterko enhavanta utiligeblan fosfaton de ĉ. 45% kaj donas tre bonan efikon por akceli kreskon kaj maturiĝon de plantoj.

PLI OL 30 SPECIOJ DE GASOMALŜARGAJ AMPOLOJ

En la lastaj jaroj, progresoj estis faritaj en scienc-esploraj laboroj de Ĉinio por uzi gason anstataŭ metalfadenoj kiel elektromalŝargan lumofonton. Ĝis nun oni sukcesis prove elfari pli ol 30 speciojn de tiaj ampoloj kiuj estas uzablaj kiel nov-tipa lumofonto de iluminado kaj tiu por instrumentoj uzataj en industrio, agrokulturo, kuracado kaj higienaj kaj scienc-esploraj laboroj ktp. Inter ili sin trovas la t. n. "Artefarita Suneto" altensia longarka kseno-lampo kaj altensia hidrarga fluoreska lampo kiuj estas jam instalitaj por prova uzado. Ankaŭ pluraj aliaj estas nun en produktado.

LEDFAREJO EN LHASA

La unua ledfarejo konstruita en Lhasa, Tibeto, jam nun povas produkti pli ol 300 speciojn de ledajoj kaj peltaĵoj kiuj kune nombriĝas jare je pli ol 100,000 pecoj.

La laboristoj kaj teknikistoj de la ledfarejo venis el Pekino, Ĉengdu, Hi-an kaj aliaj lokoj. Samtempe kun la disvolviĝo de produktado ili ankaŭ aktive helpas tibetajn laboristojn ekposedi la produktan teknikon. Nun iuj el la

lastaj jam atingis la nivelon de kvalifikita laboristo.

SUNTELESKOPO

Lastatempe Ĉinio sukcesis konstrui sunteleskopon de tipo 62A. Tio estas preciza astronomia optika instrumento duonaŭtomate kontrolata per fotoelektro. Sufiĉe altaj estas ĝiaj precizeco kaj sentiveco ke oni povas per ĝi studi la sunan spektron, esplori la fizikan proceson de eksteraj aktivecoj de la suno, ekzemple la eksplodo de sunmakulo ktp.

NOVA FRUKTARBARO FLEGATA EN KANTONO

En la ĉirkaŭurbo de Kantono oni disvolvas energie kulturadon de liĉio, ananaso, banano, oranĝo, cidonio k. a. fruktarboj. Ĝis la fino de marto, 1965, fruktarboj estis plantitaj de la popolaj komunumoj en la ĉirkaŭurbo en pli ol 14,000 muoj da tero. Ĉe ambaŭ flankoj de riveroj kaj kanaloj estas plantitaj vicoj da liĉiarboj. Kaj sur iuj sovaĝaj montoj dense plantiĝis ankaŭ fruktarboj. Sole kelkaj popolaj komunumoj en Huahien-gubernio plantis surmonte fruktarbojn kaj lignomaterialajn arbojn en areo de pli ol 3,300 muoj.

En la diritaj artikoloj, Prezidanto Maŭ donas klaran respondon pri ili. Li alvokas nin lerni la "tute malegoisman spiriton" de N. Bethune. Mi trovis lian instruon tre kara kaj mia amo al liaj vortoj kreskadis kun mia ripeta tralegado. Legante mi decidis bone lerni la noblan spiriton malegoisman.

Plue, mi lernis la artikolon *Zorgu pri la Vivo de la Popolamasoj kaj Atentu pri la Labormetodo*. Dank' al tio mi akiris pli bonan konon pri la signifo de la vendista laboro. Tiam mi pensis: Antaŭ pli ol dudek jaroj Prezidanto Maŭ jam rigardis la problemon de vivbezonaĵoj de la popolamasoj tiel grava. Se hodiaŭ ni tutkore servos al la popolamasoj kaj bone solvos iliajn problemojn de nutraĵoj, vestaĵoj kaj aliaj bezonaĵoj, ili certe laboros kaj produktos pli absorbite, koncentrigante siajn fortojn al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Ĉu tiamaniere ni ne faros bonan kontribuon al la socialisma afero? Konsciiginte pri tio, mi enamiĝis al mia vendista laboro.

Malgraŭ la enamiĝo, tamen estis nefacile por mi bone plenumi la servon de vendisto. Tre diversaj estas la postuloj de la miloj kaj dekmiloj da klientoj. Kiamaniere ilin servi kontentige? Foje, dum legado de la artikolo *Pri la Strategio de la Ĉina Revolucia Milito* de Prezidanto Maŭ mi trovis la ĝustan respondon. Li instruas al ni: "Kiam oni faras ion ajn, sen kono pri ĝia stato, ĝia naturo kaj la rilatoj inter ĝi kaj la koncernaj aferoj, oni ja ne povas koni ĝian leĝon, ne scias kiel ĝin fari, nek povas ĝin fari sukcese." Liaj vortoj montris al mi, kien mi devas direkti miajn klopodojn. Mi pensis, ke laborante kiel vendistino mi devas bone scii la bezonojn de la popolamasoj kaj la leĝon de provizado de varoj, alie mi ne povos bone plenumi mian servon kaj kontentigi la popolamasojn je iliaj bezonoj.

Mi komencis enketi pri la klientoj, kaj trovis, ke inter ili troviĝas norduloj kaj suduloj, laboristoj kaj dommastrinoj, scienculoj, instruistoj kaj ŝtataj oficistoj. Malsamaj estis iliaj vivkutimoj kaj postuloj al legomoj. Por ilin kontentigi, ni devis plimultigi la specojn de la vendataj legomoj laŭ la realaj cirkonstancoj.

Sed tio ankoraŭ ne sufiĉis. Foje iu kliento demandis min: "Ĉu oni povas kuiri pizon kun ajlo?" Tiam mi trovis nenion por respondi. Tio rimarkigis al mi, ke vendisto devas esti ne nur entuziasma, sed ankaŭ vere kapabla servanto al la popolo, ke li devas havi gastronomian scion pri la legomoj por fariĝi bona "konsilanto pri la ĉiutaga vivo" por la popolamasoj.

Mi decidis, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, lernadi de lertuloj kaj ellerni ĉion kion mi ne

sciis. Kun la diversaj demandoj elmetitaj de klientoj, mi min turnis al veterana kuiristo kun sperto de tridek jaroj por peti lian instruon. Sekve mi ricevis iom da scio pri kuirarto. Depost tiam, vendante legomojn mi jam povis laŭbezone rekomendi al la aĉetantoj, kiuj legomoj taŭgas por friti aŭ stufi, kaj kiuj taŭgas por fari farĉon, por ke ili estu kontentaj pri la aĉeto.

Poste, mi pensis plue, ke certe estos pli bone, se ankaŭ la aliaj butikoj de la tuta urbo faros same. La Federacio de Sindikatoj de nia urbo subtenis mian ideon. Sekve ni pli ol kvarcent gevendistoj de legomoj en Ŝenjang invitis faman kuiriston de la Restoracio Ŝaŭjuan fari al ni paroladon pri kuirarto. Tio multe riĉigis niajn sciojn pri kuirado kaj plibonigis nian servadon.

El la laborado kaj lernado de verkoj de Prezidanto Maŭ dum la pasintaj jaroj mi profunde komprenas, ke oni povas bone labori por la revolucio nur se oni diligente lernas la verkojn de Prezidanto Maŭ, armas sian cerbon per liaj pensoj, kaj ĝisfunde revoluciigas la siajn. Kaj mi komprenas ankaŭ, ke inter la laboroj en nia nova socio ne ekzistas diferenco de nobleco aŭ humileco, kaj ke ĉia ajn laboro, se nur ĝi estas utila al la popolo kaj la proleta liberiga afero, estas laboro en servo al la popolo, laboro revolucia kaj nobla, kaj meritas ke oni ĝin plenumu tutkore.

**Kamarado Ĝang Side estis soldato en la Gvardia Regimento de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Li partoprenis la revolucion en 1933, trapasis la Longan Marŝon, estis foje vundita. Li estis membro de la Kompartio kaj lojale servis al la interesoj de la popolo. En la 5-a de septembro, 1944, preparante lignokarbon sur monto de Ansaj-gubernio en norda Ŝenhi-provinco, li mortis pro disfalo de la bakforno. "Servu la Popolon" estas parolado de Prezidanto Maŭ Zedong, farita por funebri K-do Ĝang Side en la kunveno kunvokita de la institucioj rekte gvidataj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.*

***Norman Bethune estis membro de la Kanada Komunista Partio kaj fama kuracisto. En 1936, kiam la faŝismaj banditoj de Germanio kaj Italio invadis Hispanion, li iris al la fronto kaj tie servis al la hispana popolo batalanta kontraŭ faŝismo. Post la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito en Ĉinio, gvidante kuracan brigadon li venis al Ĉinio en la komenco de 1938, atingis Jan-an-on en marto aŭ aprilo de la sama jaro, kaj postnelonge eniris la Limregionon de Ŝanhi, Ĉahaer kaj Hebej. Kun alta internaciisma spirito kaj sindona laborentuziasmo, K-do Bethune servis al vunditoj kaj malsanuloj de la Okavoja Armeo dum preskaŭ du jaroj. Li estis toksita en urĝe-sava operacio por vundito kaj la kuracado al li malsukcesis. Li mortis en la 12-a de novembro, 1939 en Tanghian, Hebej-provinco.*



El Legejo en Praktikon

ĈONG HI

PROFESORO Ĝu Gjue, la estro de la elektro-metalurgia instrua grupo de la Pekina Ferŝtala Teknologia Instituto, sin okupadis pri instruado jam ĉirkaŭ dudek jarojn. En la lastaj jaroj per lernado de verkoj de Prezidanto Maŭ Zedong kaj partopreno de produkta praktiko li vere suriris la vojon, sur kiu intelektuloj kombiniĝas kun la laboristaro kaj kamparanaro kaj kun praktiko.

REVELACIO

En 1958 por efektiviĝi la principon de la Partio “Eduko devas servi al la proleta politiko, eduko devas kombiniĝi kun produkta laboro”, la Pekina Ferŝtala Teknologia Instituto fondis kelkajn fabrikojn. Tiutempe estis konstruita en la korto de la Instituto ankaŭ malgranda silicifera fandforno. Sed apenaŭ post kelkfojaj uzoj ĝia stato pli kaj pli malboniĝis neatendite: fero ne elfluis el la malfermita elfluejo. La instruistoj kaj studentoj iris kaj reiris ĉirkaŭ la fandforno, sed neniu povis trovi la kialon kaj ian solvon. Profesoro Ĝu Gjue, kiu instruis pri feraloj, ŝvitis de klopodo ĉe la fandforno kaj sin trovis en hontiga senhelpeco.

Fronte al tiu ĉi okazaĵo la kompartia komitato de la Instituto alvokis ĉiujn geinstruistojn kaj gestudentojn lerni de la laboristoj kaj de produkta praktiko. Ili invitis al si veteranan laboriston el iu feraloja fabriko en la antaŭurbo de Pekino. La laboristo detale esploris la fandforon kaj diris al ili, ke la kialo de malboniĝo de la fandforna stato estas, ke ili uzis tro grandajn koaksopecojn. Poste, ili malgrandigis la pecojn de koakso laŭ la opinio de la veterana laboristo, kaj la stato de la fandforno iom post iom boniĝis.

Nur en tiu tempo profesoro Ĝu Gjue ekkomprenis, ke lia manko ja estiĝis pro manko de praktiko kaj senpripensa apliko de libraj scioj. La normo de koaksopeco priskribita en libro, estas difinita por grandaj fandfornoj, tial ĝi ne taŭgas por malgrandaj fandfornoj.

Tiu ĉi okazaĵo donis al profesoro Ĝu Gjue grandan revelacion. Li rimarkis, kian grandan malutilon alportis blinda kredo al libroj kaj forteniĝo de praktiko.

DIREKTO

En la pasinteco, profesoro Ĝu Gjue pensis: por ebligi al profesoro doni multajn kaj riĉajn

sciojn al la gestudentoj, la sola rimedo estas multe legi librojn, multe studi literaturojn sidante en biblioteko. Oni povas posedi la frukton de plurjara esplorado de aliuloj per studo de iliaj literaturoj dum nur kelkaj aŭ kelkdek horoj. Se oni irus en fabrikojn por lerni el la praktiko kaj konduki sciencan esploron, oni devus elspezi multe da tempo, sed povus rikolti nur malmulte, kaj eĉ devus riski malsukceson. Tial li tre malofte tuŝis praktikajn problemojn en produktado.

Sed la dirita okazaĵo komprenigis al profesoro Ĝu Gjue, ke lia antaŭa opinio eraras.

Kian vojon do la intelektuloj devas iri? Profesoro Ĝu Gjue trovis korektan direkton en la verkoj de Prezidanto Maŭ Zedong.

En la artikolo *Ĝustigo de la Laborstilo de la Partio* Prezidanto Maŭ Zedong diris: “Mi konsilas al tiuj, kiuj havas nur librajn sciojn, sed ankoraŭ ne tuŝis praktikon, aŭ kiuj havas ankoraŭ malmulte da praktikaj spertoj, ke ili konu siajn mankojn kaj sin tenu modestaj. Kiamaniere oni povas fari tiujn, kiuj havas nur librajn sciojn, veraj intelektuloj? La sola vojo estas partoprenigi ilin en praktikan laboron, fari ilin praktikaj laborantoj kaj igi tiujn, kiuj sin okupas je teoria laboro, studi gravajn praktikajn problemojn.” Profesoro Ĝu pripensadis tiujn ĉi vortojn, kaj ju pli multe li pripensis, des pli klarvida li fariĝis. Li decidis agadi laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ Zedong, eliri el sia legejo kaj ĵeti sin en la praktikon por sin hardi kaj lerni.

PRAKTIKO

Profesoro Ĝu kuraĝe eliris el sia legejo, kaj vere suriris la korektan vojon kombini teorion kun praktiko. Iufoje li vidis en ŝtalfabriko, ke oni eksperimentis novan metodon de ŝtalingota muldado. Li trovis, ke la kvalito de muldado estas malbona. Por trovi la kaŭzon de la difekto profesoro Ĝu la tutan tagon observadis la procedojn de muldado. Li detale kontrolis ĉiun procedon de muldado, atente pririgardis la “cikatrojn” sur la superaĵo de ŝtalingotoj, kaj deprenis kelkajn pecojn de sur ŝtalingoto por plua ekzameno. Fine li trovis, ke tiun difekton kaŭzis la pajlo, per kiu oni kovris la skorion sur la ŝtalfluido. Li do konsilis al la fabriko ne plu uzi pajlon. La fabriko akceptis lian konsilon, kaj la nova metodo de muldado sukcesis.

Antaŭe, kiam profesoro Ĝu sin fermadis en la leĝejo, li eĉ ne povis iel elimini la malboniĝon de malgranda silicifera fandforno. Sed nun, post kiam li iris el la leĝejo en praktikon, vere kuniĝis kun laboristoj, kaj kombinis sian studon kun produkta praktiko, liaj libraj scioj rapide fariĝis praktikaj.

REFORMO

Profesoro Ĝu instruadis pri feraloj jam multajn jarojn. Sed antaŭ 1958, en sia instruado li ĉiam uzadis eksterlandajn lernolibrojn, kies enhavo estas abunda je malgravaj detaloj kaj malklara en teoria sistemo. Krome, ankaŭ lia instrumentado estis malkorekta, tial estis malfacile por la gestudentoj bone ellerni la lecionojn. Sed post kiam li enpenetris en produktan praktikon, li rimarkis, ke inter la libraj scioj kaj la produkta

praktiko ekzistas granda distanco. Li komencis atenti pri suĉado de praktikaj scioj el produkta praktiko. Li laŭeble aldonis al sia instrumaterialo rezultatojn de sia scienca esplorado kaj la fenomenojn nove trovitajn de li mem en produktado. Krome, li ankaŭ kolektadas koncernajn objektojn por plimultigi la perceptajn konojn de la gestudentoj. Post tiu ŝanĝiĝo, la gestudentoj diris: "Nun la lecionoj instruitaj de profesoro Ĝu enhavas kaj teorion kaj praktikon, ili estas pli facile kompreneblaj." Dank' al akumulado de praktikaj scioj dum la lastaj jaroj li radikale reviziis sian lernolibron pri feraloj kaj akiris grandan sukceson.

La vojo kombini teorion kun praktiko, kiun laŭiras profesoro Ĝu, estas la revolucia vojo, kiun nepre devas iri ĉiuj intelektuloj de la nova Ĉinio.

Post Mia Reveno de Francio

HUANG JUNG-AN

Vic-esploristo de la Instituto de Eksperimenta Biologio, de la Ĉina Akademio de Sciencoj

PASIS jam kvar jaroj post mia reveno de Francio al mia patrio. Mi volas paroli ĉi tie pri mia impreso post la reveno.

Ne longe post la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, mia familio transloĝiĝis de Gulang-insulo al Vjetnamio. Tiam mi havis nur dek jarojn. Diplomite de supera mezlernejo tie en 1947, mi iris al Francio por daŭrigi mian studon en universitato. Post diplomigo de la Medicina Fakultato de Pariza Universitato, mi faris esploran laboron en hospitaloj kaj biologiaj institutoj en Parizo. En 1960, mi revenis, kune kun mia edzino, al la patrolando.

Mi memoras ke mi havis kontraŭdiran animstaton kiam mi unue deziris reveni hejmlanden: Unufanke mi deziregis reveni al la longe forlasita patrolando por partopreni en ĝia konstruado, kaj aliflanke mi dubis, ĉu la ekipaĵoj por scienca esploro estas nun idealaj, ĉar en la pasinteco la sciencaj aferoj en Ĉinio estis tre postlasintaj. Kaj, ĉar mi okupiĝas pri fundamenta teoria esploro, mi

dubis, ĉu mi estos devigata ŝanĝi mian karieron post mia reveno al la hejmlando. Krome, mi timis pro dubo ĉu estas efikaj medikamentoj kaj spertaj kuracistoj en Ĉinio por kuraci mian reŭmatisman kormalsanon. Ne longe post mia reveno, ĉiuj tiuj ĉi duboj malaperis antaŭ la faktoj, kaj la antaŭa maltrankvilo pruviĝas nenecesa.

Post la reveno de mi kaj mia edzino, la registaro unue invitis nin viziti la institutojn de bioĥemio, fiziologio, eksperimenta biologio, organika ĥemio, farmacio ktp. de la Ĉina Akademio de Sciencoj, kaj poste, laŭ nia deziro, faris aranĝon por min partoprenigi en la laboro de la Instituto de Eksperimenta Biologio, kaj mia edzino en la Instituto de Organika Ĥemio. Mi miregis dum la vizito al la institutoj, ke multaj el la institutoj havas kompletajn modernajn aparatojn kaj ekipaĵojn, ne malpli bonajn ol tiuj de fremdlandoj, per kiuj oni povas oportune fari esploran laboron. Mi ankaŭ informiĝis per la enkondukoj de la respondecaj oficistoj, ke multaj esploraj temoj de tiuj institutoj estas

problemoj ne solvitaj en internacia nivelo, el kiuj ne malmultaj apartenas al la sfero de fundamenta teorio. En la pasintaj kelkaj jaroj, ĉiuj tiuj institutoj akiris ne malmultajn atingojn.

Mi laboras en la Instituto de Eksperimenta Biologio pri la fundamenta teorio de imunologio. Dum la pasintaj jaroj mi pli kaj pli profunde sentis, ke la Popola Registaro alte taksas la sciencan esploradon kaj kreis ĉiajn necesajn kondiĉojn por la disvolviĝo de sciencaj aferoj. Ĉiuj elspezoj kaj ekipaĵoj bezonataj de scienculoj por fari sciencan esploradon estas asignataj de la ŝtato, ne kiel en la kapitalismaj landoj, kie la scienculoj devas pene klopodadi por trovi socian rilaton por akiri iom da esplora fonduso, ne povante sin dediĉi ekskluzive al esploraj laboroj. Dank' al la rapida disvolviĝo de la industriaj teknikoj en Ĉinio dum la lastaj jaroj, multaj novaj modernaj aparatoj estas produktitaj en nia lando, kaj ili estas rekomenditaj al la koncernaj fakoj por uzado tuj post la produktiĝo. Multaj el la aparatoj kiujn mi uzas nun en la Instituto estas faritaj en Ĉinio. Ĉe ni ankaŭ estas ĉiaj ĥemiaĵoj necesaj por esplora laboro, kaj abunda internacia literaturo pri biologio, kio multe faciligas la esploran laboron.


Post mia reveno, mi ankaŭ akiris okazajn partopreni en iuj tutlandaj akademaj kunvenoj. Lastjare mi ĉeestis la unuan tutlandan kunvenon de imunologio. En tiu kunveno, pli ol cent artikoloj estis legitaj, multaj el kiuj estis de sufiĉe alta nivelo. Ankaŭ la esplora laboro de nia biologia instituto altiris atenton de la scienculoj. Mi ĉeestis ankaŭ la akademajn kunvenojn okazigitajn de la tutlandaj societoj de zoologio, onkologio, ktp. En tiuj

kunvenoj mi trovis ke multaj artikoloj de alta nivelo estas verkitaj de junaj esploristoj, dum iuj estas rezultoj de maljunaj scienculoj. Ankaŭ la artikoloj "Kontraŭkorpoj Produktitaj de Limfonodaj Ĉeloj en Vitro" kaj "Kontraŭkorpoj Produktitaj de Limfonodaj Ĉeloj en Fremda Korpo" verkitaj de mi kaj miaj asistantoj estis legitaj kun unuaj sukcesoj.

La loĝejo asignita de la registaro al mi estas proksima al mia laborloko, nur en distanco de kelkminuta piedmarŝo, kun tre kvieta ĉirkaŭaĵo. La gvidantaro de la instituto tre zorgas pri mia sano. Ĉiusomere, ni havas libertempon de ĉirkaŭ unu monato, kaj ni povas iri al Kingdaŭ, Luŝan-montaro, ktp. por pasigi someran libertempon je elspezo de la ŝtato. Ankaŭ mia edzino laboras agrable. Ŝi sin okupas en la esplora laboro de hormono en la laboratorio gvidata de la fama ĥemiisto Huang Minglung. En aprilo lastjare, al nia familio naskiĝis kara infaneto, kiu alportis novan ĝojon al nia vivo.

En la printempo de 1961, kiam mia kormalsano reokazis, la gvidantaro tuj sendis min en la najbaran Jatsen-hospitalon. Dum la kuracado, mi trovis ke iuj medicinaj specialistoj faris apartan esploradon pri la malsanoj de la sanga sistemo de la ĉinoj. Ilia kuracnivelo estas sufiĉe alta kaj ĉi tie estas ankaŭ diversaj efikaj medikamentoj por kormalsanoj. Mi resaniĝis post nur dusemajna restado en la hospitalo. Kiel por la laborantoj en ĉiuj registaraj organizaĵoj, la kuracado estas tute senpaga. Dum mia kuracado, la gvidantaro kaj miaj kolegoj ĉiutage sendis iun por min vidi, donante al mi senton de varmo.

Antaŭ ne longe, ĉar mi atingis iom da sukceso en mia laboro, miaj kolegoj elektis min kiel avangardan laboranton de nia instituto, kio ege min kuraĝigis. En aprilo, 1962, mi ankaŭ ĉeestis la unuan sesion de la kvara komitato de la Tutĉinia Federacio de Junuloj, kaj mi estis elektita kiel ĝia konstanta komitatano. Krome, mi fariĝis ankaŭ komitatano de la Ŝanhaja Asocio de Revenintaj Elmigrantaj Ĉinoj. Partoprenado en tiuj sociaj agadoj ne ĝenas mian laboron de esplorado, sed male donas al mi ŝancojn konatiĝi kun multaj geamikoj kaj informiĝi pri multaj aferoj en- kaj eksterlandaj.



UNU VILAĜA BIBLIOTEKETO KAJ ĜIA BIBLIOTEKISTO

SUN GENGVU



LA ESTABLIĜO DE LA BIBLIOTEKETO

Jen venis novaj libroj, sed ne troviĝis taŭga ĉambro por la biblioteketo. Liu tuj aranĝis ĉambreton en sia domo kaj surmetis la librojn sur longan tablon. Li surskribis apud sia pordego en grandaj ideografiaĵoj la titolon BIBLIOTEKETO DE LIANGGIA-VILAĜO. Tiel do lia ĉambro fariĝis biblioteketo.

Post la establiĝo de la biblioteketo ĉiuvespere oni venas por legi aŭ pruntepreni librojn. Oni proponis ke ĉiuj kolektive aĉetu petrolampon, sed Liu Ĝigie diris ridante: “Ne necesas. Se vi ne venus, mi ja devas same lumigi la ĉambro. Nun mi nur anstataŭigis la malgrandan lampon per la granda.” Kiam venis la vintro, antaŭ la alveno de la legantoj, li jam hejtis la fornon kaj varmigis la ĉambro. Oni diris: “Estas nekonvene, ke vi nin varmigas per via karbo. Ni donu al vi iom da karbo aŭ mono.” Sed Liu decideme rifuzis dirante: “Mi volas nenion pli ol ke vi legu kaj akiru kapablon por plibonigi la produktadon.”

Dum tri sinsekvaj jaroj la biblioteketo de Lianggia-vilaĝo sidis en la hejmo de Liu Ĝigie. La analfabetoj de la vilaĝo pli kaj pli malmultiĝis kaj ĉiam plimultiĝis la intelektaj gejunuloj hejmvilaĝon revenintaj por partopreni la agrokulturan produktadon. La hejmo de Liu jam ne plu povis enteni la legemulojn de la vilaĝo. Tial la partiĉelo de la vilaĝo decidis disponigi unu grandan ĉambro por la biblioteketo. Sed la ĉambro estis malorda kaj malpura, kaj troviĝis en ĝi eĉ ne unu tablo aŭ benko. Kiel ĝi povis servi kiel biblioteketo? Certe oni povus sin turni al la komunumo kun peto, ke ĝi faru riparadon, sed tio pezigos la ŝarĝon de la popolamaso. Liu Ĝigie pensis kaj pensis kaj fine decidis agi laŭ la principo de “ekonomio kaj diligenteco” kaj fari ĉion per siaj propraj manoj. Li ordigis la ĉambro kaj aĉetis per sia mono kolorajn paperojn kaj bele ornamis la ĉambro. Post la interkonsiliĝo kun la lernejo li transprenis ĝiajn difektitajn tablojn kaj benkojn kaj ilin riparinte, li lokigis ilin en la ĉambro. Jen tiamaniere naskiĝis la pura kaj hela biblioteketo.

SERVI LA PRODUKTADON

La biblioteketo pligrandiĝas, kaj samtempe pliiĝas ankaŭ la legantoj, inter kiuj sin trovas ankaŭ alivilaĝanoj kaj eĉ oficistoj kaj laboristoj de la proviza kaj disvenda kooperativo kaj traktora stacio loĝantaj malproksime je pli ol dek lioj venadas por pruntepreni librojn.

Kaj ĉiam pli altiĝas la postuloj de la legantoj. Dum la disvastigo de novtipaj agrokulturaj instrumentoj la komunumanoj venadas ĉi tien por konsulti librojn pro

SUR la monto Omejling, nord-oriente de Linji-gubernio, Ŝanhi-provinco estas Lianggia-vilaĝo, en kies centro sin trovas antikva brika portalo. Ĉiutage ĉe la vesperiĝo sur tiu ĉi arkaĵo brilas ruĝa lanterno. Ĝi servadis tie ekde iu printempa vespero en la jaro 1953, ĝis nun jam pli ol dek jarojn. Tio estas ordinara lanterno, sed ĉiufoje kiam ĝi aperis, legemaj gejunuloj, maljunuloj kun griza barbo kaj infanoj kun ruĝa koltuko en la vilaĝo tuj du- aŭ tri-ope sin turnas en la montratan de ĝi direkton — al la biblioteketo.

La biblioteketo okupas nur unu ĉambro. Ĝi posedas 2,000 ekzemplerojn da libroj kaj krome la *Popolan Ĵurnalon*, la *Ŝanhi-an Ĵurnalon*, la literaturajn gazetojn: *Popola Literaturo*, *Fajrero*, k. a. sume 8 ĵurnalojn kaj gazetojn.

En tiu ĉi malgranda biblioteko estas unu maljunulo kun arĝentaj haroj. Li estas la mastro de la biblioteketo — la bibliotekisto Liu Ĝigie. Kvankam sur lia tuta vizaĝo gravuriĝis profundaj sulkoj, sed li estas plenkla de energio. Li tutkore kaj unuanime servas la popolamasojn, lin subigis neniu malfacilo kaj li faras tiun vilaĝan biblioteketon pli kaj pli bona.

KOMENCIĜO PER OK LIBROJ

Vinre de 1951 en Lianggia-vilaĝo disvolviĝis la movado por elimini analfabetecon. Tiam la popolamasoj urĝe postulis suriri la vojon de klereco, kaj deziris legi librojn kaj ĵurnalojn. Tion vidinte, Liu enpensis: “Kiel bone, estus unu biblioteketo en la vilaĝo!” Kaj li diris sian penson al la sekretario de la partia ĉelo en la vilaĝo, kaj la lasta tuj kuraĝigis lin mobilizi la popolamasojn por starigi biblioteketon per siaj propraj fortoj.

Ĉe la komenco la biblioteketo havis nur unu korbon kun 8 libroj. Kunportante la korbon li rondiradis en la vilaĝo por ke la vilaĝanoj povu legi. De kie do venis la 8 libroj? Ili estis premio donita de la gubernia registaro al la Amatora Teatrotrupo de Lianggia-vilaĝo kiu faris prezenton en la gubernia urbo dum la Printempa Festo de 1951.

Sed estas multe da homoj dezirantaj legi. Kiel oni povas kontentigi ilian bezonon per 8 libroj? Fine Liu elpensis la solvon t. e. mobilizi la popolamasojn oferi monon por aĉeti librojn. En iu mitingo li elmetis sian proponon, kaj ĝi tuj ricevis varmegan aplaŭdon de la popolamaso. Iuj donis 30 cendojn, aliaj — 20 cendojn kaj dum nur nelonga tempo oni jam oferis pli ol 40 juanojn. En la sekvanta tago Liu Ĝigie piediris en la gubernian urbon pli ol 10 kilometrojn foran spite al ĝisoste frosta ventego, elektis kaj aĉetis tie pli ol 150 librojn kaj ilin reportis hejmen.

nelerteco en la manipulado; kiam agrokulturaj instrumentoj difektiĝis oni ankaŭ venadis ĉi tien por konsulti librojn pro manko de scio pri riparado; la brutobredantoj deziras legi librojn pri veterinaro; kaj la komunumaninoj akirintaj kudromaŝinojn deziras legi librojn pri altranĉo de vestoj kaj ankaŭ pri agrokulturaj problemoj kiaj kulturado kaj transplantado de rizplantoj oni deziras akiri helpon de la biblioteko. Ĝiaj libroj ŝajnas ĉiam nesufiĉaj.

Ankaŭ tiun ĉi problemon Liu Ĝigie bone solvis. Li mobilizis ĉiujn donaci aŭ pruntedoni siajn legitajn kaj nebezonatajn librojn al la biblioteketo. Krome li ankaŭ subskribis interkonsenton kun la Kultura Domo de la gubernia urbo pri pogranda pruntado de libroj. Dank' al tio lia biblioteketo seninterrompe liveras novajn librojn por provizi la legantojn, kaj ankaŭ la specialaj bezonoj de iuj legantoj plejparte povis esti kontentigitaj.

RUĜA LANTERNO

Dum la longtempa disvolviĝo de la biblioteketo Liu trovis kaj difinis taŭgan tempon por ĝin malfermi al la komunumanoj konforme al ilia laborkutimo. Sed estis du fojoj, kiam Liu Ĝigie ne povis ĝin malfermi en

la difinita tempo pro kunveno kaj malsano kaj pro tio iuj legantoj vane faris ir-reiradon. Tio elmetis antaŭ Liu novan problemon, li pensis en si, ke la komunumanoj estas tre okupataj je la produktado kaj multaj aliaj aferoj, tial estas nekonvene ke ili malŝparu tempon per vana vizito.

Baldaŭ, ĉe la pordo de la biblioteko aperis ruĝa lanterno. Tion elpensis kaj faris Liu Ĝigie mem laŭ la ruĝa lanterno kiu pendis ĉe la malnovtipaj gastejoj por alvenigi vojaĝantojn. La brila ruĝa lumo altiras la atenton de homoj de malproksime. Ĉiufoje, kiam la biblioteketo malfermiĝas, ĝi tuj aperas por alvoki la legantojn. Kiam la biblioteketo ne funkcias, ĝi ne aperas. Sekve do ne plu okazis vanaj vizitoj.

Dum la pli ol dek jaroj, avo Liu ĉie kaj ĉiam agis tute malegoisme kaj helpeme al aliaj. En ĉio li zorgas la bonon de la popolamasoj kaj ĉiam plibonigas la bibliotekon. Li faris la bibliotekon ne nur ejo por klerigado kaj lernado de teknikoj sed ankaŭ ilo por forigi la malnovajn superstiĉojn pri fantomoj kaj sanktuloj, kaj pli kaj pli multe inspiri la socialismajn pensojn al la gejunuloj, kaj sekve pli kaj pli altiĝas ilia aktiveco en la produktado.

Kuriozaj Plantoj

LONGEVIVAJ ARBOJ

La ĉinaj kriptomerioj (*cryptomeria fortunei*) kiuj kreskas en Tianmumontaro de Ĝegiang-prvoinco kaj


Luŝan-monto de Gianghi-prvoinco, travivis jam mil jarojn kaj havas altecon de 50 metroj kaj trunkan diametron de 3 metroj.

Siĉuan-prvoinco, estas same miljaraj antikvaj arboj.

Multaj el la ruĝaj pinoj (*Pinus koraiensis*) en la primitivaj arbaroj de la Malgranda Hing-an-montaro en nordorienta Ĉinio, estas 40-50 metrojn altaj kaj ĉirkaŭ 1 metron dikaj je trunka diametro.

La plej aĝa arbo en Ĉinio nomiĝas ruĝa cipreso (*Chamaecyparis formosa*) kiu kreskas en Ali-montaro, Tajvan-prvoinco. Ĝi travivis proksimume tri mil jarojn, estas 57 metrojn alta kaj 6.5 metrojn dika je trunka diametro.

Ginko sur Folaj-monto en Lju-gubernio, Ŝandong-prvoinco.



Ankaŭ unu ginko (*Ginkgo biloba*) kiu troviĝas en Folaj-montaro, Lju-gubernio, Ŝandong-prvoinco, estas antikva arbo travivinta proksimume mil jarojn. Ĝi atingis 40-metran altecon, kaj estas 4 metrojn dika je trunka diametro.

La ĉinaj sabinoj (*Sabina chinensis*) en la Templo de Konfucio en Tajan, Ŝandong-prvoinco, kaj la cipresoj antaŭ la Vuhoŭ-templo en Ĉengdu,

RAPIDE KRESKANTAJ ARBOJ

La rapide kreskantaj arboj en Ĉinio nombras pli ol cent speciojn, inter kiuj estas ordinara ĉina abio (*Cunninghamia lanceolata*) kaj paŭlovnio (*Paulownia fortunei*). La lasta estas la plej rapidkreskanta, kiu povas kreski 2-3 metrojn je alteco en ĉiu jaro.

KIEL USONO

DISŜIRIS LA ĜENEVAJN

INTERKONSENTOJN

EN julio, 1954, la Ĝeneva Konferenco atingis interkonsentojn pri la restarigo de paco en Hindoĉinio. Sed en la pasintaj 11 jaroj, la artikoloj pri la problemoj de Vjetnamio difinitaj en la Ĝenevaj Interkonsentoj estis ne nur ne efektivitaj sed eĉ senskrupule tretitaj kaj tute detruitaj de Usono. Tio ĉi estas la kaŭzo kial estiĝis la streĉa situacio en Hindoĉinio.

Bonvolu legi la jenajn faktojn:

Fina Deklaracio de la Ĝeneva Konferenco diras, ke la milita limlinio sur la 17-a Paralelo de Vjetnamio estas "provizora limlinio, kiu neniel devas esti eksplikita kiel politika aŭ teritoria limo", kaj ke Vjetnamio devas entrepreni liberan ĝeneralan elektadon tra la tuta lando surbaze de unuanimeco tra interkonsiliĝo de la Nordo kaj Sudo de Vjetnamio kaj realigi pacan unuiĝon antaŭ julio de 1956. Sed en la tago, kiam la interkonsentoj estis subskribitaj, la tiama usona ministro de defendo C. E. Wilson jam deklaris: "La militan limlinion de Vjetnamio, same kiel tiun en Koreio, Usono gardados je ĉiu ajn tempo." Kaj la sekvintan tagon, Eisenhower, la eksprezidanto de Usono, arbitre deklaris, ke Usono ne estas devo-ligita de la decidoj de la Ĝeneva Konferenco. Sekve de tio, apogate de Usono, Ngo Dinh Dziem okazigis kontraŭlegan elektadon en marto de 1956 kaj fondis la t. n. Vjetnaman Respublikon, tiel detruante la eblecon efektiviĝi pacan unuiĝon de Vjetnamio laŭ la Ĝenevaj Interkonsentoj.

La punkto C de la 14-a artikolo de la Interkonsento pri Ĉesigo de Antagonismaj Agoj en Vjetnamio (en

mallongigo ĉisube la Ĝeneva Interkonsento) difinis: "Ĉiu partio interkonsentas sin deteni de ajna venĝo aŭ diferencigo kontraŭ individuoj aŭ kolektivo pro iliaj agoj dum antagonisma aktivado kaj garanti iliajn demokratiojn kaj liberecojn." Sed post la armistiko, la kliko de Ngo Dinh Dziem instigate kaj subtenate de Usono faris frenezajn venĝon kaj subpremon al la antaŭaj rezistantoj kaj patriotoj. Ekzemple en decembro, 1958, la Uson-Dziema kliko barbare venenmasakris pli ol mil el ili en koncentrejo de Fu Loi. Dum la periodo de ĉ. 11 jaroj, Usono kaj la pupa reĝimo en Sajgono mortigis 170,000 personojn per tiaj teruraj manieroj kiaj stranĉo de ventro, elpreno de koro k. a., batis ĝis vundiĝo kaj torturis ĝis kripliĝo ĉ. 800,000 personojn kaj malliberigis pli ol 400,000 personojn en pli ol 1,000 karceroj. Inter tiuj viktimoj estis granda nombro da eksrezistantoj en la rezistmilito.

La 16-a artikolo de la Ĝeneva Interkonsento difinis: "Estas malpermesate enporti en Vjetnamion ĉiajn ajn helpotrupojn kaj aldonajn militajn personojn." Post la armistiko Usono ne nur ne fortiris sian grupon de militaj konsilistoj, kiu jam estis en suda Vjetnamio antaŭe, sed kontraŭe eĉ senĉese ensendis militajn personojn, multe pligrandigante la militajn fortojn de Usono en Vjetnamio. Antaŭ la armistiko, Usono havis 200 militajn personojn en suda Vjetnamio, en 1957 ili pliiĝis ĉ. 2,000, ĉe la fino de 1961 ĝis 3,500, ĉe la fino de 1963 ĝis 25,000, kaj nun ili jam nombriĝas je pli ol 50,000. Krome, Usono ankaŭ instigis sudan Koreion sendi 2,000 armeanojn al suda Vjetnamio.

La punkto A de la 17-a artikolo de la Ĝeneva Interkonsento difinis: "Estas malpermesate enporti en Vjetnamion aldonajn armilojn diverstipajn, municion kaj aliajn militan materialon kiaj militaj aeroplanoj, militaj ŝipoj, kanonoj, jetmaŝinoj kaj jetarmiloj kaj kirasveturiloj." Usono publike malobservis tiun ĉi decidon kaj seninterrompe sendis aldone grandajn kvantojn da militaj provizaĵoj al suda Vjetnamio. Ekde la jarfino de 1954 ĝis marto de 1963, Usono kontraŭleĝe enportis en sudan Vjetnamion 1,606 ŝipojn kaj 3,643 aviadilojn da militaj provizaĵoj. Ĝis nun Usono enportis en sudan Vjetnamion 2,000 diversajn aviadilojn, pli ol 800 diversajn ŝipojn, centojn da tankoj kaj kirasautoj, kaj pli ol 100,000 tunojn da armiloj kaj militaj ekipaĵoj. Kaj lastatempe, Usono sendis en sudan Vjetnamion ankaŭ direktatajn jetarmilojn kaj strategiajn B-57-bombaeroplanojn.

La 18-a artikolo de la dirita Interkonsento difinis: "Estas malpermesate starigi novajn militbazojn en la tuta teritorio de Vjetnamio." Kaj ĝia 19-a artikolo difinis: "Nenia militbazo kontrolata de fremdlando povas esti establita en la regroupiĝaj zonoj de ĉiu partio." En 1954, kiam efektiviĝis la armistiko, en suda Vjetnamio estis nur 6 militaj aerodromoj, sed nun Usono jam konstruis tie 169 aerodromojn. Ĝi konstruis, krome, 11 militajn havenojn kun modernaj ekipaĵoj kaj trafikajn sistemon de strategiaj ŝoseoj en suda Vjetnamio. La tuta suda Vjetnamio jam fariĝis milita bazo de Usono por ĝia agreso al sudorienta Azio.

La 19-a artikolo de la Interkonsento difinis: "La du partioj devas

garantii, ke la zonoj asignitaj al ili ne aliĝu al iu ajn milita alianco, nek estu uzataj por rekomenco de antagonismaj agoj aŭ servo al agresiva politiko.” Pli ol unu monaton post la subskribo de la Ĝenevaj Interkonsentoj, Usono knedisian Sudorientazian Traktatan Organizon kaj arbitre metis sudan Vjetnamion sub la “protektion” de tiu milita bloko. Sub la ŝildo de “helpo”, Usono elspezis pli ol 4,000,000,000 dolarojn por subteni

la plej reakcian pupan reĝimon, starigi la plej malluman faŝisman regadon, pligrandigis la pupan armeon ĝis 600,000 personoj kun usonaj ekipaĵoj kaj ŝanĝis sudan Vjetnamion en eksperimentejon de “speciala milito”. En tiu ĉi abomeninda “speciala milito” fabrikita sole de Usono, la usonaj imperiistoj mortigis popolanojn de suda Vjetnamio ne nur per paŝiloj kaj bajonetoj, sed ankaŭ napalm-bomboj, fosfor-incendiojaj bomboj, venen-ĥemiaĵoj kaj ve-

ngasoj. Suda Vjetnamio havas nur areon de 170,000 kvadrataj kilometroj kaj 14,000,000 loĝantojn, sed la usona imperiismo lanĉis en ĝi la plej barbaran, plej krue-lan kaj plej grandan militon en la nuna mondo.

La nerefuteblaj faktoj pruvis, ke la usona imperiismo estas la plej senhonta detruanto de la Ĝenevaj Interkonsentoj. Ĝi faris inferajn krimagojn kontraŭ la vjetnama popolo.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ



OBSERVATORIO SUR HIMALAJOJ

Observatorio estas establita en Ĉinio sur montsupro de Himalajoj. Tiu observatorio liveras meteorologiajn antaŭsciigojn por ke la lokaj kamparanoj en Tibeto alpreno ĝustatempe antaŭgardan rimedon kontraŭ malbona vetero.

ESTAS PLI OL 400 SPECOJ DE BIRDOJ KAJ BESTOJ SUR HAJNAN-INSULO

Zoologia esplora grupo de la Ĉina Akademio de Sciencoj laboranta en suda Ĉinio konfirmis post plurjaraj enketo kaj esploro la ekziston de pli ol 400 specoj de birdoj kaj bestoj sur Hajnan-insulo, kelkaj el ili estas maloftaj en Ĉinio kaj en la mondo. Ekzemple sambaro, nigra gibono, resus-simio, ruĝa cervo, malgranda cibetkato, hajnan-leporo k. a.

DUONLABORA-DUONLERNAJ MEZLERNEJOJ EN PEKINO

Ekde la pasinta jaro, en Pekino kaj ĝiaj antaŭurboj fondiĝis jam 70 duonlabora-duonlernaj kaj duonterkultura-duonlernaj mezlernejoj.

En 29 duonlabora-duonlernaj lernejoj funkciigataj de fabrikoj nun sin trovas maŝinkonstrua, kotonŝpina kaj aliaj sume 45 fakoj, en kiuj universitataj diplomitoj kaj teknikistoj instruas pri la fundamentaj kaj fakaj lecionoj. En 41

duonterkultura-duonlernaj lernejoj en la antaŭurboj la lernantoj ĝenerale praktikas la principon “labori en la brigado, manĝi kaj dormi en la hejmo kaj lerni en la lernejo”. Krom lernigo en klasĉambro iuj lernejoj invitis ankaŭ famajn agrokulturajn labormodelulojn por fari instruadon sur la kampoj por konigi al lernantoj la terkulturajn teknikojn kaj spertojn.

LA SEMAJNO DE SCIENCOPOPULARIGAJ FILMOJ

En ok urboj, nome: Pekino, Ŝanhajo, Kanton, Hi-an, Ŝenjang, Vuhan, Tiangin kaj Ĉengdu sinsekve okazis ekde aprilo la propaganda semajno de sicencopopularigaj filmoj.

En tiu periodo estis projekciataj multaj filmoj kun enhavo rekte ligitaj kun la industria kaj agrokultura produktado, disvastigo de novaj teknikoj kaj ĝeneraligo de fundamentaj scioj de fiziko, kemio, biologio, astronomio kaj meteorologio, edukado, higieno, fizika kulturo k. a.

La nomita kino-semajno en Pekino komenciĝis de la 3-a de aprilo. En 13 kinoteatroj estis prezentitaj 61 sciencopopularigaj filmoj. Inter ili troviĝis la novaj filmoj “Nigraspika malsano de tritiko”, “Plantido-kulturo sub plasta membrano”, “Ŝtofo el ligno”, “Teksaĵo el kemiaj fibroj”.

ŜANHAJAJ KAMPARANOJ LUDIS TEATRAĴOJN

En la printempo de la kuranta jaro okazis en Ŝanhajo prezentado de literaturaj kaj artaj verkoj de

kamparanoj. Pli ol 200 kamparanaj neprofesiaj aktoroj prezentis pli ol 50 malgrandajn kaj variajn programerojn, spegulantajn de multaj flankoj la novan fizionomion de socialisma kamparo. Du neprofesiaj aŭtoroj de la Ĥiuvu-a Popola Komunumo en Songgiang-gubernio verkis unuaktan Ŝanhajan Operon “Filino de Malriĉ-kamparano” laŭ veraj homoj kaj okazaĵoj priskribantan la bonan karakteron de malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj kiuj havas klaran amon kaj malamon kaj arde amasian kolektivon en klasbatalo.

LA VILAĜA KULTURLABORA GRUPO

Depost la Vilaĝaj Kulturlaboraj Grupoj ekstarigis vintre de 1963 en diversaj lokoj en Ŝanhi-provinco, pli ol 3,000 personoj jam partoprenis en la grupoj laŭ statistiko pri 57 gubernioj kaj urboj. Tiuj laborgrupoj aktivas ĉefe en montaj vilaĝoj. Ili faras propagandon kaj prezentadon de literaturartaj programoj sur stratoj, en teatroj kaj ĉe kampoj, iuj el ili eĉ iras al la domoj de komunumanoj por prezenti programon speciale por kadukaj maljunuloj. Estas Tri-homa Kulturlabora Grupo en Hunjuan, kiu penetris en la forajn vilaĝojn de la monta regiono, kun repertuaro de 24 programeroj, du serioj da ekspozaj bildoj kaj certaj materialoj por kanto kaj prezentado, faris sume 32 prezentadojn dum 25 tagoj, kaj elmontris 21-foje la bildkolekton, altirante al si rigardantaron de pli ol 10,000 personoj.

LA UNUA AZI-AFRIKA KONFERENCO

EKDE la 18a ĝis la 24a de aprilo, 1955, la registaraj reprezentantoj de 29 azi-afrikaj landoj kaj regionoj kunvenis en Bandung, Indonezio, la unuan fojon ekster UNO, sen partopreno de la okcidentaj koloniismaj landoj, libere kontaktante unu kun alia kaj diskutante pri problemoj kiuj interesas ĉiujn landojn en Azio kaj Afriko.

Oponi koloniismon kaj batali por akiri kaj defendi nacian sendependecon estis la fundamenta problemo de ĉi tiu konferenco, kiu proklamis ke "koloniismo en ĉiuj ĝiaj esprimoj estas plago kiun oni devas rapide elradiki". La konferenco akceptis la rezoluciojn pri ekonomia kunlaboro, kultura kunlaboro, homaj rajtoj kaj memdecido, la popolo de dependantaj regionoj kaj aliaj problemoj. Ĝi aprobis ankaŭ la rezolucion kaj deklaron pri akcelado de la mondpaco kaj kunlaboro. Ili estis enskribitaj en la lasta komuniko de la konferenco.

En la deklario pri akcelado de la mondpaco kaj kunlaboro oni elmetis la dek principojn pri paca kunezisto, amikeco kaj kunlaboro de la koncernaj landoj. Ĝia enhavo konsistas ĉefe el la jenaj: respekto al la bazaj homaj rajtoj; respekto al la integreco de la suvereneco kaj teritorio de ĉiuj landoj; agnosko de egaleco por ĉiuj raso kaj ĉiuj landoj, grandaj kaj malgrandaj; neinterveno kaj neenmiksiĝo en la internaj aferoj de aliaj landoj; ne atenco kontraŭ alilandaj teritoria integreco kaj politika sendependado per agresaj agadoj kaj minacoj aŭ per fortoj; solvado de ĉiuj internaciaj disputoj per paca rimedo; akcelado de reciprokaj avantaĝoj kaj kunlaboro; respekto al justeco kaj internacia devo.

La 13an de majo, 1955, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj montris en la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj de la Ĉina Popola Respubliko: "La Azi-Afrika Konferenco jam rikoltis grandan sukceson. Tra ĉiuj ĝiaj

rezolucioj esprimiĝas la komuna deziro de ĉiuj popoloj en Azio kaj Afriko akiri kaj defendi sendependecon kaj liberon, defendi la mondpacon, akceli amikecon kaj kunlaboron." Li diris: "La konferenco plialtigis la nacian konscion de ĉiuj popoloj en Azio kaj Afriko, akcelis la interkompreniĝon de ĉiuj landoj de Azio kaj Afriko kaj malfermis novan vojon al internacia kunlaborado."

Tiu konferenco estis iniciatita kune de la kvin landoj Birmo, Cejlono, Hindio, Indonezio kaj Pakistano en decembro, 1954, dum kunveno en Bogor, Indonezio. Krom la iniciatintaj landoj, la konferenco partoprenis ankaŭ Afganio, Kamboĝo, Ĉinio, Egiptio, Etiopio, Ganao, Irano, Irako, Japanio, Jordano, Laoso, Libano, Liberio, Libio, Nepalo, Filipinoj, Saŭdi-Arabio, Sudano, Sirio, Tajlando, Turkio, la Demokratia Respubliko de Vjetnamio, Sud-vjetnamio, Jemeno. La ĉinan delegacion gvidis Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj.

ĈEN HI:

La Nangiangoj



*"Malsaĝaj" estas ni Nangiangoj la loĝantoj,
Nin plaĉas sovaĝfluoj kaj altaj montgigantoj.*

*La montoj altas, sed mi havas fer-piedojn,
Junginte flugajn nubojn mi plugas montparcelojn;*


*La vojoj krutas, sed mi bravas leoparde,
Svingante mi hakilon, konstruas vojojn arde!*

*Profundas l' akvoj, sed mi havas longajn krurojn,
Junginte l' Drakodion al ŝip' travojas fluojn;*

*La ondoj bolas — lertas mi en ond-penetro,
Kaj ilin mi peladas por kreo de elektro!*

*La montoj kaj riveroj ja ĉiuj estas bonaj,
En miaj manoj ili fariĝas fruktodonaj.*

Trad. Laŭlum



La loko (kun signo X) ĉe Gongvangling kie la fosilioj de simioho mo de Lantian estis elterigitaj.

EN 1964, ĉinaj sciencaj laborantoj elfosis kranion de simiohomo vivinta antaŭ kvin aŭ ses-cent mil jaroj en Gongvangling de Lantian-gubernio, Ŝenhi-provinco. Tion alte taksis la paleoantropologoj de Ĉinio kaj de aliaj landoj. La malkovro donis ege valorajn materialojn al la esplorado de la homa origino.

La gubernio Lantian situas sudoriente de Hi-an, la ĉefurbo de Ŝenhi-provinco. Ĉi tie preskaŭ en ĉiu el la tertavoloj de antaŭ 70,000,000 jaroj ĝis holoceno, oni povas trovi fosiliojn de antikvaj animaloj. Tial sciencaj laborantoj diris ke ili estas sufiĉe kompleta "historio de la naturo" en kenozoiko.

La sciencaj laborantoj de la Laboratorio de Kenozoika Stratumoscienco de la Instituto de Vertebra Paleontologio kaj Paleoantropologio de la Ĉina Akademio de Sciencoj laŭ la materialo donita de la geologiistoj faris esploron pri geologiaj pravivaĵoj en Lantian dum la somero de 1963. Ili enketis al koncernaj organizoj kaj lokaj popolanoj la tiean elfosadon de fosilioj kaj ankaŭ fosesploris la koncernajn lokojn. Fine ili trovis unu sendifektan malsupran makzelon de simiohomo ĉe la vilaĝo Ĉengiavo de Lantian-gubernio kaj elfosis 5 kestegojn da fosilioj en Gongvangling de tiu gubernio. Inter ili troviĝis fosilioj de tiaj longlonge malaperintaj animaloj de la kenozoika periodo, kiaj estas sanmen-a ĉevalo, ĝili-a lupo, praurseto, hieno k. a.

La malkovro de la malsupra makzelo de simiohomo altiris grandan atenton kaj ricevis altan takson de la koncernaj fakaj rondoj kaj individuoj en nia lando. Jen estas unu plia loko kie simiohoma fosilio estas trovita, krom Ĝoŭkoŭdian de Pekino.

Surbaze de vasta enketo kaj esplorado, la nomita laboratorio de la Ĉina Akademio de Sciencoj en kunlaborado de aliaj 11 organizoj de scienca esplorado kaj altaj lernejoj de la lando inkluzive de sciencistoj pri vertebra paleontologio kaj paleoantropologio, geografio, fiziografio, glaciologio, paleobotaniko, sedimenta geologio ktp. sin organizis en aprilo, 1964 en grandan grupon de esplorado kaj iris al Lantian kaj ĝia ĉirkaŭaĵo por fari ĝeneralan geologian esploron pri la kenozoiko kaj elfosadon de pravivaĵaj fosilioj. Tiun esploran grupon persone gvidis la arkeologo Gia Lanpo kiel ĝia estro.

Fine de majo, unu el ĝiaj taĉmentoj elfosis denton de simiohomo ĉe Gongvangling. Tio montris ke en tiu

GI VANG:

HOMO

loko eble sin trovas aliaj restaĵoj de simiohomo kaj vekis grandan intereson ĉe la esplorantoj. Pli ampleksa fosesploro iris streĉe. Sed tre dense lokitaj estis la animalaj fosilioj ĉe Gongvangling kaj ĉiuj ili estis kungluiĝintaj kun solidaj rokoj kaj mola tero kaj ili estas facile rompeblaj. Tial la esplorantoj metis la blokojn kun fosilioj, kiujn ili elfosis, en kestojn kaj ilin transportis al Pekino por prilaborado en ĉambroj. Estis sume pli ol cent kestoj, el kiuj la granda kesto entenanta blokon kun fosilioj elfositan malsupre de la loko, kie oni malkovris la denton de simiohomo, sola pezis pli ol 400 kilogramojn.

Komence de oktobro, 1964, post streĉa prilaborado enĉambra, oni denove elprenis unu denton de simiohomo el la sama solida blokego kun alia simiohoma dento malkovrita ĉe Gongvangling. La 12-an de okt., parte aperis la kranio de simiohomo. Post zorga prilaboro fine oni povas vidi la sendifektan verton de la kranio, kaj ke la antaŭaj partoj de la okulkavoj kaj pliparto de la nazosto estas konservataj, kune kun parto de la dekstra tempio, plejparto de la dekstra supra makzelo kaj parto de la maldekstra supra makzelo. Tiu kranio evidente karakteriziĝas per primitiveco, ekzemple, la vertosto estas tre malalta, la kranio tre dika, estas dikaj elstaraj osteĝoj super la okulkavoj, kiuj interligiĝas super la nazo.

Samtempe elprenitaj estis multaj fosilioj de mamuloj kaj aliaj bestoj, inter kiuj estas, laŭ paleontologoj, stegodonto, praurseto, sabrodenta tigo, sanmen-a ĉevalo, tapiro, kornega cervo, praa sovaĝbovo k. a.

Laŭ la pozicio de la tertavolo kie la kranio de simiohomo estis malkovrita kaj laŭ aliaj animalaj fosilioj, sciencistoj unuapaze determinis ke la fosiliohava tertavolo estas de la komenca periodo de la meza plioceno de kvaternara periodo, tio signifas, ke la simiohoma kranio trovita ĉe Lantian estas de pli frua tempo ol tiu de la ĉina simiohomo trovita ĉe Ĝoŭkoŭdian, Pekino.

La simiohoma kranio trovita ĉe Lantian estas granda rikolto en la esplora laboro de paleoantropologio en Ĉinio post la Liberiĝo. El la 4 simiohomaj kranioj malkovritaj en la mondo inkluzive de tiu de Lantian 2 estas elterigitaj en Ĉinio. Sed la kvin simiohomaj kranioj kompare kompletaj kaj granda nombro da simiohomaj fosilioj malkovritaj ĉe Ĝoŭkoŭdian, Pekino, en 1929 de la ĉinaj sciencistoj estis forportitaj de usonaj imperiistoj kaj malaperis oni ne scias kien jam antaŭ longe. Nun ni trovis denove fosiliojn de la plej frua prahomo en la mondo, tio donas tre gravan materialon ne nur por nia studo de paleoantropologio kaj la evolua historio de la homaro, sed ankaŭ por kompreni per la studo, sub kiaj

ANTAŬ 500,000 JAROJ


— Pri la malkovro de simiohoma fosilio en Lantian

kondiĉoj de klimato vivis kaj evoluis la homaro antaŭ la skriba historio, kiajn ŝanĝojn ĝi intertempe havis kaj kie ĝi sin trovis ktp.


La malkovro de la simiohoma kranio havas gravan signifon en scienco. Koncerne la devenon kaj evoluon de la homaro, estas ĝis nun du malsamaj opinioj la scienca materialisma kaj la superstiĉa ideisma. Nun jam ne estas multaj kiuj kredas ke la homo estis kreita de Dio, sed oni ankoraŭ ne bone scias la detalojn kiel simio transformiĝis en neohomon, kaj kiel la prahomoj evoluis ŝtupo-post-ŝtupe en diversajn homrasojn de la nuna mondo. Estis en la dua duono de la lasta jarcento, la fama biologo Charles Darwin (1809-82) elmetis sian teorion ke la homo devenis de prasimio en la libro *Origino de Specioj*. Kaj en sia artikolo *La Rolo de Laboro en Transformiĝo de Simio en Homon* la granda revolucia gvidanto F. Engels pluapaŝe eksplikis, ke la decidiga faktoro de la homa evoluo estas laboro kaj elmetis la faman teorion ke "laboro kreis la homaron". Tamen neniu simiohoma fosilio estis malkovrita en tiu tempo, nek eĉ fosilio de prahomo de pli malfrua periodo. Nuntempe en la mondo estas 4 lokoj, nome, Java de Indonezio, Ĝoukoŭdian de Ĉinio, Terifing de Alĝerio kaj Lantian de Ĉinio, kie troviĝis simiohomaj fosilioj. Kaj la malkovro de simiohoma kranio en Lantian liveris al ni novan valoran pruvon, kiu montras ke en laboro la homaro reformis sin mem kaj reformis ankaŭ la objektivan mondon kaj akcelis la procezon de evoluo.

La malkovro montris ankaŭ la impetan disvolviĝon de la scienca laboro en Ĉinio post la Liberiĝo. Oni komparu tiun ĉi elfosan laboron kun tiu ĉe Ĝoukoŭdian: en la lasta oni malkovris la unuan simiohoman kranion en 1929, 8 jarojn post kiam oni malkovris la unuan denton de simiohomo en 1921. Ĉar la tiama registaro, putra kaj reakcia, tute ne volis elspezi monon por sciencaj aferoj, tial la elfosado ĉe Ĝoukoŭdian povis esti farata nur per la monrimedoj de la Rockefeller-a Fonduso de Usono, tiel ke la tuta laboro de elfosado kaj esplorado estis tenata en la manoj de usonanoj kaj ĉiuj fosilioj de simiohomaj kranioj kaj la granda kvanto da aliaj simiohomaj fosilioj estis forportitaj neniu scias kien. Sed ĉifoje nur en unu jaro oni jam malkovris la kranion de simiohomo post kiam oni malkovris la unuan denton de simiohomo, kaj la tuta laboro estis entreprenata de ni ĉinoj mem. Ne-

imagebla kaj nefarebla estis tia laboro en la malnova Ĉinio sub la ĉiumaniera supertiranado de la imperiistoj, kie la sciencajn esploradojn oni pritaksis negravaj.



La interno de la simiohoma kranio trovita en Lantian.



Fronto de la simiohoma kranio de Lantian, kies pliparto ankoraŭ kaŝiĝas en la ŝtono.

LA HOMFO- SILIOJ MALKOV- RITAJ EN ĈINIO

ĈINIO estas unu el la landoj kie troviĝas subtere abundo da homfosilioj. Multaj homostoj de la prahistoriaj tempoj estis malkovritaj en diversaj lokoj de suda kaj norda Ĉinio el la tertavolo de la plistoceno (antaŭ 15,000—1,000,000 jaroj). Ili donis al ni altvalorajn materialojn por studo pri la evoluo de la homo. La homfosilioj, malkovritaj en Ĉinio povas esti ordigitaj laŭ la tri evoluaj stadioj de la homo kaj la vivtempo de la koncernaj prahomoj kiel jene:

1) La stadio de la simiohomo:

Fosilioj de la ĉina simiohomo aŭ Pekinhomo (sinantropo) estis malkovritaj en 1929, ĉe Ĝoŭkoŭdian en la sudokcidenta antaŭurbo de Pekino. Ili estis forprenitaj de usonaj imperiistoj kaj malaperis oni ne scias

kien. Post la Liberiĝo, oni denove fosadis kaj akiris unu kompletan malsupran makzelon kaj kvin dentojn. La Pekinhomo vivis antaŭ ĉ. kvincent mil jaroj.

2) La stadio de palantropa homo:

Fosilio de la Maba-homo estis malkovrita en 1958, en kaverno de la Monto "Leono", 1.5 kilometrojn sudokcidente de Maba-vilaĝo en Ŝaŭguan, Guangdong-provinco. Ĝi estas la plej antikva fosilio de palantropa homo, malkovrita en Ĉinio, kaj grava ĉenero interliganta la du stadiojn de la simiohomo kaj palantropa homo. La malkovriĝo de la Maba-homo montris ankaŭ tion ke dum la meza aŭ malfrua periodo de la plistoceno (antaŭ ĉ. 150,000 jaroj) ne nur en norda Ĉinio sed ankaŭ en suda Ĉinio loĝis prahomoj.

Fosilio de la Ĉangjang-homo estis malkovrita en 1956, en kalkŝtona kaverno, 45 kilometrojn sudokcidente de Ĉangjang, Hubej-provinco. La Ĉangjang-homo vivis en pli malfrua periodo ol tiu de la Maba-homo.

Fosilio de la Dingcun-homo estis malkovrita en 1954, en Dingcun-vilaĝo de Linfen-gubernio, Ŝanhi-provinco. La Dingcun-homo vivis antaŭ ĉ. 150,000 jaroj.

Fosilio de la Ordos-homo estis malkovrita en 1922 ĉe borde de la rivero Salavusu en Ikoĉaŭ-ligo de la nuna Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Ĝi apartenas al la tipo de la malfrua palantropa homo.

3) La stadio de Nov-homo:

Fosilio de la Liugiang-homo estis malkovrita en 1958, en kaverno de Tongtian-monto en Liugiang-gubernio, Guanghia Ĝuang-nacia Aŭto-

noma Regiono. Ĝi estas de viro mezaĝa. Ĝi estas la plej kompleta homfosilio malkovrita post la Liberiĝo de Ĉinio, kaj ankaŭ la fosilio de la plej frua moderna homo (Nov-homo) ĝis nun malkovrita en Ĉinio kaj la tuta orienta Azio. Laŭ la trajtoj de la kranio, la Liugiang-homo estas frua tipo de la mongola raso formiĝanta antaŭ ĉ. 50,000 jaroj. Tio montras ke ankaŭ la sudĉinia regiono estis devenejo de la mongola raso.

Fosilio de la Zijang-homo estis malkovrita en 1951, kiam la Ĉengdu-Ĉongkinga Fervojo estis konstruata tra Zijang-gubernio, Siĉuan-provinco. Ĝi estas de super-mezaĝa virino. Esploranto trovis ke ŝi suferis de serioza kronika lokalizita ostmelito aŭ kronika alveola absceso kaj donis studmaterialon pri la historio de dentomalsanoj.

Fosilio de la Kilinŝan-homo estis malkovrita en 1956 en Guanghi kaj havas la karakterizajn trajtojn de la primitiva mongolraso.

Fosilio de la Montsupra Kaverna Homo estis malkovrita en 1933 ĉe Ĝoŭkoŭdian, Pekino. Ĝi vivis dum la fina periodo de la plistoceno, kaj korpe jam multe similis la modernan homon.

Fosilio de la Ĝalajnoro-homo estis malkovrita en la jaroj 1933—1949, en Ĝalajnoro oriente de Manĝoŭli en la nordo de la Interna Mongolio. La unuaj malkovrintoj estis japanoj. Ili tiutempe opiniis ĝin de homo de la paleolitiko. Tamen ĝin restudinte post la Liberiĝo, oni sciis ke ĝi estas fosilio de homo de la mezolitiko antaŭ ĉ. 10,000 jaroj.

FREMDLANDAJ PROVERBOJ

Albanaj:

- ☆ Preferu de amik' riproĉon pikan ol dolĉan kison malamikan.
- ☆ Se l' vulpo faras paroladon, la koko vole pripensadu.

Japanaj:

- ☆ Eĉ se lupu agonias, ĝi ŝafon manĝi ambicias.

- ☆ Ventego, kiu najbar-tegmenton ŝiras, ne vian domon ĉirkaŭiras.

Indoneziaj:

- ☆ Eĉ se la akvo estas tre trankvila, ne prenu ĝin senkrokodila.
- ☆ Eĉ se vi brulas de soif' akuta, ne trinku akvon el malamika putu.
- ☆ Ja fiŝo ne povas renversi la maron, nebulo ne povas forigi montaron.

TRI FAJFOJ

Verkis Li Ŝengji

Ilustris Sun Muling

EN nia Lokomotiva Riparejo estas instrument-konservisto Onklo Vang Maŭ. La jena rakonto estas pri li.

La tasko de instrument-konservisto estas kontroli kaj konservi la diversajn instrumentojn sur la lokomotivo kiam ĝi eniras en la riparejon, kaj denove kontroli ĉu mankas iu el la instrumentoj kiam la lokomotivo estas elironta el la riparejo post riparado. La laboro ne estas peza, sed tre grava. Kvankam li ne estas tuttage okupata, tamen li devas esti preta ĉiun momenton, ĉar nekonservita estas la tempo de la eniro de riparotaj lokomotivoj kaj la eliro de la riparitaj.

Iun tagon, post kiam Onklo Vang estis reveninta hejmen post sia laboro, li laŭkutime ŝaltis la radioricevilon. Tre mallaŭtiginte la sonon kaj ekbruliginte cigaredon, li kuŝiĝis sur apogseĝo kaj trankvile ĝuis la pinĝuj-operon el la aparato.

Apenaŭ li aŭskultis kelkajn versojn kiam Onklino Vang neatendite enstrudiĝis de la ekstera ĉambro kaj etendis la manon por kapti la ŝaltilon. “Pro kio?” demandis Onklo Vang nekompreneme. “En la lastaj tagoj,” diris Onklino Vang kolere, “vi tenas la sonon tiel mallaŭta. La aparato fariĝis via monopolaĵo!”

Aŭdinte kion lia edzino diris, Onklo Vang ekscitiĝis: “La sono ne devas esti laŭta. Se ĝi estus laŭta, mi ne povus aŭdi!”

“Ha!” ekkriis Onklino Vang miroplene, “vi male ne povus aŭdi, se laŭte? Vi ja fariĝis... stulta antaŭ ol esti sufiĉe maljuna!”

Ĝuste tiam, Onklo Vang subite enpeniĝis kvazaŭ meditante pri io kaj poste li stariĝis, premestingis la cigared-stumpon kaj surmetante ĉapon diris al sia maljuna kunulino: “Nu nu, vi povas nun multe laŭtigi la sonon kaj aŭskulti!” Post tio li rapide eliris.

Onklino Vang opiniis, ke la edzo estas ofendita, sekve ŝi rapide postkuris lin. Sed Onklo Vang estis jam for en la direkto al la riparejo. Ŝi pensis, ke verŝajne la edzo ekmemoris ke li forgesis malŝalti elektran lampon aŭ fermi lukon en la riparejo.

Post iom da tempo Onklo Vang revenis. “Pro kio vi foriris?” demandis Onklino Vang plende. “Tiel nervoze!” Anstataŭ respondi la edzo nur ridetis.

La enigmo estis solvita nur post la noktomezo. Tiun postnoktomezon, iom post la dua, kiam Onklo Vang estis dormanta, li estis vekita de fajfoj de lokomotivo. Sed li ne estis certa, ĉu tio estis la tri fajfoj kiuj signifas ke lokomotivo estas eniranta en la riparejon aŭ elironta el ĝi. Ĉar en la pasinteco tia afero okazis tre malofte post la noktomezo. Li lumigis la elektran lampon kaj demandis al la edzino: “Vi ne dormas profunde. Ĉu vi ne aŭdis tri fajfojn?”

Onklino Vang multe miris kaj grumblis: “Ju pli maljuna, des pli malsanema. Kia galimatio!” Onklo

Vang ekscitiĝis kaj diris: “Ni parolu pri serioza afero!” La edzino des pli malkontentiĝis: “Ĉu dormi en profunda nokto ne estas serioza afero?” Onklo Vang fariĝis senhelpa. Mildigante sian tonon, li diris: “Jen, jen, estas egale ĉu vi aŭdis aŭ ne. Tio ne indas koleron!” Parolante li leviĝis kaj eliris sin vestinte.

Onklino Vang ne povis endormiĝi plu. Ŝi pensis: Kio okazis al la maljunulo?

Ekde la tempo kiam la produkta tasko en la riparejo streĉiĝis, Onklo Vang ĉiam atente aŭskultis la signalon de tri fajfoj. Li volis plenumi kiel eble plej akurate la unuan kaj lastan laborpartojn de la riparado de lokomotivo, kiujn li prirespondis. Kvankam la gvidantaro de la riparejo jam ordonis, ke dum lia foresto la laboristo en la dejora ĉambro povas anstataŭi lin, kaj se tiu ne kapablas, li telefone venigu lin aŭ sendu iun por voki lin, tamen Onklo Vang pensis, ke ĉar ĉiu havas sian laboron, li ne devas pliigi la ŝarĝon de aliaj. Tial post kiam li forlasis la riparejon, li ĉiam atentis la vokon de la fajfaro por ĝustatempe alveni al la riparejo.

Vidinte lin iuj lokomotivistoj kaj fornistoj ĉiam demandis al li kun miro: “Majstro Vang, de kie vi emerĝis?” Frapetante sian kapon li ekridis kaj respondis: “Nu, tie ĉi mi havas nervon, kiu ligiĝas kun viaj tri fajfoj. Do mi alvenas, tuj kiam eksonas la tri fajfoj.”

Nun estis ĝuste tiu ĉi nervo, kiu tiris Onklon Vang el lia domo post noktomezo. Li pensis, ke se li eĉ misaŭdis, la irado ja kostas al li nenion.



Kiam Onklo Vang alvenis al la riparejo, li trovis ke efektive venis lokomotivo. Senprokraste li kontrolis la instrumentojn kaj kondukis la lokomotivistojn al la gastejo. Post aranĝo pri ilia loĝado, li revenis al la lokomotivo kaj kolektis la instrumentojn pecon post peco kaj bone ilin konservis. Li laboris ĝis la kvara horo kaj nur tiam revenis hejmen.

Alveninte hejmen, li vidis ke la edzino ankoraŭ sidas sur la terlito. Li pensis, kiel domaĝe estas ke li ĝenis ŝian dormadon kaj ke neeviteble estos fulmotondra malpaciĝo. Sed kontraŭe al lia imago, lia edzino demandis al li ridante: “Mi jam bone divenis. Ankaŭ la okazaĵo en la tago estis pro la tri fajfoj, ĉu ne?”

Onklo Vang ne komprenis, kion ŝiaj vortoj signifas. Kun dubo li respondis: “Jes, estis pro la tri fajfoj. Kio do? Vi ne scias, ke la tri fajfoj.”

Antaŭ ol Onklo Vang finis sian parolon, Onklino Vang lin interrompis: “Sufiĉe, sufiĉe! Se vi estus dirinta al mi pri tio pli frue, ankaŭ mi povus vin helpi per aŭskultado! Mi servu kiel via dua paro da oreloj en la estonteco.” Aŭdinte kion diris lia edzino, Onklo Vang estis senlime dankema.

Ekde tiam, Onklo Vang havas bonan helpanton. Kiam li volas aŭskulti radion, Onklino Vang ĉiam diras: “Laŭtigu la sonon kaj aŭskultu senĝene! Mi estu via ‘gardostaranto’ ekster la pordo.” Kiam li estas vizitonta la banejon, Onklino Vang ĉiam diras: “Trankvile baniĝu! Se mi aŭdos la tri fajfojn, mi sendos nian infanon por vin sciigi.” Kiam ajn li volas iri ludi kartojn aŭ viziti kinejon, Onklino Vang ĉiam diras al li senhezite: “Distru vin senzorge! Se vi nur unue atentigis al mi, mi tuj sciigos vin se estos tasko.” Ekde tiu tempo la riparejo havas krom Onklon Vang unu plian personon, kiu ĉiam atentigas la tri fajfojn.

Tamen, post nelonge, la riparejo ekhavis ankoraŭ alian personon, kiu atentigas la tri fajfojn. Li estas Maĉjo, laboranto en la banejo. Antaŭe, Maĉjo ĉiam sentis ke Onklo Vang estas iom stranga: foje, kiam li estis komforte kuŝanta en la varmakva banujo, li subite stariĝis, rapide sin viŝis kaj surmetinte la vestojn tuj eliris. Kio grava tiel lin urĝis? Maĉjo ne povis kompreni.

Iun vesperon, denove venis Onklo Vang. Maĉjo volis demandi lin pri la afero. Akceptante lin, li diris: “Lastan fojon vi ne bone baniĝis.” “O, ne bone.” “Pro kio?” “O, estis io grava en la hejmo.” “Hodiaŭ do bone baniĝu!” “Jes, mi ŝatas varman banon.” Kiu atendis, ke ĵus parolinte ĝis ĉi tie, Onklo Vang malklare aŭdis tri fajfojn. Subite li haste surmetis la demetitajn vestojn, stariĝis kaj foriris. Nun Maĉjo dubis pli multe.

Nelonge post la foriro de Onklo Vang venis lia plej-aĝa nepo kun ruĝa koltuko. Maĉjo tuj demandis: “Kio urĝa okazis en via hejmo?” Kun surprizo la knabo respondis: “Nenio.” “Kial do via avo ĵus foriris tiel haste eĉ ne baninte sin?” “La avino volis, ke la avo iru al la riparejo.” “Al la riparejo?” Maĉjo murmuris pretervole: “Kiel strange! Kia medikamento efektive troviĝas en la lagenario?”

Post longe, Onklo Vang revenis. Maĉjo rapide iris renkonte al li kaj diris: “Jus venis via nepo por peti, ke vi iru al la riparejo.” Ridante Onklo Vang diris: “Jam irinte.” Ĝuste tiam ankaŭ iu laboraranĝisto venis sin bani. Vidinte Onklon Vang, li rapide iris al li dirante:



“Jen estas letero de la veturigistoj de la lokomotivo No. 5344.” Parolante li elpoŝigis la leteron. Onklo Vang estis apenaŭ transpreninta ĝin, kiam Maĉjo ekkaptis la leteron. Li sciis, ke en ĝi nepre estas io leginda, tial li propravole proponis: “Mi legu por vi.” “Ne necese, ne necese.” Sed Maĉjo jam malfermis la leteron kaj komencis legi:

.Antaŭ kelkaj tagoj, vi venis meznokte al la riparejo por akcepti nin. Hodiaŭ, kvankam vi jam finis vian deforon, vi ankoraŭ revenis al la riparejo por adiaŭi nin. Tia serioza kaj respondecema revolucia spirito de vi donis al ni ĉiuj vivan lecionon. Veninte ĉi tien ni plibonigis kaj la lokomotivon kaj nian penson. De nun ni nepre lernos vian spiriton. Ni promesas veturigi la lokomotivon No. 5344 pli rapide kaj tiri pli multe da ŝarĝo.

Finleginte la leteron, Maĉjo tre kortuŝiĝis. Li premis la manojn de Onklo Vang kaj diris: “Nun mi komprenas, ke vi foriris pro la tri fajfoj. De post nun vi senzorge banu vin en la banujo. Mi atentigas la tri fajfojn por vi.”

Tiamaniere Maĉjo fariĝis la dua helpanto de Onklo Vang por aŭskulti la tri fajfojn.

Ankoraŭ alia helpanto de Onklo Vang estis elektita de li mem. Tiu estas lia metilernanto Malgranda Vu. Li servas kiel liberhora laboranto de la klubo. Kiam prezentiĝas filmo, li kolektas la enirbiletojn. Kiam ajn Majstro Vang venas rigardi filmon, Malgranda Vu estas lia raportisto pri la tri fajfoj.

Tiamaniere la edzino de Onklo Vang, lia metilernanto, kaj multaj el liaj konatoj en la lokoj, kiujn li frekventas, kune formis nevideblan cirkviton, kiu, kiel la supre menciita nervo en la cerbo de Onklo Vang, firme ligiĝas kun la tri fajfoj. Kiam sonas la tri fajfoj, se ili scias kie estas Onklo Vang, ili tuj demetas la laboron en siaj manoj kaj rapide iras sciigi lin. Kaj Onklo Vang Maŭ mem, kvazaŭ batalanto aŭdinta sturm-trumpeton, tuj vigle paŝegas al la batala posteno.

Trad. Pandiŝo



VEJĈIO

III. PRAKTIKA VEJĈI-LUDO (Daŭrigo)

4. Fina Stadio de la Ludo

Kiam la teritorio sur la vejĉi-tabulo estas fundamente dividita inter la du flankoj, kaj neniuj flankoj povas ataki plue la alian, tiam la ludo eniras sian finan stadion.


1) **Komunaj punktoj** — En tiu ĉi stadio, la tasko de la ludantoj estas okupi la ankoraŭ liberajn punktojn

inter la grupoj de la du flankoj. Tiaj liberaj punktoj estas nomataj komunaj punktoj.


2) **Simplaj komunaj punktoj kaj duoble valoraj komunaj punktoj** — Estas du specoj de komunaj punktoj. Se per okupo de unu komuna punkto oni povas malgrandigi la teritorion de la kontraŭa flanko, t. e. pligrandigi la sian, tia punkto estas nomata duoble valoraj komuna punkto (ekz-e ŝtonmetoj ① ĝis ②②

en la diag. 50). Alie ĝi estas nomata simpla komuna punkto (ekz-e ②③ ĝis ③⑦ en diag. 51).

Lertaj vejĉiistoj ofte prenas iniciativon okupi unue la duoble valorajn komunajn punktojn kaj devigi la kontraŭan flankon resti en defensiva stato. La simplajn komunajn punktojn li okupas nur laste. Tiamaniere li povas akiri eĉ en tiu stadio pli multajn punktojn ol la kontraŭa flanko.



Diag. 50



Diag. 51

Fablo:

LA ĈAGRENITA STRIGO

Iun tagon, turto renkontis strigon en arbaro. Vidante ke la strigo hastas sur sia vojo kun malgaja

mieno, la turto lin demandis: “Kien vi iras?” Tiu respondis: “Mi transloĝigas orienten.”

“Kial?”

“La tuta vilaĝo abomenas mian voĉon kaj oni ofte arkopafis min, tial mi ne povas ne transloĝiĝi!” Tion dirinte li forflugis kun klinita kapo.

Pasis kelkaj tagoj, la turto denove renkontis la strigon en arbaro. La turto lin demandis scivole:

“Sinjoro Strigo! Kredeble vi tre ĝojas nun? Kio nun rapidigas vin sur via vojo?”

La strigo skuis la kapon kaj diris: “Ve! Por diri al vi malkaŝe, en la lasta tempo mi vere ĉagreniĝis! Mi ne komprenas kial ankaŭ la orientanoj same abomenas mian voĉon. Mi devas nun transloĝiĝi al la nordo.”

Aŭdinte tion, la turto diris al la strigo:

“Ne plendu kontraŭ la aliaj, preferu ŝanĝu vian voĉon, alie oni malŝatos vin kien ajn vi transloĝiĝos.”

“Nu, nu!” Ankoraŭ ne fininte sian diron, la strigo ree forflugis kun klinita kapo.

Nofhan: *Letero al Mal- proksimaj Amikoj (VIII)*

Kelkaj Aferoj pri Ĉinio

Karaj geamikoj!

Ĉe miaj manoj estas kelka materialo pri geografio, loĝ-ant-aro, nacioj kaj klimato de mia patrolando. Mi pensas ke ili povus helpi al via kompreno de Ĉinio. Nun mi kopias ilin jene kiel respondon al via lasta letero.

El la nunaj 22 provincoj kaj 5 aŭtonomaj regionoj de Ĉinio, la plej granda en areo estas la Hingiang Ujgura Aŭtonoma Regiono, okupanta ĉ. ses-onon de la tuta areo de la lando; la plej malgranda estas Tajvan-provinco okupanta nur du-dekses-onon.

La provinco Siĉuan havas loĝantaron la plej grandnombran en la lando, sume de 72,160,000 loĝantoj; Tibeto la plej maldense loĝata havas nur 1,270,000 loĝantojn, mez-nombre sur ĉiu kvadrata kilometro da tero loĝas unu homo.

La provinco Junnan havas plej multe da nacioj. El la pli ol 50 naci-malplimulto en la tuta lando 20 troviĝas en Junnan sola. Triona loĝantaro de la provinco konsistas el nacimalplimulto.

Ĝuang-nacio kies plejparto loĝanta en la Guanghia Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono estas la plej granda nacimalplimulto en Ĉinio, kaj havas 7,780,000 loĝantojn. La plej vaste disloĝanta nacimalplimulto estas Huj-nacio, en ĉiu provinco kaj regiono troviĝas ĝiaj anoj. Sep-ono

de tiu nacimalplimulto loĝas en la Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono.

La plej norda provinco en Ĉinio estas Hejlonggiang. Tre malvarme estas tie kaj en kelkaj lokoj la tero frostiĝas la tutan jaron. La plej suda provinco estas Guangdong kiu havas klimaton de la varmega kaj mez-varmega zonoj.

La plej alta alt-ebenejo de Ĉinio (kaj ankaŭ de la mondo) estas Tibeto kaj Kinghaj-provinco, kies alteco atingas 4,000 metrojn super la marnivelo. Sed multaj lokoj de Giangsu-provinco ĉe la bordo de la Orienta Maro la tero estas nur 2 aŭ 3 metrojn super la marnivelo.

La plej lag-oz-a provinco de Ĉinio estas Hubej. Ĝi estas krom-nomata “Mil-laga Provinco”. Nebulo plej abundas en la orienta parto de Siĉuan-provinco, kie oni vidas la sunon tre malofte ekde oktobro ĝis la sekvanta aprilo. Tial en la antikva tempo oni havis la diron “Siĉuan-aj hundoj bojas al la suno”.

Interna Mongolio kaj Hingiang estas la du plej grandaj paŝtaj regionoj en Ĉinio; nia plej granda fiŝejo estas Ĝouŝan-insularo de Ĝegiang-provinco; nia plej granda sal-preparejo estas en Hebej-provinco kaj nia plej grandaj arbaraj regionoj troviĝas en Interna Mongolio kaj Hejlonggiang-provinco.

Rakontoj pri Afanti

BONA METODO POR FEIĜO

Reĝo demandis al Afanti, kian bonan metodon por fariĝi feo post morto li scias. Afanti respondis, ke plej bona metodo por fariĝi feo estas dormadi de la mateno ĝis la vespero kaj fari nenion.

Aŭdinte tion la reĝo tre miris kaj demandis:

“Kial oni povas feiĝi per dormado?”

“Ĉar tiel agante Via Majesto ne plu faros malbonojn”, diris Afanti. “Proverbo ja diras: Estas pli bone ke la malbonuloj dormadu.”



NE PAŜU AL LA MORTO

Rajdante elegantan ĉevalon sur la vojo, iu pastro renkontis Afanti. Afanti lin salutis kaj diris:

“Bonan tagon! Kien vi iras, sinjoro?”

“Mi iras al la ĝardeno de Dio por ludi,” fanfaronis la pastro. “Ĉu vi ne volus iri kun mi por ĝuado?”

“Aj ja! Eĉ se mi volus tien iri, mi ne volus iri kune kun vi,” respondis Afanti. “Mi pensas ke estas pli bone por vi ne tien iri.”

“Kial?”

“Mia sinjoro, ĉu forgesis? Vi ja diris al mi, ke Dio neniam povas pardoni tiun, kiu faras ĉiajn malbonojn. Se vi renkontus lin! Prefere ne paŝu al la morto!”

Nia Vortareto

abundi—esti en pli ol sufiĉa kvanto.

aŭtonoma—memreganta.

boji—krii hunde.

feo—fabela estaĵo kun superhoma povo.

frost-iĝ-i—fariĝi malmola pro malvarmego.

lag-oz-a—plena de lagoj.

nebulo—densa vaporo malalte en la aero.

paŝti—konduki hejmajn bestojn por ke ili manĝu herbon.

proverbo—popola diro.

NOVA E-KURSO EN PEKINO

En aprilo ĉijare komenciĝis en Pekino nova esperanta kurso. Ĝin partoprenis ok junuloj. Ĉiu el ili decidis nepre ĝin ellerni kaj uzi ĝin por la venko de socialismo kaj interkompreno inter diverslandaj popoloj.

PRELEGO PRI ESPERANTO EN VJETNAMA UNIVERSITATO

Laŭ oficiala invito de la Lingvistiko-konsilantaro ĉe la Vjetnama Pedagogia Universitato en Hanojo, K-do DAO ANH KHA, ĝenerala sekretario de V.P.E.A., faris prelegon pri la internacia lingvo Esperanto laŭ lingvistika kaj praktika vidpunktoj por pluraj lingvistoj kaj respondeculoj de la menciita universitato. Post la parolado estas deciditaj por proksima tempo la malfermo de speciala unua Esperanto-kurso por la respondeculoj de la Pedagogia Universitato kaj tiu de Ekspozicio pri Esperanto-literaturo kaj movado por la studentaro.

Laŭinforme, oni malfermis en Hanojo en la 5-a de marto ĉijare ankaŭ la unuan superan kurson de Esperanto, organizitan de V.P.E.A.

75-A NASKIĜDATREVENO DE V. J. EROŜENKO

La 31-an de jan. en Moskva Centra Klubo ĉe la Kulturdomo de Medicinistoj okazis solena vespero dediĉita al la 75-a naskiĝdatreveno de la granda rusa blinda verkisto, esperantisto Vasilij Jakovleviĉ Eroŝenko. Pri lia vivo, pri liaj multaj vojaĝoj, rakontis lia kolego blinda verkisto F. Ŝojev, iama lernanto de V. Eroŝenko.

En la vespero estis organizita ankaŭ ekspozicio de la verkoj de Eroŝenko en la rusa lingvo kaj Esperanto. (T.K.)

LA 6-A TUTPOLLANDA KONFERENCO DE P.I.E. EN VARSOVIO

La 3-an kaj la 4-an de januaro ĉijare okazis en Varsovio la VI-a tradicia konferenco de Polaj Instruistoj-esperantistoj organizita en vintra libertempo de la lernejoj. Ĝi estis okazigita en la sidejo de la Pola Esperanto-Asocio. Partoprenis ĝin delegitoj el 15 lokoj de la tuta Pollando. Oni pridiskutis diversajn temojn interesajn al la instruistoj de Esperanto.

NOVAĴOJ EL KRAKOVO (Pollando)

* En Krakovo estas teatra grupo gvidata de fama aktoro kaj disponas someran programon titolitan "Sub la Verda Ombrello". Ĝi povas esti invitita de esperantistaj asocioj kaj ripozejoj en libertempo.

* Tie oni organizas lingvan tendaron por junularo kun la lingvogrupoj angla, esperanta kaj rusa en la monato julio, 1965 en Kroŝcienko apud Dunajec.

* Esperanto-Asocio en Krakovo kunlaborante kun turisma kooperativo "Wawel Tourist" helpas al enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj ripozi en oportunaj ripozejoj de "Wawel Tourist".

ESPERANTO-KURSOJ EN HUNGARA FERVOJISTA REFREŜIGEJO

Bone sukcesis la somerfinaj tradiciaj kursoj de la Hungara Fervoja Sekcio de Hungara Esperanto-Asocio en la bone ekipita refreŝigejo de Fervoja Sindikato ĉe la lago Balaton. Dum du semajnoj en kvin grupoj partoprenis proksimume cent personoj el diversaj partoj de la lando. Inter la instruistoj troviĝis Julio Baghy, P. Balkányi kaj aliaj. Oni montris ankaŭ diversajn filmojn de la fervojistoj kaj lumbildojn pri la movado kaj aliaj.

SOMERA UNIVERSITATO EN GYULA, HUNGARIO

La Konsilantaro de la urbo Gyula kaj la Hungara Esperanto-Asocio planis aranĝi inter la 4-a kaj la 9-a de julio la IV-an Someran Esperanto-Universitaton en Gyula, Hungario. Tia sama universitato jam estis organizita en lasta jaro kaj ĝi rikoltis grandan sukceson.

La planita programo estas tre riĉa kaj diverstema.

 **SUR NIA LIBROBRETO**

MEZE DE L' FLAMOJ — novelaro el suda Vjetnamio. Ĝi enhavas 12 novelojn de 10 aŭtoroj. Ĝin eldonis la Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio. Formato: 13 X 19 cm., 214 p.

Antaŭ nelonge mi legis la unuan kaj la duan volumojn de *Leteroj el Sud-vjetnamio*. Ili tre bone spegulas

la batalon de la tuta popolo de suda Vjetnamio kontraŭ la agreso de Usono kaj la faŝista teroro de ĝiaj lakeoj. Oni povas facile kompreni el la priskribitaj faktoj, kiu detruis la pacon, kontraŭ kiu oni devis defendi la pacon kaj ĉu en tia situacio helpus nura revo aŭ sopiro al paco.

Al la supraj demandoj refoje donas ĝustan respondon la nuna libro.

La verkintoj de la 12 noveloj ne estas profesiaj verkistoj sed oficistoj, laboristoj, soldatoj, kiuj persone partoprenas la naciliberigan batalon en suda Vjetnamio. Iliaj verkoj pli amplekse spegulas la realon en suda Vjetnamio.


La *Leteroj el Sud-vjetnamio* konigas al ni la firman decidon de la tuta popolo de suda Vjetnamio pri forpelo de la usonaj agresantoj. Kaj en tiu ĉi novelaro oni povas kompreni ankaŭ tion, ke la popolo gvidata de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio decideme batalas por la nacia liberigo. Kaj krome soldatoj kaj eĉ oficiroj de la marioneta reĝimo pli-malpli frue ekiros al la sama celo vidante la kruelajn agojn de la usonaj agresantoj kontraŭ iliaj samlandanoj kaj la malhonoran finon de la lakeoj. Eĉ prostituitino intime ligita kun la sekreta servo de la usono-dziem-a reĝimo fine



Enigmo

KIEL DEMANDI?

Iu iras de A al B, sed ĉe C renkontas krucon de vojoj al B kaj al D:



konsciiĝis kaj brave batalis kontraŭ la malamikoj.

Decidemaj estas la popolanoj de suda Vjetnamio en la naciliberiga batalo. Kun tia decidemo ili timas nenion. Kiam mankas armiloj oni ilin batalakiras de la malamikoj; kiam viroj forestas, virinoj surprenas sur sin la batalan taskon eĉ portante sian infanon surdorse; la malkuraĝaj komence de la batalo fariĝas pli kaj pli bravaj dum la luktado kontraŭ la malamikoj, ĉar ili fine komprenas, ke per cedemo kaj humiliĝo antaŭ la malamikoj oni ja ne povas akiri la rajton vivi pace; tiuj, kiuj rekrutiĝis devigite en la armeon de la marioneta reĝimo, ĉiam serĉas ŝancon fari ion indan al la naciliberiga batalo kaj fine iras en la vicojn de la revolucio. Eĉ la usonaj soldatoj trompitaj de la usonaj imperiistoj, vidinte post kaptiĝo, ke la popolo de suda Vjetnamio estas devigata heroe batali kontraŭ la agresantoj por sia ekzisto, fine konsciiĝis pri sia kulpo alporti suferon al la vjetnama popolo, ke la usona armeo intervenas en la aferojn de aliaj landoj, deklaris: "Mi estas kulpa kontraŭ la vjetnama popolo" kaj sincere kriis: "Subtenu la batalon de la sud-vjetnamia popolo!"

Jen kion priskribas tiu ĉi libro. Ĉiuj ĝiaj temoj estas prenataj el la usono-dziem-a periodo, tamen oni povas vidi en ĝi kiel disvolviĝis kaj fortiĝis la batalo de la popolo de suda Vjetnamio. Pli multaj popolanoj en suda Vjetnamio jam estas mobilizitaj al la naciliberiga batalo. Ĉiam pli multaj soldatoj de la marioneta armeo ekiris en la vicojn de la revolucio. Pli multajn malvenkojn

Por scii kiun vojon preni, li devas demandi la du fratinojn kiuj loĝas ĉe C. Li scias ke la pli aĝa fratino ĉiam diras la veron kaj la pli juna la malveron. Sed li ne kapablas distingi kiu el ili estas la pli aĝa. Kiel li devas demandi per unu frazo, por trovi sian vojon al B?

Laŭ Jerzy Zabowski, Pollando

Solve al la Problemo KIEL DEPRENI en nia lasta numero

Nun prenante la literojn "A B C Ĉ D E F" por reprezenti la sep ringojn de la plasta ĉeno ni klarigu kiel Liĉjo deprenis la ringojn laŭ la

kondiĉo donita en la lasta numero.

La unuan tagon, Liĉjo rompita la ringon C, kaj ĝin deprenis, nun restis la ringoj A B kaj Ĉ D E F en du partoj;

la duan tagon, li forprenis A B kaj restigis C kaj Ĉ D E F;

la trian tagon, li forprenis A B kaj C, restigis Ĉ D E F;

la kvaran tagon, li forprenis Ĉ D E F, restigis A B kaj C;

la kvinan tagon, li forprenis Ĉ D E F kaj C, restigis A B;

la sesan tagon, li forprenis Ĉ D E F kaj A B, restigis C;

la sepan tagon, li forprenis ĉiujn.

jam suferis kaj suferas la usonaj agresantoj en tiu lando. Kaj por sin savi el la seneliro ili fariĝas pli riskemaj en la milita aventuro, kiu kondukas ilin al nenio alia ol plena fiasco de la nova koloniisma fiagado.

Mi forte rekomendas tiun ĉi libron al ĉiuj esperantistoj. Tiuj, kiuj havas klaran vidon pri la sud-vjetnamia problemo, ricevos el ĝi pli klaran bildon pri la heroe batalo de la popolo de suda Vjetnamio kaj pri la nepra malvenko de la usona imperiismo. Kaj tiuj, kiuj ĉiam revas senkondiĉan pacon oferante eĉ la nacian sendependecon kaj viv-rajton de la koncerna popolo kaj ne distingante juston de la maljusto, ricevos de la priskribitaj faktoj, instruon ke paco ne povas esti venigita per nuraj cedemo, toleremo ktp.

Honfan

Seiho Nishi: **NIA KORPO** — Anatomio kaj fiziologio de la homo por laikoj. Eld. de Gunma Esperanto-Societo, Maebaŝi, Japanujo. 14.8 × 21 cm., 108 p. Prezo: \$ 2.00 mendebla ĉe la Japana Esperanto-Instituto.

La unuan eldonon de tiu ĉi libro ni jam konigis al niaj legantoj en la dua numero de nia gazeto en 1962. Nun ni tre ĝojas rekomendi al niaj legantoj ankaŭ ĝian novan kaj plene reviziitan eldonon. Oni ne nur rearanĝis ĝian enhavon sed ankaŭ aldonis al ĝi epilogon por montri la rilaton de la homa organismo kaj ĝia medio. La riĉaj ilustraĵoj kaj la facila lingvostilo faciligas la komprenon, kvankam fakaj terminoj estas neeviteblaj en tia verko. La

rapida reeldono de tiu ĉi libro ankaŭ montras vastan aprobon de la esperantista legantaro.

Korespondi Deziras

* 20 jaraĝa laboristo Ngo Le Hong, K 3 Super, nha may superphosphate, Lam Thao, Phu Tho, Vjetnamio.

* Han Yeng-hun, Gangwondo Gosangun Gosaneub 29 ban, Koreio. Kun ĉ. l. kaj interŝ. pm., bk., librojn kaj gazetojn.

* Kem. inĝ. P. Bonev, ATZ, Atara Zagora, Bulgario. Kun samfakuloj.

* K-do Desiderio Navarro, Lanceros 216, Camaguey, Cuba. Pri lingvistiko, psikologio kaj orientalismo kun ĉl.

* Unuataga koverto kun la speciala stampilo okaze de la II Esperantista Ekspozicio organizita de la Grupo Esperantista de Camaguey, estos sendita kontraŭ du rkp. aŭ esp. libroj. Skribu al: Grupo Esperantista de Camaguey, Apartado 732, Camaguey, Cuba.

* Uzitajn aŭ neuzitajn vidaĵkartojn, dez. ricevi D-ro Ant. Kočenda, Bučovice II., Okres Vyškov, ĈSSR.

* S-ro Martin Jean, 14 Rue Brittmann, Pout de la Maye, Girowde, Francio. Interŝ. PK. kun Ĉinio, Japanio kaj aliaj aziaj landoj.

* Stefano Mesterhazy, Pecs, Munkacsy str. 13, Hungario. Dez. serioze kor. pri ĉ. t., recipe pri astronomio.

* Alberto Corrado STAGI, prezidanto de Junulara Esperanto-Grupo, serĉas por siaj gejunuloj (13-21 jaraĝaj) seriozajn gekorespondantojn el: Skandinaviaj landoj, Germanio, Anglio, Greklando, Hispanio, Sovetunio kaj Svislando. Adreso: Alberto C. STAGI, Grupo Giovanile Esperantista, Palazzo Ex-Intendenza di Finanza, MASSA (MS), Italio.

* Homeopatia kuracisto D-ro Luigi Bardo, via Biassa, 45, La Spezia, Italio. Dez. interŝ. spertojn kaj medikamentojn. Skribu esp. aŭ franclingve.

* Dez. firmajn kontaktojn kun Esp. grupoj ĉe lanfabrikoj kaj maŝinfabrikoj en tuta mondo. Skribu al: Pola Esp. Asocio, Filio en Zawidow, Zawidow, str. Kopernika 7, Luban Slaski, Pollando.



Reto de irigaciaj kanaletoj

Foto de Ĝang Fuhie

